

V - 19034 / 1967



EL *Popola*  
**ĈINIO**

N-ro 1

JANUARO 1967

# Prezidanto



*Maldekstre:*

*Prezidanto Maŭ okazoje akceptas la revoluciajn instruistojn kaj lernantojn kaj junajn ruĝajn gvardianojn.*

*Dekstre:*

*Prezidanto Maŭ kaj lia intima batalamiko kamarado Lin Biao revuas la grandan armeon de la kultura revolucio.*

*Malsupre:*

*La granda armeo de la kultura revolucio konsistanta el ruĝaj gvardianoj kaj revoluciaj instruistoj kaj lernantoj revuete paradas tra la Tian-anmen-placo.*



# Maŭ Okafoje Revuas

## Grandan Armeon de Kultura Revolucio





*Prezidanto Maŭ, nia granda instruanto, granda gvidanto, granda ĉefkomandanto kaj granda direktilisto, revuas la grandan armeon de la kultura revolucio.*

# Prezidanto Maŭ Revuadis Armeegon de Kultura Revolucio el 11 Milionoj da Personoj

*La junaj revoluciuloj kore akلامas al nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ.*




**E**N la arda, granda proleta kultura revolucio, en la bonega situacio, karakterizita de tio ke la revolucia amaso en centmilionoj venke marŝas laŭ la ĝusta linio de Prezidanto Maŭ, nia granda instruanto, granda gvidanto, granda ĉefkomandanto kaj granda direktilisto Prezidanto Maŭ akceptis en la ĉefurbo, la 25-an kaj 26-an de novembro 1966, du kaj duonan milionojn da revoluciaj instruistoj kaj lernantoj kaj ruĝaj gvardianoj el diversaj lokoj de la lando.

Tio estis la oka fojo en kiu Prezidanto Maŭ kaj lia intima batalamiko kamarado Lin Biao akceptis la junajn revoluciulojn.

Depost la 18-a de aŭgusto 1966, inkluzive la nacian feston, Prezidanto Maŭ jam ricevis pli ol 11 milionojn da revoluciaj instruistoj kaj lernantoj kaj ruĝaj gvardianoj. Tio estas granda revolucia iniciataĵo senprecedenca tiel en la revolucia historio de Ĉinio kiel en la historio de internacia komunisma movado, ke Prezidanto Maŭ intervidiĝis kun tiom multe da revoluciaj amasoj dum tiel mallonga tempo. Ĉu en la historio de iu ajn lando troviĝis tia revolucia ĉefo, kiu tiel vaste intervidiĝis kun la popolamasoj? kaj kuraĝis iniciati kaj gvidi tiel grandskalan revolucion movadon? Ne! Nur Prezidanto Maŭ — la plej granda proleta revoluciulo de la nuna epoko, havas tian imponan temperamenton!

Prezidanto Maŭ plej amas la amason, plej fidas la amason kaj plej subtenas la revolucion iniciatemon de la amaso. En la lasta tagdeko de majo, kiam Nie Juanzi kaj aliaj, kune sep gekamaradoj, publikigis la unuan revolucionan opini-afiŝon en la Pekina Universitato, Prezidanto Maŭ estis la unua, kiu plentforte ĝin subtenis. Tiel, unu fajrero tuj transformiĝis en grandan stepan brulegon, kaj la flamanta incendio de revoluciaj opini-afiŝoj envolvis la tutan landon, igante la kontraŭ-revoluciajn reviziistojn plene elmontri sian veran fizionomion kaj malebligante al la diversaj demonoj kaj diabloj kaŝi sin en iuj mallumaj anguloj. Kiam la ruĝa gvardio estis ankoraŭ burĝono elpuŝanta sin el la tero, estis denove Prezidanto Maŭ, kiu la unua subtenis ĝin. Prezidanto Maŭ ĝoje diris al la unua grupo da ruĝaj gvardianoj:



**“Mi firme subtenas vin!”**

Kvazaŭ printempa tondro sonis la vortoj de Prezidanto Maŭ, kaj milionoj da ruĝaj gvardianoj ekaperis tra la tuta lando.

La grandaj kontaktoj inter la revoluciaj instruistoj kaj lernantoj kaj ripetada akceptado de la amasoj fare de Prezidanto Maŭ donis grandan kuraĝigon kaj subtenon al la vastaj revoluciaj amasoj. La granda demokratio de plena sinaŭdigo, plena disvolviĝo, opini-afiŝoj, grandaj debatoj kaj grandaj interkontaktoj puŝas la kulturen revolucion de unu alttajo al alia.



*Nia granda instruanto, granda gvidanto, granda ĉefkomandanto kaj granda direktilisto Prezidanto Maŭ revuas la grandan armeon de proleta kultura revolucio kune kun sia intima batalamiko k-do Lin Biaŭ kaj k-do Ĝoŭ Enlaj.*

En la tagoj 25-a kaj 26-a, la temperaturo en Pekino falis ĝis ĉirkaŭ 0° C., sed la ĝojiga sciigo pri la akcepto de la junaj revoluciuloj fare de Prezidanto Maŭ varmigis ĉies koron. Sur Tian-anmen-placo kaj la aerodromo de la okcidenta antaŭurbo de Pekino, Prezidanto Maŭ kaj kamarado Lin Biaŭ estis kune kun la revoluciaj instruistoj kaj lernantoj kaj ruĝaj gvardianoj en la frosta vento kaj svingadis la manon salute al la huraantaj amasoj.

“Prezidanto Maŭ, ho Prezidanto Maŭ! Ni por ĉiam sekvos vin rekte antaŭen sur la longa vojo de revolucio!” La revoluciaj instruistoj kaj lernantoj kaj ruĝaj gvardianoj el diver-

saj lokoj de la lando eldiris la solenan ĵuron. Prezidanto Maŭ ĉiam restas kun la amaso, spiras la saman spiron kaj dividas la sorton kun la amaso; li tutkore kaj plenanime subtenas la revoluciajn amasajn movadojn de Ĉinio kaj de la mondo kaj starigas plej brilan modelon por la marksist-leninistoj de la tuta mondo, por nia tuta partio, por ĉiuj niaj batalantoj kaj por la juna generacio.

Kantoj plenis en tiuj du tagoj ĉie sur la stratoj de Pekino, kaj la aeron skuas la krioj: “Vivu Prezidanto Maŭ!” “Longe vivu Prezidanto Maŭ!” La homoj estis en plena ĝojo kaj senlima feliĉo.



*La ruĝaj gvardianoj kaj revoluciaj instruistoj kaj lernantoj ricevas la revuon de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ.*





# Albana Partio de Laboro Okazigis Sian 5-an Kongreson

**L**A 5-a Kongreso de la Albana Partio de Laboro venke okazis en la nove konstruita Kultura Palaco en Tirano de la 1-a ĝis 8-a nov. 1966.

Enver Hoxha, la unua sekretario de la Centra Komitato de Albana Partio de Laboro, prezidis la inaŭguron kaj faris en la Kongreso raporton pri la laboroj de la Centra Komitato de Albana Partio de Laboro. Mehmet Shehu, membro de la Politika Buroo de Centra Komitato de Albana Partio de Laboro kaj prezidanto de la Konsilantaro de Ministroj de la Popola Respubliko de Albanio, faris raporton pri la direktivoj de la Kvara Kvinjara Plano (1966 — 1970) de ekonomia kaj kultura disvolvo de la Popola Respubliko de Albanio.

En sia raporto pri la laboroj de la Centra Komitato de la Partio k-do Enver Hoxha diris: De la 4-a Kongreso ĝis nun estis la plej malfacila sed ankaŭ la plej glora periodo en la 25 jaroj de la vivo de la Albana Partio de Laboro. En tiu periodo estis farita intensa, principa kaj vivmorta batalo kontraŭ la hontinda perfido al la revolucio kaj socialisma afero kaj kontraŭ la reviziismo de Ĥruŝčov, kaj kiel tia la periodo estas registrita en la historion.

La Partio kaj la popolo unuigis sin unuanime kaj frakasis la furiozajn atakojn, blokadon kaj krimajn intrigojn de la imperiistoj kaj la Ĥruŝčov- kaj Tito-reviziistoj. En sin-

forgesa spirito, la Partio kaj la popolo venkis ĉiujn malfacilojn kaj obstaklojn kreitajn de ili, heroe defendis la revolucian venkon de la popolo, sukcese plenumis la bazajn taskojn difinitajn de la 4-a Kongreso kaj puŝis antaŭen la aferon de socialisma konstruado de Albanio al nova etapo de venko.

La raporto faris tuj poste profundan marksism-leninisman eksplikon pri la stato de la kvin flankoj, nome: la internacia situacio kaj la ekstera politiko de Albanio; la plenumado de la Tria Kvinjara Plano kaj la ĉefaj flankoj de ekonomia kaj kultura disvolviĝo en la venontaj kvin jaroj; plua plifortigo de la Partio kaj ĝia gvida rolo; plua profunda disvolvo de ideologia-kultura revolucio; kaj la lukto de la Albana Partio de Laboro kontraŭ la moderna reviziismo kaj por defendi la purecon de marksism-leninismo.

K-do Enver Hoxha emfazis en la raporto: La glora Komunista Partio de Ĉinio kaj la granda Ĉina Popola Respubliko, estrataj de la elstara marksist-leninisto k-do Maŭ Zedong, firme kaj senŝanceliĝe staras en la plej antaŭa vico en la nuna batalo kontraŭ imperiismo estrata de Usono kaj la moderna reviziismo estrata de la gvidanta kliko de Sovetunio. Tio estas nekontestebla fakto historia kaj granda feliĉo de ĉiuj popoloj kaj la internacia komunisma movado. La rolo kaj kontribuo, kiujn la Komunista Partio de Ĉinio kaj la Ĉina Popola Respubliko ludas kaj faras en la



*Solena inaŭguro de la Kvina Kongreso de la Albana Partio de Laboro en Tirano. Jen ĝia podio.*

batalo por la revolucia afero de la internacia proletaro kaj la tutmonda popolo, estas tre grandaj. La Komunista Partio de Ĉinio kaj la Ĉina Popola Respubliko estas nun la nedetruibla citadelo kaj potenca revolucia bazloko de socialismo, la standardportanto de marksism-leninismo, ŝtala kolono kaj fidinda apogilo de nia komuna revolucia afero.

K-do Hoxha diris: La imperiistoj kaj modernaj reviziistoj intencas faligi la Komunistan Partion de Ĉinio kaj la Ĉinan Popolan Respublikon, ĉar la lastaj estas iliaj plej potencaj malamikoj kaj netranspaseblaj obstakloj por ili en ilia provado efektivigi sian okupadon kaj dominadon super la mondo. Ili intencas apartigi la diverslandajn popolojn, revoluciulojn kaj marksist-leninistojn disde la Komunista Partio de Ĉinio por tiel izoli ĝin kaj nin nenigi facile. La monda imperiismo kaj Ĥruŝĉov-reviziismo nun kune atakas la popolan Ĉinion kaj kalumnias la proletan kulturalan revolucion de Ĉinio. Estas tute vane, ke la malamikoj arogante intencas malhonorigi la grandan popolan Ĉinion. La granda popola Ĉinio estas venke marŝanta antaŭen sub la gvidado de la Komunista Partio de Ĉinio kaj direktado de la penso de Maŭ Zedong. La Albana Partio de Laboro aklamas la proletan

kulturalan revolucion de Ĉinio. La proleta kultura revolucio de Ĉinio celas senkompatate kontraŭbatali la burĝajn kaj reviziismajn pensojn ekzistantajn en la homa ideologio, kulturaj kampoj kaj ĉiuj flankoj de la ŝtata vivo, oponi kontraŭ la klasaj malamikoj kaj ĉiuj publikaj kaj kaŝaj reviziistoj, kiuj intencas tiri la popolan Ĉinion sur la vojon al kapitalismo, kaj kontraŭ la usona imperiismo, Ĥruŝĉov-reviziismo kaj diverslandaj reakciuloj.

Ĉiuj marksism-leninismaj partioj kaj fortoj, kiuj troviĝas en pozicio de egaleco kaj sendependeco, devas intime unuiĝi kun la Komunista Partio de Ĉinio kaj la Ĉina Popola Respubliko kaj formi kun ili ŝtalan muregon kontraŭ kiu rompiĝos la kapoj de ĉiuj malamikoj.

Same kiel antaŭe, la Albana Partio de Laboro staros ŝultro ĉe ŝultro en unuiĝo kun la granda Komunista Partio de Ĉinio de Maŭ Zedong kaj kun ĉiuj marksism-leninismaj partioj kaj fortoj por plene kontraŭbatali imperiismon estratan de Usono kaj la modernan reviziismon estratan de la gvidanta kliko de Sovetunio, senrezerve subteni la justajn revoluciajn luktojn de la marksism-leninismaj partioj kaj fortoj kaj fari senlaca klopodadon por solidigi kaj plifortigi la unuiĝon de marksism-leninisma movado en kontraŭre-



*Kamarado Kang Seng, ĉefo de la Delegacio de la Komunista Partio de Ĉinio, faras salutparolon kaj legas la gratulan telegramon de Prezidanto Maŭ en la Kvin Kongreso de la Albana Partio de Laboro.*

viziisma batalo kaj de la monda popolo en kontraŭimperiisma batalo. Ĝi kredas ke la venko certe apartenos al marksism-leninismo, socialismo kaj la popoloj de diversaj landoj.

En sia raporto, k-do Shehu severe riproĉis Ĥruŝĉov kaj liajn lakeojn, kiuj rompis la diplomaciajn rilatojn kun Albanio post la 4-a Kongreso de Albana Partio de Laboro, organizis ĉiufankan blokadon, disŝiris ĉiujn interkonsentojn kaj faris diversajn intrigajn agadojn en koluzio kun jugoslavaj reviziistoj, grekaj reakciuloj kaj la 6-a Floto de Usono, intencante ŝanĝi la situacion en Albanio. Sed, diris k-do Shehu, ili ne enkalkulis la potencon de la unuiĝo de nia partio kaj nia popolo kaj nian decidemon ke ni kuraĝas renkonti ĉiajn malfacilojn kaj venki ĉiujn malhelpojn kaj preferas morti ol submetiĝi kaj esti sklavigitaj. La Tria Kvinjara Plano estas venke kaj ĝenerale plenumita.

Rilate al la direktivoj pri la Kvara Kvinjara Plano por la ekonomia kaj kultura disvolviĝo, k-do Shehu diris en la raporto: La ĉefaj taskoj de la Kvara Kvinjara Plano estas: garantii la pluan disvolvon de la produktaj fortoj de nia lando por pli rapide finkonstrui la materian kaj teknikan bazon de socialismo. Por realigi tion estos daŭrigata socialisma industriigo de la lando por pliiĝi la industriajn produkton pere de pli plena utiligo de la nun disponeblaj produktaj kapabloj kaj konstruo

de novaj objektoj; antaŭ ĉio estos koncentritaj la fortoj por pli rapide disvolvi la agrikulturon, precipe la produkton de grenoj, pere de plua intensigo de kulturado. Levi la materian bonstaton kaj kulturen nivelon de la popolo kaj plifortigi la nacidefendan forton surbaze de levo de la socia produktado. En la sama tempo, sur la ĝusta revolucia vojo, pluapase plibonigi la socialismajn produktajn rilatojn por redukti, paŝo post paŝo, la diferencojn inter urbo kaj kamparo, inter laboristoj kaj kamparanoj kaj inter mensa laboro kaj fizika laboro; konduki produnde la socialisman revolucion en la ideologia kaj kultura kampoj; plifortigi la proletan diktaturon kaj la unuiĝon inter la popolo kaj la Partio; konduki akran kaj senkompromisan klasbatalon kontraŭ la en- kaj eksterlandaj malamikoj; kaj senĉese akceli la socialisman revolucion en ĉiuj kampoj.

K-do Shehu diris ke la ĝusta marksism-leninisma gvidado de nia partio estrata de ĝia fondinto kaj gvidanto k-do Enver Hoxha; la ŝtala unuiĝo de nia popolo ĉirkaŭ la Partio; la krea genio, sinforĝesa laboremo, revolucia energio kaj socialisma kaj patriotisma spirito de nia popolo; la senĉesa disvolvado de produktaj fortoj kaj senĉesa plibonigado de la socialismaj produktaj rilatoj; nia proleta diktaturo; kaj la procezo de la monda historio kondukanta al la pereado de imperiismo, entombigo de reviziismo kaj triumfo de marksism-

leninismo — jen estas la garantio, kiu certigas al ni la plenumon de niaj taskoj.

La Kongreso varme diskutis la du raportojn kaj adoptis rezoluciojn pri ili. Rezolucio pri amendoj de la statuto de la Partio estis ankaŭ alprenita.

En la 7-a de novembro, nova Centra Komitato estis elektita. K-do Enver Hoxha estis ree elektita kiel la unua sekretario de la Centra Komitato de la Partio.

Delegacioj kaj observantoj senditaj de 29 komunistaj kaj laboristaj partioj kaj marksism-leninismaj organizoj el diversaj partoj de la mondo partoprenis la Kongreson laŭ la invito de la Albana Partio de Laboro.

La estro de la delegacio de la Komunista Partio de Ĉinio k-do Kang Ŝeng, membro de la Konstanta Komitato de la Politika Buroo kaj sekretario de la Sekretariejo de CK de KPC, voĉlegis en la Kongreso la gratulan telegramon al la 5-a Kongreso de la Albana Partio de Laboro, subskribitan de Kamarado Maŭ Zedong, Prezidanto de Centra Komitato de Komunista Partio de Ĉinio, kaj faris gratulan paroladon. La telegramo de Prezidanto Maŭ Zedong ricevis ekstreme varman akcepton de ĉeestantaj reprezentantoj de la Albana

Partio de Laboro kaj de la frataj partioj kaj marksism-leninismaj organizoj kaj portis al la Kongreso grandan kuraĝigon. La tuta Kongreso plurfoje stariĝis, faris longtempajn, ŝtormajn aplaŭdojn kaj varme kriis “Enver — Maŭ Zedong”, “Vivu k-do Maŭ Zedong!” k. a. sloganojn.

Krom la delegacio de la Komunista Partio de Ĉinio, al la Kongreso faris gratulan paroladon aŭ voĉlegis gratulan telegramon aŭ leteron ankaŭ la Vjetnama Partio de Laboro, Naciliberiga Fronto de Suda Vjetnamio, Korea Laborista Partio, Rumana Komunista Partio, Indonezia Komunista Partio, Komunista Partio de Nov-Zelando, Komunista Partio de Birmo, Malaja Komunista Partio, Belga Komunista Partio k. a.

La Kongreso adoptis rezoluciojn pri apogo al la heroa liberiga batalo de la frata vjetnama popolo kaj subteno al la indoneziaj komunistoj kaj patriotoj.

Sub la ĝusta gvidado de la Albana Partio de Laboro, la albana popolo estas nun venke kaj brave marŝanta antaŭen, per grandaj paŝoj kaj kun alta batalspirito, laŭ la direkto montrita de la 5-a Kongreso de Albana Partio de Laboro!



*La Delegacio de la Komunista Partio de Ĉinio estrata de kamarado Kang Ŝeng, membro de Konstanta Komitato de Politika Buroo de Centra Komitato de la Ĉina Kompartio kaj sekretario de Sekretariejo de CK kaj kamarado Li Hian-nian, membro de Politika Buroo de CK de la Ĉina Kompartio kaj sekretario de Sekretariejo de CK vizitas la Traktor- Maŝinpartan Fabrikon en Tirano.*

# Gratula Telegramo de Kamarado Maŭ Zedong al la Kvina Kongreso de la Albana Partio de Laboro

Al la Kvina Kongreso de la Albana Partio de Laboro

**KARAJ KAMARADOJ:**

La Komunista Partio de Ĉinio kaj la ĉina popolo esprimas siajn plej varmajn gratulojn al la Kvina Kongreso de la Albana Partio de Laboro.

Ni deziras plenplenan sukceson al via kongreso!

La glora Albana Partio de Laboro, estrata de kamarado Enver Hoxha, firme tenas alte la revolucionan ruĝan standardon de marksism-leninismo, en sieĝo de imperiismo kaj moderna reviziismo tavolo post tavolo.

La heroa popola Albanio fariĝis granda brilega lampo de socialismo en Eŭropo.

Kompare kun vi, la reviziisma gvidanta kliko de Sovetunio, la Tito-kliko de Jugoslavio kaj ĉiusecaj klikoj de renegatoj kaj laboristoj-perfiduloj ĉiuj estas nur plenumo da flava tero, dum vi estas altega monto leviĝinta inter nuboj. Ili estas lakeoj kaj kunkrimuloj de imperiismo antaŭ kiu ili surgenuas, dum vi estas sentimaj proletaj revoluciistoj, kiuj kuraĝas batali

kontraŭ imperiismo kaj ĝiaj lakeoj kaj kontraŭ ĉiuj tiranaj malamikoj en la mondo.

Sovetunio, Jugoslavio kaj la landoj, en kiuj moderna reviziisma kliko estas en potenco, jam ŝanĝis aŭ ŝanĝas sian koloron, efektivigis aŭ efektivigas kapitalisman restariĝon kaj ŝanĝis aŭ ŝanĝas la proletan diktaturon en la burĝan. La heroa socialisma Albanio firme kontraŭstaris tiun ĉi kontraŭfluan de kontraŭrevolucia reviziismo. Vi persistas ĉe la revolucia linio de marksism-leninismo, adoptis serion da revoluciaj paŝoj kaj fortikigis la proletan diktaturon. Laŭ la socialisma vojo vi memstare kaj sendepende konstruas vian landon kaj gajnis brilajn venkojn. Vi kontribuis valoran sperton al la historio de la proleta diktaturo.

“Intima amiko trans maro proksimas ja kvazaŭ najbaro.” Kvankam Ĉinio kaj Albanio estas apartigitaj de miloj da montoj kaj dekmiloj da riveroj, tamen niaj koroj estas interligitaj. Ni estas viaj veraj amikoj kaj kamaradoj. Ankaŭ tiaj vi estas la niaj. Ni kaj vi estas nek tiaj falsaj amikoj, kiuj montras mielon sur la lipoj sed en la koro kaŝas ponardon, nek duvizaĝuloj. Nia revolucia batala amikeco jam traspertis la provadon de revolucia ŝtormo.



*Kamarado Enver Hoxha montras la gratulan telegramon kun aŭtografia subskribo de Prezidanto Maŭ al la tuta reprezentantaro en la Kvina Kongreso de la Albana Partio de Laboro post la ricevo.*

La vero de marksism-leninismo estas ĉe nia flanko. La internacia proletaro staras ĉe nia flanko. La subpremataj nacioj kaj subpremataj popoloj staras ĉe nia flanko. Pli ol naŭdek procentoj de la popolamasoj tra la tuta mondo staras ĉe nia flanko. Niaj amikoj troviĝas tra la tuta mondo. Ni ne timas esti izolitaj, kaj absolute ne estos izolitaj. Ni estas nevenkeblaj. Plenmano da kompatindaj mizeruloj, kiuj oponas kontraŭ Ĉinio kaj Albanio, estas destinitaj al fiasko.

Nun ni troviĝas en nova granda epoko de la monda revolucio. La revolucia ŝtormo en Azio, Afriko kaj Latin-ameriko certe donos decidan kaj frakasan baton al la tuta malnova mondo. La granda venko de la naciŝava milito de la vjetnama popolo kontraŭ la usona imperiismo estas konvinka pruvo. La proletaro kaj laboranta popolo de Eŭropo, norda Ameriko kaj Oceanio sin trovas en nova vekigo. La usona imperiismo kaj ĉiuj

aliaj malutilaj insektoj jam preparis al si tombo-fosistojn kaj la tago de ilia enterigo ne estos malproksima.

Kompreneble, la vojo antaŭ ni ne estos rekta kaj glata. Bonvolu kredi, kamaradoj, ke niaj du partioj kaj niaj du popoloj estos ĉiam en unuiĝo kune, ĉiam batalos kune kaj ĉiam venkos kune, kio ajn okazos en la mondo.

La du partioj kaj du popoloj de Ĉinio kaj Albanio, la marksist-leninistoj de la tuta mondo, la revoluciaj popoloj de la tuta mondo unuiĝu kaj faligu imperiismon, modernan reviziismon kaj diverslandajn reakciulojn. Nova mondo sen imperiismo, sen kapitalismo kaj sen sistemo de ekspluatado certe estos konstruita.

## **Maŭ Zedong**

**Prezidanto de la Centra Komitato  
de la Komunista Partio de Ĉinio**

*La 25-an de oktobro 1966*

# Telegramo de K-do Maŭ Zedong al K-do Enver Hoxha

Plej Varma Gratulo Okaze de la 22-a

Datreveno de la Liberiĝo de Albanio

**L**A 28-an de novembro 1966, kamarado Maŭ Zedong, la prezidanto de la Centra Komitato de Komunista Partio de Ĉinio, sendis al kamarado Enver Hoxha, la unua sekretario de la Centra Komitato de Albana Partio de Laboro, telegramon en kiu li esprimis la plej varman gratulon okaze de la 22-a datreveno de la liberiĝo de Albanio. La telegramo tekstas jene:

**Tirano**

**Unua Sekretario de la Centra Komitato de la Albana Partio de Laboro**

**Kamarado Enver Hoxha:**

Okaze de la dudekdua datreveno de la liberiĝo de Albanio, mi esprimas al la Albana Partio de Laboro kaj la albana popolo plej varman gratulon en la nomo de la Komunista Partio de Ĉinio kaj la ĉina popolo.

Sub la korekta gvidado de la Albana Partio de Laboro estrata de vi, la albana popolo akiris brilajn sukcesojn en sia batalo kontraŭ en- kaj ekster-landaj klasaj malamikoj kaj en sia granda afero de socialisma revolucio kaj socialisma konstruado. De malriĉa kaj postiĝinta lando, Albanio jam transformiĝis en socialisman landon kun moderna industrio kaj kolektiva agrokulturo. En la lastaj jaroj, la Albana Partio de Laboro kaj la Albana Registaro alprenis serion da revoluciigaj rimedoj,

plue solidigis sian proletan diktaturon kaj multe akcelis la disvolviĝon de socialisma konstruado. La politikaj taskoj elmetitaj kaj la grandioza programo ellaborita de la Kvina Kongreso de la Albana Partio de Laboro malfermis pli brilajn perspektivojn por socialisma Albanio. La albana popolo plena de memfido heroe marŝas antaŭen laŭ la direkto montrita de la Partio de Laboro.

La Albana Partio de Laboro kaj la albana popolo ĉiam tenas alte la grandan ruĝan standardon de marksism-leninismo, firme oponas la politikojn de agresado kaj milito de la usona imperiismo kaj kondukas pinto-kontraŭ-pintan batalon kontraŭ la moderna reviziismo kun la gvidanta grupo de KPSU kiel ĝia centro. La Albana Partio de Laboro kaj la albana popolo firme subtenas la vjetnaman popolon en ĝia nacisava batalo kontraŭ la usona imperiismo kaj la revoluciajn batalojn de la diversaj popoloj de Azio, Afriko kaj Latinameriko kaj de la tuta mondo. La heroa Albanio estas fortika citadelo kontraŭ imperiismo kaj moderna reviziismo.

La du partioj kaj du popoloj de Ĉinio kaj Albanio cementis sin per profunda revolucia amikeco en socialisma revolucio kaj socialisma konstruado kaj en la batalo kontraŭ imperiismo kaj moderna reviziismo. Tiu amikeco fondita surbaze de la principoj



de marksism-leninismo kaj proleta internaciismo estas eterna kaj nedetruibla. Ni alten tenu kune la grandan ruĝan standardon de marksism-leninismo kaj firme konduku la batalon kontraŭ imperiismo kaj moderna reviziismo kaj la aferon de proleta revolucio ĝis la fino kune kun ĉiuj marksist-leninistoj kaj ĉiuj subpremataj popoloj kaj subpremataj nacioj de la mondo.

Floru por ĉiam la granda amikeco inter la du partioj kaj du popoloj de Ĉinio kaj Albanio!

**Maŭ Zedong**

**Prezidanto de la Centra Komitato  
de la Komunista Partio de Ĉinio**

*La 28-an de novembro 1966*

# **Varma Celebro al Granda Festtago de Liberigo de Albanio**

**E**N la vespero de la 29-a de novembro, 1966, Vasil Nathanaili, albana ambasadoro al Ĉinio, okazigis grandan akceptan kunvenon por varme celebri la 22-an datrevenon de la liberigo de Albanio.

La partiaj kaj la ŝtataj gvidantoj de nia lando Ĝoŭ Enlaj, Kang Ŝeng, Ĉen Ji, k. a. ĉeestis la kunvenon laŭ invito.

En la kunveno, ambasadoro Nathanaili kaj ĉefministro Ĝoŭ Enlaj faris paroladojn kun varmaj laŭdoj pri la revolucia unuiĝo kaj batala amikeco bazitaj sur la principoj de marksism-leninismo kaj proleta internaciismo inter la du partioj, du landoj kaj du popoloj de Ĉinio kaj Albanio. Ili esprimis ke ambaŭ popoloj de Ĉinio kaj Albanio kune tenos alte por ĉiam la revolucian ruĝan standardon de marksism-leninismo kaj kondukos ĝis la fino la batalon kontraŭ la usona imperiismo kaj moderna reviziismo kun la gvidanta grupo de KPSU kiel ĝia centro.

En sia parolado, ĉefministro Ĝoŭ Enlaj varme gratulis en la nomo de Prezidanto Maŭ,

la Komunista Partio de Ĉinio, la Ĉina Registaro kaj la ĉina popolo okaze de la granda festtago de la 22-a datreveno de la liberigo de Albanio, pro la gigantaj atingoj akiritaj de la albana popolo en socialisma revolucio kaj socialisma konstruado kaj pro plena sukceso de la Kvina Kongreso de la Albana Partio de Laboro.

La akceptan kunvenon ĉeestis la delegacio de la Albanio-Ĉinia Amikeca Asocio estrata de Petro Dode kaj la Komerca Delegacio de la Albana Registaro estrata de Kico Ngjela.

Krome, ĉeestis invitite la kunvenon respondeculoj de diversaj departementoj de CK de KPĈ kaj la Ĉina Registaro, respondeculoj de la Ĉina Popola Liberiga Armeo, de la Tutlanda Komitato de la Politika Interkonsiliĝa Konferenco kaj de diversaj popolaj organizaĵoj.

Ankaŭ diplomatiaj senditoj de diversaj landoj al Ĉinio ĉeestis la akceptan kunvenon laŭ invito.

# Tutmondaj Popoloj

## Amegas Prezidanton

Prezidanto Maŭ, nia granda instruanto, granda gvidanto, granda ĉefkomandanto kaj granda direktilisto, estas la plej granda marksist-leninisto en nuntempo. Prezidanto Maŭ genie, kreive kaj plene heredis, defendis kaj disvolvis marksism-leninism, kaj levis ĝin al tute nova stadio.

Prezidanto Maŭ reprezentas la fundamentajn interesojn de la proletaro kaj laborularo en la tuta mondo, staras ĉe la plej antaŭa vico de la nuna epoko kaj montras al la tutmondaj popoloj la vojon al venko.

Per sia plej kora sento kaj plej bela lingvo la popoloj de diversaj landoj de la mondo huraas kaj salutas al Prezidanto Maŭ. Ili diras: “Prezidanto Maŭ estas la granda gvidanto kaj instruanto de ĉiuj popoloj”, “Prezidanto Maŭ estas la ruĝa suno leviĝanta el la oriento”, “Maŭ Zedong estas la granda direktilisto de la ŝipo de la monda revolucio”, “Prezidanto Maŭ estas la fonto de la spirita forto por la ĉina popolo kaj la revoluciaj popoloj de la mondo”. Ili esprimas, ke ili por ĉiam estos fidelaj al Prezidanto Maŭ, kvazaŭ la sunfloro al la suno, kaj persiste iros la vojon de Maŭ Zedong.

*Studentoj de partia lernejo “Lenin” en Albanio serioze studas verkojn de Prezidanto Maŭ.*



# Maŭ


## Gloro Apartenas al Maŭ Zedong

Iu loĝanto en Ĉeĥoslovakio antaŭ nelonge skribis kun entuziasmo en sia letero al Prezidanto Maŭ: “Kun kreivaj sukcesoj vi disvolvis pluapŝe la progresintan ideologion de la proletaro, mizeruloj kaj subprematoj en la tuta mondo. Vi fariĝis gvidanto de la proleta revolucio rekonata de la publiko en la mondo.” Unu laboristo diris el sia koro: “Vere, mi volas viziti Ĉinion por vidi propraokule kamaradon Maŭ Zedong, kaj diri persone al li, ke ĉiuj laboristoj en Ĉeĥoslovakio, kia mi, lin amegas kaj subtenas. Ni deziras al li sanon en ĉiu tempo kaj longan vivon. Tio estas feliĉo por la laboranta popolo de la mondo.”

Iu maljuna laboristo en Germana Demokratia Respubliko diris: “Maŭ Zedong estas komunisma gvidanto de la nuna epoko, li estas estimata kaj amata de la popolo. Ĉiuj revolucioj devas studi la verkojn de Maŭ Zedong.”

“La penso de Maŭ Zedong estas la kulmino de marksism-leninismo en nuntempo.” diris iu kamparano.

“Maŭ Zedong firme tenas kaj disvolvas la veran marksism-leninismen, kaj estas la plej granda marksist-leninisto de la nuna tempo. La penso de Maŭ Zedong reprezentas la interesojn de la proletaro kaj la revoluciaj popoloj



*Membroj de la 15-a filio de la “Tutlanda Revolucia Movado” de Kongo-lando (B.) estas absorbitaj en la legado de verko de Prezidanto Maŭ.*

de la mondo, kaj tial ĝi povas kuraĝigi kaj gvidi la popolojn marŝi antaŭen.” diris unu funkciulo.

Laŭdante la penson de Maŭ Zedong, iu universitata studento opiniis: “La respondojn al la problemoj leviĝintaj nuntempe en la monda revolucio, oni povas trovi nur en la verkoj de kamarado Maŭ Zedong.”

Unu kultura laboranto en Hungario diris: “Mi opinias, ke la penso de Maŭ Zedong estas ne nur korekta en Ĉinio, sed ankaŭ taŭga por la tuta mondo.”

Iu emerita laboristo diris: “Maŭ Zedong estas Lenin la dua. La reviziismo en Sovetunio atakis kamaradon Maŭ Zedong pro tio, ke

li gvidas la ĉinan popolon fari la mondan revolucion. Ĉu estas ankaŭ krimo konduki la mondan revolucion!”

“La Komunista Partio de Ĉinio estas vera marksism-leninisma partio, nun ni metas nian esperon sur Ĉinion.” diris unu teknikisto.

Unu malnova membro de la **Pola Unueca Laborista Partio** asertis ke “kamarado Maŭ Zedong estas granda gvidanto kaj ĉefkomandanto de la internacia komunisma movado kaj de la popoloj de la tuta mondo.” Li aldonis: “Kiam ni pensas pri la ekzisto de la Komunista Partio de Ĉinio kaj kamarado

*Amikoj de Somalio (“franca”) kaj Malio  
aĉetas verkojn de Prezidanto Maŭ*



Maŭ Zedong en la mondo, ni malnovaj komunistoj tuj fariĝas esperplenaj kaj kredas firme, ke la komunismo certe rompos ĉiujn malfacilojn kaj fine gajnos plenan venkon en la tuta mondo.”

En **Bulgario**, ĉie aŭdiĝis esprimoj de amo kaj respekto, kiujn la laboranta popolo faris por Prezidanto Maŭ. Iu emerita laboristo diris: “Maŭ Zedong estas la nuntempa Marks kaj Lenin, la Komunista Partio de Ĉinio estas la avangardo de la monda laborista klaso.” Unu malnova membro de la komunista partio diris fiere: “Mi estas partiano de Maŭ Zedong, ĉar la Komunista Partio de Ĉinio estas vera marksism-leninisma partio.” Iu universitata studento diris: “Elektante la vojon de Ĉinio, la socio disvolviĝos antaŭen, alie ĝi retroiros.”

## La Verkaro de Prezidanto Maŭ Apartenas al Monda Proletaro

Iu ŝipestro de **Grekio** diris: “Maŭ Zedong estas ne nur revolucia teoriisto, sed ankaŭ granda praktikisto. Eŭropanoj ne kapablas kompreni kiom granda kaj kiom forta estas Maŭ Zedong. Li povas ŝanĝi, en mallonga tempo, malriĉan landon en la novan Ĉinion riĉan kaj potencon, li povas unuecigi la 700-milionan loĝantaron en popolon de unu ideo, unu volo kaj unu ago. Ĉiu lando en Azio, Afriko kaj Latinameriko, kiu lernas la teorion de Maŭ Zedong kaj faras revolucion laŭ ĝi, povas gajni venkon. Ankaŭ ni bezonas Maŭ Zedong, se niaj eŭropaj landoj volas esti en pli bona stato. Sen kompreni la penson de Maŭ Zedong, oni neniel povas kompreni la mondon hodiaŭan; tiuj, kiuj klopodas akiri scion, devas legi la verkojn de Maŭ Zedong.”

Ueniŝi de **Japanio** diris: “Kiom da laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj estas en vasta Ĉinio, kiuj ĉiutage kaj ĉiuhore, absorbite kaj atenteme studas la penson de Maŭ Zedong kaj aplikas ĝin en la praktiko. La kaŭzo, kial Ĉinio estas potenca kaj esperplena, kuŝas en tio ĉi. Mi estas certa, ke kia ajn reakciulo de nun aperos en Ĉinio, ĝi absolute ne ŝanĝos sian koloron, se ĝia popolo nur armos sin per la penso de Maŭ Zedong. Kiam mi legis pri tiaj noblaj kaj grandaj homoj, kiaj Lej Feng, Vang Gie, Giaŭ Julu k. a. kiuj studis la penson



*Jemenaj laboruloj ĝojas pro tio, ke ili akiris la verkon de Prezidanto Maŭ.*

de Maŭ Zedong kaj aplikis ĝin en la praktiko, mi sentis min sango-bolanta en la tuta korpo. Kiam mi pensis pri Daĝaj-anoj kaj Daking-anoj, bonaj gefiloj de Prezidanto Maŭ, sin donantaj al la socialisma konstruado, mi estis tiel kortuŝita, ke larmoj fluis el miaj okuloj.”

Ndana de **Malio** diris: “Por aktive partopreni la batalon kontraŭ imperiismo, malebligi kaj frakasi la renversan intrigon, kiun la koloniismo kaj imperiismo kondukas sur nia tero de Afriko, ni ege bezonas la pensojn de Marks, Lenin kaj Maŭ Zedong. La problemoj tuŝitaj de tiuj pensoj estas ofte la samaj problemoj niaj. Ili helpas nin por batali.

“Dank’ al kelkaj artikoloj de Maŭ Zedong nun mi faras memedukon. Mi bezonas la penson de Maŭ Zedong, ĉar ĝi estas plej ĝusta, plej efika gvido por oponi kontraŭ la koloniismo, kapitalismo kaj imperiismo.”

Delstein de **Ĉilio** diris: “La verkoj de Maŭ Zedong, por nia Latinameriko, havas netakseblan valoron. La popoloj de Latinameriko

nun vekigantaj jam komencis frakasi la kateojn, fiksitajn de kapitalismo kaj imperiismo al ili, tial ni urĝe bezonas tiujn klasikajn verkojn, por ke ni, kiuj havas klaran konscion pri la revolucio, povu legi ilin.”

Philips de **Anglio** diris: “Mi estas adoranto de Prezidanto Maŭ Zedong. Mi deziregas akiri la verkojn de Prezidanto Maŭ, mi sentas ke liaj verkoj kuraĝigas kaj helpas min.

“Vere, vi povas senti vin fieraj, ĉar vi povas studi la verkojn de Prezidanto Maŭ. Sed, nepre ne forgesu, ke la verkoj de Prezidanto Maŭ apartenas ne nur al ĉina popolo, sed ankaŭ al la proletaro de la tuta mondo, inkluzive de nia lando. Prezidanto Maŭ estas la savanto de la laborista klaso.”

Mirsasad de **Irano** diris: “Plej bona estas la vojo irita de ĉinoj. Mi estas studanto de kemio, studi kemion ne povas savi landon, tion ni povas nur per legado de la verkoj de Maŭ Zedong. Tiel ni bezonas la *Elektitajn Verkojn de Maŭ Zedong*, kiel ni bezonas panojn ĉiutage.”



*Afrikaj amikoj venis trans maroj al la naskiĝloko de Prezidanto Maŭ kaj interŝanĝis spertojn kun la aktivaj studentoj de la verkoj de Prezidanto Maŭ de Hunan-provinco. Oni prezentis al ili verkojn de Prezidanto Maŭ.*

Unu laboristo de **Portugaliao** diris: “Mi amas la verkojn de Maŭ Zedong, ĉar ili instigas nin aktive kaj fervore partopreni batalon, kompreni la grandan signifon de batalo. Tiuj verkoj estas bonegaj. Niaj laboristaj kamaraĵoj, same kiel mi, bezonas uzi ilin por eduki sin mem. Mia plej granda deziro estas, per la verkoj de Maŭ Zedong, helpi min kompreni la veron.”

Phan Dinh de **Vjetnamio** diris: “Ĉiumatene, kiam mi legas materialon pri Ĉinio, kutime mi direktas mian rigardon al la Pacifiko. Ĉiun tagon, de tie leviĝas la suno, vidante la leviĝantan sunon, mi ekpensas pri Prezidanto Maŭ, pri la laŭdkanto *Ruĝas la Oriento*.

“La vjetnama popolo ofte parolis pri la penso de Maŭ Zedong. Kiam mi estis ankoraŭ juna lernanto, mia instruisto diris, ke la penso de Maŭ Zedong estas tre granda, 650-miliona ĉina popolo sin unuigis en unu tuton kun Maŭ Zedong ĉe la kulmino, brile radiantan kaj nevenkeblan en la mondo. Tiam mi portis senliman admiron en mia koro de infano.

Lecionoj pri historio al ni diris, ke neniam, antaŭ la epoko de Maŭ Zedong, estis Ĉinio unuiginta. Nun mi komprenis kio estas la penso de Maŭ Zedong. Ĉu la nomo de Maŭ Zedong ne estas sinonima kun ‘ruĝas la oriento’? Tiel ja estas.”

### Prezidanto Maŭ Estas kun Ni

En akcepta kunveno de la ĉina ambasadorejo en Vjetnamio, unu batalanto el la Sudo posteninta en la Nordo de **Vjetnamio** portis surbruste medalon kun portreto de Prezidanto Maŭ, kaj petis ankaŭ foton de li en armeana uniformo, staranta sur la pordego de Tiananmen. Rigardante al la foto, li diris kun ekscito: “Prezidanto Maŭ estas kun la ĉina popolo, kaj ankaŭ por ĉiam kun ni vjetnama popolo. Prezidanto Maŭ vestita en uniformo multe kuraĝigis nian popolon de Vjetnamio. Ni nepre devas efektiviĝi la sanktan alvokon de Prezidanto Ho: firme teni la pafilon, lukti ĝis la fino, por kompleta triumfo de naciŝava batalo kontraŭ la usona agresado!”



dencon de historio neniu povas. Ni devas ĉiam propagandi la progreson kaj brilan estonton de la mondo al la popolo, por ke la popolo ekhavu la fidon por venko.” Post legado, ĉiuj ne povis sin deteni de larmo kaj fine diris adiaŭon al la akompanantaj ĉinaj amikoj.

## Saluton al Prezidanto Maŭ

Olayi Lambert, instruisto de elementa lernejo el **Kongolando (B.)** verkis poemon kiel omaĝon al Prezidanto Maŭ, la granda revolucia gvidanto en la nuna epoko, kiu tekstas jene:

*Ha! Estas li, Prezidanto Maŭ, la plej eminenta batalanto kontraŭ la imperiismo kaj koloniismo nova kaj malnova,*

*Ha! Estas li, vera heredanto de Marks kaj Lenin, granda defendanto de monda paco kaj libero,*

*Ha! Estas li, amiko de malriĉuloj, bonega filo de popolo,*

*Ha! Estas li, Prezidanto Maŭ, fonto de forto de ĉiuj subpremataj popoloj, lia granda penso estas plej potenca kaj plej fidinda armilo en nuntempo,*

*Ha! Prezidanto Maŭ, vi vivas por servi al la popoloj de tuta mondo, vi estas ilia bonega servanto plej fidela kaj plej memkonscia,*

*Ha! Prezidanto Maŭ, vi estas unika en mia koro, vi estas ne nur la granda filozofo de nia epoko, sed ankaŭ la granda batalanto en la historio de revolucio de nia tempo,*

*Ha! granda Maŭ Zedong, granda genio, giganto kiu tremigas kaj konsternas la usonan imperiismon,*

*Ha! plej plej granda homo, gloron al vi! Feliĉon al vi mi deziras, longan longan vivon al vi!*

*Japanaj geamikoj aĉetas japanlingvan eldonon de “Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong” en la Ekonomia kaj Komerca Ekspozicio de Ĉinio okazanta en Kiuŝuo.*





# “Cititaj Vortoj de Prezidanto Maŭ” en Japanio



Cititaj Vortoj de Maŭ Zedong eldoniĝis en Japanio.

**L**ASTATEMPE, la japanlingvaj tradukoj de *Cititaj Vortoj de Maŭ Zedong* kaj *Cititaj Vortoj de Prezidanto Maŭ* sinsekve aperis en Japanio kaj trovas varman akcepton ĉe japanaj amikoj. La unuan tradukis kaj eldonis la Studa Societo pri la *Cititaj Vortoj de Maŭ Zedong*, organizita de la amikoj de la Japana Socialista Partio, kiuj vizitis Ĉinion somere de la jaro 1966, kaj la duan presigis kaj eldonis Ĉina Librejo en Tokio.

Ambaŭ libroj havas ruĝan kovrilon, kaj tiu de la *Cititaj Vortoj de Prezidanto Maŭ* estas el ruĝa plasto. Sur la frontispico de ambaŭ libroj estas portreto de Prezidanto Maŭ, la granda gvidanto de la ĉina popolo, kaj post ĝi surskribaĵo de lia intima batalamiko kamarado Lin Biaŭ: “Legu la verkojn de Pre-

zidanto Maŭ, aŭskultu la vortojn de Prezidanto Maŭ kaj sekvu la instrukciojn de Prezidanto Maŭ.” La *Cititaj Vortoj de Maŭ Zedong*, japanlingva eldono, portas ankaŭ la portreton de kamarado Lin Biaŭ.

En la *Cititaj Vortoj de Maŭ Zedong*, niaj japanaj amikoj de la nomita Studa Societo rimarkigis: “Kvazaŭ astro dissendanta brilegajn lumradiojn, la penso de Maŭ Zedong hodiaŭ lumigas la tutan mondon.”

En kelkaj mallongaj tagoj post eliro de la *Cititaj Vortoj de Maŭ Zedong*, 50,000 ekzempleroj de ĝia unua eldono jam elĉerpiĝis pro la mendoj faritaj de miloj da librejoj. Unu plej granda librejo en Tokio dufoje faris mendon en tri tagoj, kaj ĉiuj ekzempleroj estis konkure aĉetitaj de la klientoj. Nun,

legantoj el diversaj lokoj, escepte de Tokio, Osaka, Kitakjuŝu kaj aliaj grandaj urboj, superŝutis la eldonejon en Tokio per mendoj kaj konsentis mem pagi la sendkoston.

Kiam la *Cititaj Vortoj de Prezidanto Maŭ*, japanlingva eldono, estis ekvendata en Nagoja, jam en la unua tago forvendiĝis pli ol 2500 ekzempleroj sole en la Ĉina Ekonomia Ekspozicio. Unu respondeculo de la Ĉina Librejo,

Tokio, diris ke tio neniam okazis en Japanio, ke unu libro vendiĝis je tiom da ekzempleroj en unu loko kaj unu tago. Tio montras, kiom multe la japana popolo bezonas la penson de Maŭ Zedong. Iuj legantoj, kiuj ĵus aĉetis la libron *Cititaj Vortoj de Maŭ Zedong*, diris: Jam de longe ni deziris legi ĉi tiun libron. Same kiel la revolucia amaso de Ĉinio, ankaŭ ni ĉiam ĝin portos kun ni, kaj ĝin studos bone kaj ĉiutage.

# Vjetnamio Triafoje Eldonis la Libron "Poemoj de Prezidanto Maŭ"

**P**OEMOJ de Prezidanto Maŭ triafoje aperis lastatempe en Hanojo, en vjetnamlingva traduko.

La libro estas tradukita el la ĉina lingvo kaj eldonita de la Vjetnama Literatura Eldonejo. Ĝi entenas 37 poemojn de Prezidanto Maŭ. En la frontispico estas surprisita la plenkorpora portreto de la granda gvidanto de la ĉina popolo Prezidanto Maŭ.

Al la libro aldoniĝis la artikolo "La Ideologia kaj Arta Karaktero de la Poemoj de Prezidanto Maŭ" verkita de Dang Thai Mai, prezidanto de la Federacio de Literaturistoj kaj Artistoj de Vjetnamio.






La artikolo montras ke la poemoj de Prezidanto Maŭ manifestas la mondan koncepton de firma revolucia batalanto, elstara marksisma teoriisto kaj saĝa gvidanto de Ĉinio kaj la mondo.

Ĝi diras ke en ĉiuj poemoj kaj teoriaj artikoloj de Prezidanto Maŭ penetriĝas revolucia spirito kontraŭ la en- kaj eksterlandaj reakciuloj, spirito de sentimo antaŭ ĉia ajn danĝero, de senkompromiso en la batalo kontraŭ la malamiko, kaj de ĉiama fideleco al la revolucia spirito de marksism-leninismo kaj proleta internaciismo.

Ĝi plue diras ke tio, kion la legantoj devas lerni de la verkoj de Prezidanto Maŭ, antaŭ ĉio estas ilia revolucia enhavo.



*Juri esti novaj "malsaĝaj avoj" de la nuna tempo.*




# *Eksterlandaj Amikoj Laŭdas Nian Grandan Kulturan Revolucion*

*La raportkunveno varme laŭdanta pri la granda proleta kultura revolucio de Ĉinio okazigata en Parizo de la Komunisma Movado (Marksism-Leninisma) de Francio*



*Rumanaj studentoj kaj studentoj de Azio, Afriko kaj Latinameriko en Rumanio rigardas bildojn pri la akcepto de junaj ruĝaj gvardianoj fare de Prezidanto Maŭ.*



## **Ĉinio Estas Lumturo de la Monda Revolucio**

Antaŭ nelonge, la Komunisma Movado (Marksism-Leninisma) de Francio okazigis en Parizo raport-kunvenon pri la granda proleta kultura revolucio de Ĉinio. Tri personoj, kiuj vizitis Ĉinion antaŭ nelonge, raportis en la kunveno.


Super la podio pendis portretoj de Marks, Engels, Lenin, Stalin kaj Maŭ Zedong kaj rubandego kun la skribaĵo “Vivu la granda proleta kultura revolucio de Ĉinio! Vivu la penso de Maŭ Zedong!” En la flugfolio disdonata okaze de la kunveno estas skribite: “La granda kultura revolucio ne nur estas la afero de Ĉinio. Same kiel la Pariza Komunumo, la Oktobra Revolucio... ĝi estas ankaŭ nedividebla parto de la proleta revolucio de la tuta mondo. La kultura revolucio de Ĉinio disvolvas la atingojn akiritajn de la progresema homaro.”

Iu amiko, kiu plurfoje vizitis Ĉinion, montris en sia parolado, ke la granda kultura revolucio de Ĉinio estas grava batalo. Reviziismaj elementoj vane provas ŝanĝi la direkton de la revolucio de Ĉinio kaj la granda kultura revolucio ĝuste celas frakasi ilian intencon. Defendo de la direkto de la revolucio de Ĉinio

estas ankaŭ defendo de la direkto de la monda revolucio, ĉar la unua estas la lumturo de la lasta.

## **Nun Troviĝas Rimedo por Preventi Reviziismon**

La sekretario de CK de la Komunista Partio de Belgio Griba varme laŭdis la grandan proletan kulturen revolucion de Ĉinio en iu studenta mitingo, okazinta en Bruselo antaŭ nelonge. En sia parolado Griba diris: “Kamarado Maŭ Zedong kreive disvolvis la penson de marksism-leninismo. Surbaze ĉefe de la sperto de Sovetunio li ĝuste analizis la lecionojn de proleta revolucio kaj proleta diktaturo, montrante kial la klasa batalo ankoraŭ ekzistas kaj ne estingiĝis post la kupto de la ŝtatpotenco. Tio estas la nova merito de kamarado Maŭ Zedong.” Kaj li aldonis: “la granda proleta kultura revolucio donas sufiĉan instruon al ni... En Ĉinio oni antaŭenpuŝas unu paŝon plian la socialisman revolucion kaj kondukos ĝin ĝis la fino. Por ni tio estas granda ekzemplo kaj granda kuraĝigo.” Griba montris cetere, ke venko de la granda proleta kultura revolucio de Ĉinio ja estas venko de la proleta revolucio de la mondo. La venko de la kultura revolucio montras, ke reviziismo same kiel imperiismo, al kiu



*Alĝeriaj junuloj avide rigardas bildojn pri la granda proleta kultura revolucio de nia lando.*

ĝi servas, estas nur papera tigro. Nun troviĝas jam rimedo por preventi ĝin.

## **Ĉinio — Fonto de la Monda Revolucio**

Iu iraka artisto diris: “La fonto de la monda revolucio nun estas Ĉinio. La granda proleta kultura revolucio de Ĉinio helpas la homojn forlasi la burĝan ideologion kaj starigi la proletan. Ĝi estas la plej ĝusta, plej laŭtempa kaj vera revolucio. Ĝi estas bonega afero. La imperiistoj, reviziistoj kaj reakciuloj distordas kaj kalumnias la grandan revolucion, sed ili ne povos difekti ĝian brilecon.”

La respondeculo de iu amasa organizaĵo de Kamboĝo diris, ke la granda proleta kultura revolucio de Ĉinio “estas granda revolucia amasa movado, kiu preventos la aperon de reviziismo kaj restariĝon de kapitalismo”. Li asertis, ke la granda proleta kultura revolucio kondukata de la ĉina popolo sub la direkto de la penso de Maŭ Zedong estas senprecedenca en la monda historio kaj granda iniciataĵo.

La pakistana verkisto Hamid Ali diris: “La granda proleta kultura revolucio de Ĉinio estas granda venko de la penso de Maŭ Zedong.” Li diris ke sub la gvido de Prezidanto Maŭ Zedong, la ĉina popolo alte levas la standardon de la granda proleta kultura revolucio

kaj faris grandan kontribuon al la komunisma movado de la mondo. Maŭ Zedong defendas la estontecon de la monda revolucio.

## **Nova Leviĝo de la Krea Povo de la Ĉina Popolo**

La 5-an de oktobro, 1966, la semajna gazeto *Popola Voĉo*, organo de la Novzelanda Komunista Partio, publikigis artikolon, en kiu ĝi montras, ke la granda proleta kultura revolucio de Ĉinio havas tre gravan signifon por la ĉina popolo kaj la popolo de la tuta mondo. Ĝi frapis la funebran sonorilon por la espero de imperiismo kaj reviziismo pri restarigo de kapitalismo en Ĉinio per paca aŭ alia maniero. La artikolo diras, ke en la pasintaj 17 jaroj, la grandaj atingoj de la ĉina popolo estas akiritaj “sub la gvido de la Komunista Partio de Ĉinio kaj la granda marksism-leninisma pensulo kaj revoluciulo Prezidanto Maŭ. Hodiaŭ, apas nova leviĝo de la krea povo de la ĉina popolo sub la stimulo de la granda kultura revolucio, persone gvidata de Prezidanto Maŭ mem.”

## **Granda Profunda Revolucio kun Historia Signifo**

Iu kamboĝa amiko diris al raportisto de Hinhua-novajagentejo: Nuntempe, la granda



*Hanoj-anoj rigardas sur trotuaro la bildojn kiuj montras Prezidanton Maŭ kaj la milionan armeon de kultura revolucio.*



*Gvajanaj amikoj en Londono ĝoje rigardas bildojn pri la granda kultura revolucio de nia lando.*


proleta kultura revolucio entreprenata de la ĉina popolo sub la persona iniciato kaj gvido de ilia granda kaj saĝa gvidanto Prezidanto Maŭ Zedong estas granda profunda revolucio kun historia signifo. Ke tiu ĉi senprecedenca revolucio povas esti kondukata en Ĉinio, oni dankas tion al la gvido de la penso de Maŭ Zedong. La penso de Maŭ Zedong estas la

plej granda kaj plej ĝusta penso en la nuna epoko, pruvita de la praktikado.

Li diris, ke la granda proleta kultura revolucio de Ĉinio certigas, ke “la socialisma socio de Ĉinio neniam ŝanĝos sian koloron”. La granda proleta kultura revolucio en Ĉinio estas ankaŭ forta subteno al la aliaj popoloj, kiuj oponas kontraŭ imperiismo, ĉar la granda Ĉinio estas ilia solida apogilo.




*Nov-Zelanda amiko ĝoje interparolas kun ĉinaj ruĝaj gegvardianoj.*



*D-ro Sun Jatsen, granda antaŭ-  
irinto de la demokratia revolucio.*

# Dek Mil Personoj Kunvenis en Pekino Okaze de la Centa Datreveno de Naskiĝo de Sun Jatsen

*Revolucia amaso kaj  
ruĝa gvardio de Pekino  
nombrantaj pli ol dek-  
mil personojn okazigas  
grandan kunvenon re-  
memore al la 100-a  
datreveno de la naskiĝo  
de D-ro Sun Jatsen.*





Ni plenumis la demokratian revolucion, kiun postlasis ne plenumitan D-ro Sun, kaj disvolvis tiun revolucion en la socialisman. Ni estas plenumantaj tiun ĉi revolucion.

Ĉiuj aferoj ĉiam disvolviĝas. Forpasis ĝis nun nur 45 jaroj de post la Revolucio de 1911, sed la fizionomio de Ĉinio tute ŝanĝiĝis. Post aliaj 45 jaroj, t. e., en la jaro 2001, aŭ ĉe la eniro en la 21-an jarcenton, la fizionomio de Ĉinio ankoraŭ pli multe ŝanĝiĝos. Ĉinio fariĝos potenca socialisma industria lando. Ĉinio devas esti tia, ĉar Ĉinio estas lando kun teritorio de 9,600,000 kvadrataj kilometroj kaj loĝantaro de 600 milionoj, ĝi devas fari kompare pli grandan kontribuon al la homaro . . . .

## Maŭ Zedong

*Rememore al D-ro Sun Jatsen  
(1956)*



En la 12-a de novembro 1966, la revolucia amaso kaj ruĝaj gvardianoj de Pekino en nombro de pli ol 10,000 okazigis grandan kunvenon en la Popola Halo por solene celebri la 100-an datrevenon de la naskiĝo de la granda revolucia antaŭirinto D-ro Sun Jatsen.

Dum la periodo de 100 jaroj okazis mondska ŝanĝo en Ĉinio, kiu turniĝis jam de duonfeŭda kaj duonkolonia lando en potenca lando socialisman.

Dum la periodo de 100 jaroj, por oponi feŭdismon kaj imperiismon, la ĉina popolo faris revoluciajn batalojn, unuj sekvante aliajn kaj sub ekstreme malfacilaj kondiĉoj. La Revolucio de 1911, kiun gvidis D-ro Sun Jatsen, havas grandan historian signifon. Kvankam tiu ĉi revolucio ne plenumis la kontraŭimperiisman kaj kontraŭfeŭdisman taskon de demokratia revolucio, tamen ĝi metis finon al la feŭda monarkia reĝimo, kiu daŭris pli ol 2,000 jarojn en Ĉinio, kaj alte levis la demokratian spiriton. D-ro Sun Jatsen plenumis monumentan meritplenan servon. Kiel la standardportanto de la demokratoj en la ĉina revolucio li faris nepacigeblan batalon kontraŭ la tiutempaj reformistoj reprezentataj de Kang Joŭvej kaj Liang Kiĉaŭ dum la prepara periodo de la demokratia revolucio. En siaj lastaj vivjaroj li kunlaboris kun la Komunista Partio de Ĉinio, faris novan eksplikon pri siaj Tri Popolaj Principoj kaj disvolvis la malnovajn Tri Popolajn Principojn en la novajn.

Ĝoŭ Enlaj, Song Kingling, He Hiangning k. a. faris longajn paroladojn dum la kunveno. Seimin Mijazaki, ĉefdirektoro de la Japan-ĉina Amikeca Asocio, estis invitita paroli en la kunveno.

Ĉeestis la celebran kunvenon multaj fremdlandaj amikoj en Pekino, diplomaciaj reprezentantoj de diversaj landoj al Ĉinio, kaj personoj el Hongkong kaj Aŭmen kaj reprezentantoj de elmigrintaj ĉinoj, kiuj estis invititaj al Pekino por partopreni la celebrajn agadojn, kaj ankaŭ Morris Cohen kaj Ma Hiang, antaŭe adjutanto kaj gvardiano de D-ro Sun Jatsen.

# Parolado en la Jubilea Kunveno de D-ro Sun

Ĝoŭ Enlaj

# Centajara de Naskiĝo Jatsen



*Ĉefministro Ĝoŭ Enlaj paroladas en la memorkunveno.*

**H**ODIAŬ estas la centa datreveno de la naskiĝo de D-ro Sun Jatsen.

En la naŭdeka datreveno de la naskiĝo de D-ro Sun Jatsen, nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ skribis la faman artikolon “Rememore al Doktoro Sun Jatsen”, en kiu li alte taksis la revolucion, batalan vivon de D-ro Sun Jatsen. Prezidanto Maŭ diris:

*Ni rememoru la grandan revolucion antaŭirinton D-ron Sun Jatsen!*

*Ni rememoru, ke dum la periodo de preparo de la ĉina demokratia revolucio li akre batalis kontraŭ la ĉinaj reformistoj sur la klara pozicio de ĉinaj revoluciaj demokratoj. En tiu ĉi batalo li estis la standardportanto de la ĉinaj revoluciaj demokratoj.*

*Ni rememoru liajn meritplenajn farojn kaj grandajn kontribuojn en la periodo de Revolucio de 1911, dum kiu li gvidis la po-*

*polon faligi la monarkion kaj starigi respublikon.*

*Ni rememoru liajn meritplenajn farojn kaj grandajn kontribuojn en la periodo de la unua kunlaborado inter Kuomintango kaj Kompartio, dum kiu li disvolvis la malnovajn Tri Popolajn Principojn en novajn Tri Popolajn Principojn.*

*En la sfero de politika ideologio li heredigis al ni multajn utilaĵojn.*

*Escepte la plenmanon da reakciuloj, la ĉinoj de nia tempo ĉiuj estas heredantoj de la revolucia afero de D-ro Sun Jatsen.*

Estis batalo inter du politikaj linioj en la prepara periodo de la ĉina demokratia revolucio, nome, la linio de la revoluciaj demokratoj reprezentata de D-ro Sun Jatsen kaj la linio de la reformistoj reprezentata de Kang Joŭvej kaj Liang Kiĉaŭ.

Elirante el la starpunkto de revoluciaj demokratoj, D-ro Sun Jatsen pledis por faligo de la

registaro de King-dinastio kaj starigo de demokratia respubliko pere de revoluciaj rimedoj. Tute male, starante sur la pozicio de reformistoj, Kang Joŭvej oponis kontraŭ tuŝado de la bazaj intereso de imperiestra regado de King-dinastio, opoziciis kaj subfosis la revolucion. Sub la gvido de D-ro Sun Jatsen, la revoluciuloj lanĉis grandan polemikon kontraŭ la reformistoj, preparante la ideologion por la Revolucio de 1911.

La Revolucio de 1911 gvidata de D-ro Sun Jatsen havis grandan historian signifon. Tiu ĉi revolucio kvankam ne plenumis la taskon de demokratia revolucio kontraŭ imperiismo kaj feŭdismo, tamen metis finon al la feŭdisma monarkio ekzistinta pli ol du mil jarojn en Ĉinio, kaj akcelis la leviĝon de demokratia spirito. La ĉina popolo por ĉiam memoros la rolon luditan de D-ro Sun Jatsen en tiu ĉi revolucio.

En la jardeko post la Revolucio de 1911, D-ro Sun Jatsen travivis longan periodon de elreviĝo, ĉagreno kaj cerbumado. La fruktoj de la Revolucio de 1911 estis uzurpitaj de la fortoj de grandaj bienuloj kaj grandaj kompradoroj reprezentataj de Juan Ŝikaj. Denove leviĝis la reakcia kontraŭfluo. Ĉinio statis pli malbone tagon post tago. En malesperiĝo, D-ro Sun Jatsen renkontiĝis kun la granda Oktobra Revolucio gvidata de Lenin kaj la Komunista Partio de Ĉinio fondita kaj reprezentata de kamarado Maŭ Zedong, kaj okazis al li la plej granda turniĝo en lia tuta vivo.

Spite al kontraŭstaro de la obstinuloj interne de Kuomintango, D-ro Sun Jatsen firme praktikis la tri grandajn politikojn ligiĝi kun la Soveta Rusio de Lenin kaj Stalin, kunlabori kun la Komunista Partio de Ĉinio kaj helpi al la kamparanoj kaj laboristoj. Li kunlaboris kun la Komunista Partio de Ĉinio kaj reeksplikis siajn Tri Popolajn Principojn. Prezidanto Maŭ diris:

*D-ro Sun Jatsen estas granda, ne nur ĉar li gvidis la grandan Revolucion de 1911 (kvankam demokratian revolucion de malnova tempo), sed ankaŭ ĉar li povis "akomodi sin al la fluo de la mondo kaj respondi al la postuloj de la amasoj", elmetis la tri grandajn revoluciajn politikojn de ligiĝo*

*kun Rusio, kunlaboro kun Kompartio kaj helpo al la kamparanoj kaj laboristoj, faris novan eksplikon pri la Tri Popolaj Principoj, kaj starigis novajn Tri Popolajn Principojn de la tri grandaj politikoj.*

Kiel granda revoluciulo de la periodo de la burĝa demokratia revolucio en Ĉinio, D-ro Sun Jatsen lasis al ni post sia batalplena vivo multon utilan.

La tuta vivo de D-ro Sun Jatsen montris, ke vera patrioto kaj vera revolucia demokrato devas firme, senkompromise kontraŭbatali imperiismon. De la komenco de sia revolucia agado D-ro Sun Jatsen starigis al si la celon liberigi Ĉinion de sub la subpremado, sklavigo kaj tiranado de la imperiismaj potencoj. D-ro Sun Jatsen havis iujn iluziojn en siaj fruaj jaroj, li multfoje alvokis al la kapitalismaj landoj por helpo, sed ĉio restis vana, male li ricevis nur senkorajn batojn. Post lernado de amaraj lecionoj en la praktikado, precipe sub la influo de la Oktobra Revolucio gvidata de Lenin, li fine venis al la konvinko, ke la imperiismo estas morta malamiko de la ĉina popolo. Li kuraĝis respondi al la kontraŭimperiisma alvoko de Lenin kaj senkaŝe levis alten la standardon de rezisto kontraŭ imperiismo. Tio estas ekstreme altvalora sperto kaj leciono kiun akiris D-ro Sun Jatsen kaj ankaŭ la ĉina popolo en la praktiko dum la longdaŭra revolucia batalo.

Nuntempe la usona imperiismo estas la plej feroĉa komuna malamiko de la ĉina popolo kaj de la popoloj de la tuta mondo. La usona imperiismo perforte okupas nian teritorion Tajvan, kaj agas malamike kontraŭ la ĉina popolo, utiligante Ĉiang Kajŝek, perfidulon al D-ro Sun Jatsen, kiel sian lakeon. La usona imperiismo agresas Vjetnamion kaj senĉese plivastigas tiun agresan militon kontraŭ Vjetnamio. La usona imperiismo kaj ĝiaj lakeoj nun sklavigas kaj subpremas la vastajn revoluciajn popolojn en la vastaj regionoj de Azio, Afriko kaj Latinameriko. Rememorante hodiaŭ D-ron Sun Jatsen, ni devas pluapaŝe disvolvi lian kontraŭimperiisman batalspiriton, lukti por la liberigo de Tajvan kaj la integreco de la patria teritorio, kaj firme subteni la nacisavan batalon de la vjetnama popolo kontraŭ la usona imperiismo

kaj la kontraŭimperiisman revolucian batalon de la popoloj de Azio, Afriko kaj Latinameriko kaj de la tuta mondo.

En la Oktobra Revolucio gvidata de Lenin D-ro Sun Jatsen trovis la esperon de liberigo por la subpremataj nacioj kaj popoloj, sed, hodiaŭ la gvidanta kliko de Sovetunio komplete perfidis la grandan Lenin kaj la vojon de la granda Oktobra Revolucio. Ili antaŭenpuŝas la reviziisman linion de Ĥruŝčov, perfidas la revoluciajn interesojn de la tutmondaj popoloj, ŝirmas la imperiisman kaj koloniisman regadon en la kapitalisma mondo kaj efektivas la kapitalisman restarigon en la socialisma mondo. Ili alianciĝis kun la usona imperiismo kontraŭ la socialisma Ĉinio; ili fervoregas pri la kunlaborado inter Usono kaj Sovetunio por superregi la mondon. Ili jam degeneris en la komplikojn de la usona imperiismo. Rememorante hodiaŭ D-ron Sun Jatsen, ni devas nepre stari kune kun la revoluciaj popoloj de la tuta mondo por firme oponi la reviziisman klikon de KPSU, kiu perfidis Lenin kaj alianciĝis kun la usona imperiismo, kaj konduki la batalon kontraŭ la moderna reviziismo ĝis la fino.

La epoko senĉese marŝas antaŭen. En la 41 jaroj post la forpaso de D-ro Sun Jatsen, sub la gvido de la Komunista Partio de Ĉinio kaj Prezidanto Maŭ, la ĉina popolo plenumis la demokratian revolucion, kiun postlasis neplenumitan D-ro Sun Jatsen, kaj disvolvis tiun revolucion en la socialisman kaj akiris grandajn sukcesojn en la afero de socialisma konstruado. Jam tute ŝanĝiĝis la fizionomio de Ĉinio. En la unuaj jaroj de la nuna jarcento, D-ro Sun Jatsen antaŭdiris, ke la ĉina popolo, “vekiĝinta por strebi al potenco”, certe povos rompi la rutinojn por kuratingi kaj superi en “eksterordinara rapideco” la Okcidenton en dekoj da jaroj. La idealo de D-ro Sun Jatsen estas nun realiĝanta en niaj manoj. Ke nia lando sukcesis antaŭ nelonge en provado de telestirata misila nuklea armilo, tio ankoraŭfoje montras, ke la proletaro de Ĉinio ne nur kapablas fari tion kion ne povis la burĝaj revoluciuloj de Ĉinio, sed certe ankaŭ povos konstrui nian landon en potencon socialisman modernan landon en ne tro longa historia periodo kaj kuratingi kaj superi la Okcidenton.

Nun ni disvolvas en tutlanda skalo grandan proletan kulturalan revolucion senprecedencan en historio. Ĝi estas nova etapo de pli profunda kaj pli vasta disvolviĝo de la socialisma revolucio en nia lando. Ĝi estas granda animtuŝa revolucio, kiu eliminis la “kvar malnova-ojn” (malnovajn ideojn, malnovan kulturalon, malnovajn kutimojn kaj malnovajn morojn) de la ekspluataj klasoj kaj starigas la “kvar nova-ojn” (novajn ideojn, novan kulturalon, novajn kutimojn kaj novajn morojn) de la proletaro. En tiu ĉi granda revolucio ekzistas batalo inter du linioj. Ni devas ĝisfunde kritiki la reakcian burĝan linion kaj firme efektivi la revolucian proletan linion, reprezentatan de Prezidanto Maŭ, fidi la amason, apogi nin sur la amaso kaj respekti la iniciatemon de la amaso. Ni devas disvolvi la spiriton de la proletaro, revolucii ĝis la fundo kaj absolute ne halti duonvoje. Ni nepre kondukos la grandan proletan kulturalan revolucion ĝis la fino. La venko de tiu granda revolucio ne nur garantios ke nia socialisma lando neniam ŝanĝos sian koloron, sed ankaŭ naskos grandegan materian forton, kiu ebligos ke la afero de socialisma konstruado de nia lando galopos antaŭen per gigantaj paŝoj.

La granda batalo kondukata de la ĉina popolo kaj la grandaj venkoj, akiritaj sub la gvido de Prezidanto Maŭ, multe superis la idealon de D-ro Sun Jatsen. Prezidanto Maŭ genie, kreive kaj plenaryplekse heredis, defendis kaj disvolvis marksism-leninismon, kaj levis ĝin al tute nova etapo. La penso de Maŭ Zedong estas la orientilo por ĉiuj niaj laboroj. Rememorante hodiaŭ D-ron Sun Jatsen, ni devas por ĉiam sekvi nian grandan instruanton, grandan gvidanton, grandan ĉefkomandanton kaj grandan direktliston Prezidanton Maŭ, resti ĉiam kune kun la revolucia popolo, klopodi en lernado de novaj aferoj, senĉese remuldi nin mem kaj ĉiam marŝi antaŭen en la flamoj de la socialisma revolucio!

Eternan gloron al la granda revolucia antaŭirinto D-ro Sun Jatsen!

Longe vivu la granda ĉiamvenka penso de Maŭ Zedong!

Longe vivu nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ!

# Parolado de Song Kingling

## Okaze de la Centa Datreveno de Naskiĝo de Sun Jatsen

(Resumo)

**E**N la jubilea kunveno, okazinta en la 12-a de novembro, 1966, por memori la centan datrevenon de la naskiĝo de Sun Jatsen, Song Kingling, vic-prezidanto de la Ĉina Popola Respubliko, faris paroladon titolitan: “Sun Jatsen — Firma, Neŝancebla Revoluciulo”.

En sia parolado Song Kingling detale

rakontis la vivon kaj revoluciajn agadojn de Sun Jatsen.

Song Kingling diris, ke la tuta vivo de Sun Jatsen estis tiu de obstina revoluciulo. Li sciis, kiel korupta estis la monarkia registaro de King-dinastio, kaj kiel tirane ĝi subpremis la popolon kaj obeeme submetis sin al la imperiistoj. Pro tio li decidis faligi King-dinastion.

Ŝi rememorigis, ke Sun Jatsen faris firman batalon kontraŭ la reformistoj reprezentataj de Kang Joŭvej kaj Liang Kiĉaŭ. Por faligi la monarkan aŭtokracion de King-dinastio kaj efektiviĝi siajn principojn de naciismo, popola povo kaj popola vivo, li ellaboris politikan programon de burĝa demokratia revolucio. Dum la 16 jaroj de 1895 ĝis marto de 1911, Sun Jatsen kaj liaj kamaradoj gvidis kaj okazigis dek revoluciajn leviĝojn. Malgraŭ ke tiuj revoluciaj agadoj malsukcesis, li neniam ŝanceliĝis.

Ŝi diris, ke en 1911 Sun Jatsen kaj liaj kamaradoj okazigis la 11-an leviĝon. La rezulto de tiu ĉi leviĝo diferencis de ĉiuj antaŭaj per tio, ke ĝi aliigis la procezon de la ĉina historio. Sed la vera potenco falis en la manojn de militistoj estrataj de Juan Ŝikaj, kiu estis granda militaristo kaj burokrato kaj estis sklavulo de King-dinastio ĝis la abdiko

*Vic-prezidanto Song Kingling paroladas ĉe la jubilea kunveno.*



de ĝia imperiestro. Tiuj reakciuloj starigis militan diktatoran reĝimon, kaj Sun Jatsen estis devigita ekŝiĝi de sia prezidanteco. La revolucio denove malsukcesis.

Ŝi diris, ke la venko en la komenca periodo de la Revolucio de 1911 gajnita dankis al tio ke la burĝaro ricevis la subtenon de la laboristoj, kamparanoj kaj urba etburĝaro. Ĝi malsukcesis pro la ŝanceliĝo de la gvidantaro de Kuomintango (kaŭzita de ties klasa konsisto), kaj la ĉefa kaŭzo estis, ke ili malĝuste traktis la kamparanan problemon. Prezidanto Maŭ diris: **“La nacia revolucio postulas grandan ŝanĝiĝon en la kamparo. La Revolucio de 1911 ne alportis tiun ŝanĝiĝon, sekve ĝi malsukcesis.”** (*Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, Vol. I, “Raporto pri Esplorado de la Kamparana Movado en Hunan-provinco”) La Revolucio de 1911 neniom malpezigis la subpremadon, kiun suferis la kamparanoj. Kontraŭe, la ŝtatpotenco post la revolucio falis en la manojn de homoj, kiuj agis laŭ la ordono de la feŭda klaso kaj imperiismo, kaj tiuj pliintensigis tiun subpremadon.

Ŝi daŭrigis, ke tio signifas, ke la fundamenta problemo de Ĉinio — renverso de la superregado de feŭdismo kaj imperiismo — ne estis solvita. La revolucia batalo devis nepre daŭri. Sun Jatsen vidis tion kaj agadis laŭ tiu konstato.

Ŝi plue diris, ke inter 1914 kaj 1916 Sun Jatsen organizis du leviĝojn en Ŝanhajo. En 1917 li starigis Konstitucian Registaron en Kantono por daŭre gvidi la batalon kontraŭ la nordaj militaristoj. Malfeliĉe, lia hepata malsano rekaptis lin, kaj li forpasis en la 12-a de marto, 1925.

Song Kingling diris, ke la instruo testamentita de Sun Jatsen troviĝis en liaj Tri Popolaj Principoj kaj liaj tri ĉefaj politikoj de ligiĝo kun soveta Rusio, kunlaboro kun la Komunista Partio kaj helpo al la laboristoj kaj kamparanoj. Tiujn li disvolvis dum sia penado por plenumo de la burĝa demokratia revolucio kontraŭ imperiismo kaj feŭdismo en Ĉinio.

Ŝi diris, ke Prezidanto Maŭ ĝuste taksis la kontribuon de Sun Jatsen, montrante ke la

Revolucio de 1911 “havas siajn sukcesojn kaj malsukcesojn”. Ĝi sukcesis, ĉar ĝi abolis la kortegan sistemon kaj forigis la imperiestron; ĝi malsukcesis, ĉar ĝi ne sukcesis forigi imperiismon kaj feŭdismon. Sun Jatsen konstatis tion kaj postulis, ke la revolucio estu daŭrigata. En sia testamento li diris: “La revolucio ankoraŭ ne estas plenumita, niaj kamaradoj devas daŭrigi la penadon!”

Plue ŝi laŭdis la penadon de Sun Jatsen antaŭenigi la revolucion dum sia tuta vivo kaj lian senlaca, persistan mem-edukadon. Ŝi diris, ke tio estas ankoraŭ lerninda por ni hodiaŭ.

Song Kingling daŭrigis, ke en la longdaŭra, zigzaga procezo de la revolucia praktiko li pli kaj pli profunde konstatis la gravecon de posedo de armitaj fortoj, kaj ke estas necese “unue kombini la armitajn fortojn kun la popolo, kaj poste fari ilin tiuj apartenantaj al la popolo”. En junio, 1924, li diris en sia parolado al la instruistoj, oficistoj kaj studentoj de la Huanpu-a Milita Lernejo: “Ni ne povis rapide sukcesigi la ĉinan revolucion, la kaŭzo kuŝas en tio ke ni ne havis proprajn revoluciajn armitajn fortojn kaj ne bazis nin sur la vasta popolo.... Por plenumi nian revolucionan mision, mi nun firme decidis reorganizi Kuomintangon kaj fondi nian propran revolucionan armeon....”

Ŝi diris, ke en la tempo de Sun Jatsen Ĉinio troviĝis en ekstreme komplika situacio. Sun Jatsen volis liberigi la ĉinan popolon el suferegoj, sed li ne komprenis, ke la popolo povas akiri liberon nur per siaj propraj manoj, kaj tial li siatempe klopodis venki la militaristojn, unun per alia.

Ŝi diris, ke tio estis vojo plena de doloraj malsukcesoj, sed la fina rezulto donis gravan lecionon al Sun Jatsen kaj aliaj ĉinaj revoluciuloj.

Ŝi diris, ke li konstatis, ke li devas iri la vojon de Lenin kaj preni Rusion kiel instruiston, kaj ke li devas iri la vojon de la Komunista Partio de Ĉinio, kiu vekas la popolamasojn kaj gvidas la nacian revolucion. La revolucio povas dependi nur de tiuj, kiuj plej urĝe bezonas liberiĝon, do de la subpremataj popolamasoj.

Ŝi diris, ke Sun Jatsen klare vidis en siaj lastaj jaroj la veron de la ĉina revolucio. Li bonvenigis la kunlaboron de la Komunista Partio de Ĉinio kaj la helpon de la nove naskita Sovetunio. Per la tuta forto li klopodis reorganizi la politikan partion, kiun li gvidis, li denove eksplikis siajn Tri Popolajn Principojn kaj aldonis al ili la tri ĉefajn politikojn pri ligiĝo kun Sovetunio, kunlaboro kun la Komunista Partio de Ĉinio kaj helpo al la laboristoj kaj kamparanoj.

Ŝi emfazis, ke Prezidanto Maŭ jam antaŭ longe montris, ke "la Tri Popolaj Principoj enhavantaj la tri ĉefajn politikojn, t. e., la revoluciaj, novaj kaj veraj Tri Popolaj Principoj, estas tiuj de nova demokratio kaj disvolviĝo de la malnovaj Tri Popolaj Principoj, kaj tio estas granda kontribuo de D-ro Sun Jatsen kaj produkto de la epoko, en kiu la ĉina revolucio fariĝis parto de la monda socialisma revolucio." (*Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, Vol. II, "Pri Nov-demokratio"). Elmontrante la malsamecon inter la programo de

Sun Jatsen kaj tiu de la Komunista Partio de Ĉinio, Prezidanto Maŭ klarigis, ke ili fundamente akordiĝas unu kun la alia rilate al la taskoj de la demokratia revolucio. Tio ebligis la fondon de unueca fronto inter la Tri Popolaj Principoj kaj komunismo kaj la unuan kunlaboron inter Kuomintango kaj la Komunista Partio. Tiu kunlaboro havis la subtenon de la tuta popolo kaj efektivigis la grandan revolucion de 1924-1927. Poste Ĉiang Kajŝek forĵetis la revolucion testamentaĵon de Sun Jatsen kaj perfidis la revolucion; dume, sub la gvido de Prezidanto Maŭ, la Komunista Partio de Ĉinio surŝultrigis la pezan ŝarĝon de kondukado de la nov-demokratia revolucio ĝis la fino.

Ŝi diris, ke la celo, por kiu Sun Jatsen batalis dum sia tuta vivo, estas jam efektivigita kaj superita. Sed liaj nomo kaj spirito ankoraŭ vivas en nia koro. Ni estas fieraj pro lia sindonema lukto dum kvardek jaroj. Ankoraŭ nun sonas korektaj liaj lastaj vortoj: "... Ni devas vekti la popolamasojn kaj unuiĝi kun tiuj nacioj de la mondo, kiuj traktas nin surbaze de egaleco..."

Ŝi diris ĉe la fino, ke la firmeco kaj persisteco, kiun montris Sun Jatsen en la revolucia batalo, ĉiam kuraĝigas nin. Kun neŝancellebla decidemo por la celo de nia batalo kun firma kredo je marksism-leninismo kaj la penso de Maŭ Zedong kaj kun senlima fido pri niaj fortoj por akiri venkon, ni antaŭenmarŝas en batalo mano en mano kun ĉiuj, kiuj strebas al mondo sen ekspluato de homo al homo, sen nacia subpremado kaj sen rasa diferencigo.

*D-ro Sun Jatsen en la funebra ceremonio pri la forpaso de Lenin. Li havis profundan respekton al la granda Lenin.*








*Juna ruĝa gvardiano pinglas al la brusto de Maj Hiande la plej valoran donacon — memorigan medalon kun portreto de Prezidanto Maŭ.*

# Ŝtala Batalanto Maj Hiande

Maj Hiande, maŝinisto sur la kanonŝipo titolita “Mara Heroo” de la sudmara floto de la mara armeo de la Ĉina Popola Liberiga Armeo, estas proleta ŝtala batalanto armita per la penso de Maŭ Zedong. Li havas ĝisostan malamegon kontraŭ la usona imperiismo — la plej feroça malamiko de la tutmonda popolo, kaj senliman amon al la popolo.

Je la 6-a de aŭgusto 1965, la uson-faritaj milit-ŝipoj “Giarmen” kaj “Ĝanggiang” de Ĉiang Kajŝek-kliko entrudiĝis en la fiŝejon proksiman al nia Dongŝan-insulo por fari malutilajn kaj detruajn agadojn. Trovinte la malamikajn ŝipojn, Maj Hiande kaj liaj batalamikoj de “Mara Heroo” ĉiuj koncentrigis sian indignon sur la kanonbuŝojn, kaj decidis severe puni la entrudiĝintajn malamikojn. Senprokraste ili lanĉis furiozan atakon kontraŭ la du malamikaj ŝipoj kaj dronigis ilin en la maron.

Dum la batalo, Maj Hiande estis malfeliĉe vundita. Obusfragmento trafis lin, trapenetrante de la dekstra ĝis la maldekstra flanko de la frunto. En stato de duonkonscio, li tamen persistis sur sia posteno dum tri horoj, farante gravan kontribuon por garantii la venkon de la batalo. La mirinda persistemo kaj obstina batalspirito de Maj Hiande elmontras la malmolan oston de proleta ŝtala batalanto.



*Esplorado pri produktaj problemoj*

# Ĉinio Konstruis la Unuan Labo- rejon de Sinteza Benzeno en la Mondo

**A**LTE tenante la grandan ruĝan standardon de la penso de Maŭ Zedong kaj kuraĝe irante la vojon iritan de neniuj antaŭuloj, la sciencaj kaj teknikaj laborantoj kaj oficistoj kaj laboristoj de iu instituto en Ŝanhajo uzis 8 jarojn por solvi la malfacilan sciencan kaj teknikan problemon — produkton de la grava kemiaĵo benzeno per sinteza metodo, kiun la okcidentaj landoj provis solvi en tempo de preskaŭ cent jaroj sed sen sukceso. Kaj la produktado de sinteza benzeno jam estas en irado. Per tio ili skribis brilan paĝon en la historio de la monda kemia industrio.

Dum la esplorado kaj eksperimentado, ili havis vastan kunlaboron de multaj fabrikoj kaj altlernejoj en Ŝanhajo kaj orienta Ĉinio.

Nun, la produktaj instalaĵoj en la laborejo de sinteza benzeno en Ŝanhajo funkcias glate, kaj pura sinteza benzeno fluadas tag-nokte kiel kondukata akvo. Kvalite ĝi multe superas tiun ekstraktitan en la procezo de farado de koakso aŭ de olerafinado. La fakto refoje pravas elokvente: Kiam

la laboristoj kaj sciencaj kaj teknikaj laborantoj de nia lando estas armitaj per la ĉiamvenka penso de Maŭ Zedong, ilia senkompara kreiva talento tuj manifestiĝas.

Benzeno estas grava baza krudmaterialo por fabriko de plasto, sintezaj kaŭĉuko kaj fibroj, tinkturoj kaj insektmortigiloj. Ĝi estas ankaŭ bezonata en grandaj kvantoj en ekonomia kaj naci-defenda konstruado de la lando. Sed ĝis nun, aliaj landoj de la mondo povas akiri benzenon nur per ekstraktado dum fabrikado de koakso kaj olerafinado. La produkta kvanto estas limigita. Dum la lastaj cent jaroj, la industrie disvolviĝintaj landoj ĉiam provas plivastigi la fontojn de benzeno, sed ili ankoraŭ sin trovas en stadio de esplorado kaj eksperimentado.


Ĉu kuraĝe elhaki mem la vojon aŭ senkuraĝiĝi antaŭ la malfacilo, kiun la industrie progresintaj okcidentaj landoj ankoraŭ ne sukcesis venki de longa longa tempo? Jen estis du pensoj, kiuj interbatalis dum la tuta procezo de la esplorado

pri sinteza benzeno. Dum elekto de sinteza benzeno kiel esplora temo, iuj jam elpaŝis kontraŭ ĝi, dirante: “Per kio ni povos sukcesi, kiam la fremdaj landoj ĝis nun ankoraŭ ne povis!” Sed la junaj teknikaj laborantoj kaj laboristoj, kiuj sekvas la instruojn de Prezidanto Maŭ, deklaris brave en la revolucia spirito de la proletaro kuraĝi agi kaj kuraĝi transformi la mondon: “Ni ĝuste volas sturmi tiun fortikaĵon, kiun fremduloj ne sukcesis konkeri dum centoj da jaroj!”

La unua teknika problemo por ili estis serĉo de plej ideala katalizilo taŭga por produktado de

sintezo benzeno. Ĉu memstare esplori aŭ rampi post aliuloj? Tio estis alia serioza batalo. Komence, la esploristoj ne povis liberigi sin el la fremdlandaj kutimaĵoj. Ili kopie uzis la samajn katalizilojn uzitajn de fremdaj landoj. Rezulte ili ĉiam malsukcesis en la provado. Ili eltiris lecionon el siaj malsukcesoj kaj ekkomprenis: Kiel oni povus sukcesi, trenante sin post la aliaj kiuj ankoraŭ ne sukcesis! Ili decidis do agi laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ, disrompi blindajn kredojn, liberigi sian pensadon kaj iri la propran vojon. Ili provis unu katalizilon post alia, kiujn ili preparis kaj konjektis eble taŭgaj. Ĉiu el ili

*Angulo de la laborejo de sinteza benzeno*



faris unu aŭ du, iatempe eĉ pli ol dek provojn, preskaŭ ĉiutage. Ili firme tenis en si la penson ke ili nepre sukcesu en sia esplorado kaj per tio kontribuu en la socialisma konstruado kaj elmontru la heroecon de la ĉina popolo, ĉar benzeno estas urĝe bezonata materialo de la lando. Nek malfaciloj, nek brulegoj kaj eksplodoj povis timigi ilin. Post ripetataj eksperimentadoj dum pli ol duonjaro, ili fine sukcesis prepari kompare idealan katalizilon, kaj tio antaŭenpuŝis la esploradon al venko je tre granda paŝo.


En la plej malfacila momento de provo kaj esploro, la partia organizo ĉiam donis al la junaj sciencaj kaj teknikaj laborantoj plej fortan subtenon. La gvidantoj de la koncerna instituto plene jesigis la atingojn de la junuloj kaj klare deklaris: La projekto de sinteza benzeno devas esti daŭrigata ĝis plena sukceso kaj ĝi certe povos atingi la finan sukceson. Sukceso en dek jaroj devas esti konsiderata kiel sukceso rapida, sukceso en 15 jaroj devas esti konsiderata kiel sukceso ne malrapida! En la sama tempo la gvidantoj de la instituto ankaŭ ordonis siajn maŝin-riparan, provizan kaj administran fakojn ĉiam lumigi la “verdan lampon” al kaj krei plej favorajn kondiĉojn por la esplorado de sinteza benzeno.

En tiu tempo, la kemia reakcio de sintezo ankoraŭ ne estis stabila. Ĉu firme daŭrigi la propran vojon aŭ halti mezvoje? Pri tiu demando troviĝis duboj kaj ŝanceliĝoj inter kelkaj membroj de la esplora grupo kiuj havas nesufiĉe fortan volon kaj pli malpli seriozan penson pri persona famo kaj materia profito. Tiam, la instruo de la Partio komprenigis al la junuloj ke fabriki sintezan benzenon estas konkuro kun imperiismo kaj reviziismo kaj estas politika lukto kontraŭ ili. En tiu batalo ni devas nepre venki sed ne malvenki! Vizaĝe al la pesimisma “senfara” tendenco, la junaj batalantoj, kiuj decidis nepre surgrimpigi mondan sciencan pinton, firme kredis, ke homo estas la decida faktoro kaj kun la penso de Maŭ Zedong ili certe povos mastri la objektivajn leĝojn de la naturo. Sekvante la instruojn de Prezidanto Maŭ eksplikitajn en *Pri Praktiko* kaj *Pri Kontraŭdiro*, ili firme prenis la ĉefan kontraŭdiron kaj obstine daŭrigis la eksperimentadon. De praktiko al konado, poste de konado al praktiko kaj tiel ripetigis la cikloj de praktiko kaj konado, kaj repraktiko kaj rekonado, ili fine trovis la kialojn de la malstabileco en la eksperimento. Ili alprenis multajn kontraŭrimedojn por elimini tiujn malstabiligajn faktorojn, kaj la malgrandskala eksperimento por fari sintezan benzenon fine sukcesis.

En la dua duono de la jaro 1964, la granda socialisma eduka movado disvolviĝis en la pripa-

rolita instituto. Dum tiu batalo por elimini burĝan ideologion kaj starigi proletan ideologion, la scienc-esploraj laborantoj pri la projekto de sinteza benzeno pli alte tenis la grandan ruĝan standardon de la penso de Maŭ Zedong, kreive studis kaj kreive aplikis ĉiam kaj ĉie la verkojn de Prezidanto Maŭ, kaj prenis la penson de Maŭ Zedong kiel gvidan principon en ĉiuj siaj laboroj. Ili cetere starigis la sistemon de nepre studado de la verkoj de Prezidanto Maŭ en kvin okazoj, t. e., ili nepre studas verkojn de Prezidanto Maŭ, kiam komenciĝas nova fazo en ilia laboro, kiam ili renkontas malfacilojn, kiam ekaperas inter ili malbonaj tendencoj, kiam ili akiris sukcesojn kaj faris certan progreson, kaj kiam finiĝas iu fazo de la laboro. La intimaj instruoj de Prezidanto Maŭ donis al ili neelĉerpeblan forton. Kun alta batalspirito kaj grandega revolucia energio, la kamaradoj de la esplora grupo rapide faris prototipan eksperimentadon. Prezidanto Maŭ diris: **“La ĉina popolo havas altan aspiron kaj kapablon. Ĝi certe kuratingos kaj superos la progresintajn mondajn nivelojn en ne malproksima estonteco.”** Prenante la laboristojn de la Dakin-olekampo kiel sian modelon, la esplora grupo pri la projekto de sinteza benzeno disvolvis la revolucionan spiriton de pena lukto kontraŭ malfaciloj, sinapogo sur la propraj fortoj kaj batalo por ĉiu minuto, rapide mastris la novan teknikon kaj sukcesis en sia prototipa eksperimentado. Sur tiu bazo, ili tuj entreprenis industriajn eksperimentadon por produkto de sinteza benzeno. Ili refutis la opinion de iuj homoj kiuj pledis por malrapida progresado en la laboro. Kuraĝante pensi, paroli kaj agi, ili disrompis malnovajn regulojn, malnovan ordon kaj alprenis la metodon de samtempa, interkruciĝa entrepreno pri malgrandskala, prototipa kaj meza eksperimentoj. En la sama tempo, ili praktikis la metodon de “kombino de tri flankoj” inter la esplora grupo, la projekta instituto kaj la konstrua unuo en projektado kaj konstruado de la laborejo por sinteza benzeno. Tio multege ŝparigis laborforton, materialon kaj tempon, kaj certigis rapidecon. Tiel, ili rapide finkonstruis la unuan laborejon de sinteza benzeno en la mondo kun memkreita teknologia linio.

Je la komenco de la jaro 1966, tiu laborejo de sinteza benzeno sukcesis en provprodukto je la unua provo, sub la kunlaboro de frataj fabrikoj. Produkto de benzeno per tiu sinteza metodo rezultigas altan produktadon, postulas malmultan investon kaj povas esti komencita en mallonga tempo. Tiu tipo de laborejo povas esti konstruita tra la tuta lando, kaj tiel malfermis tute novan kaj vastan vojon por produktado de benzeno en nia lando.



## Nova Teknologio de Fermenta Devaksigo de Petrolo

**S**UB la brila lumo de la penso de Maŭ Zedong, la junaj sciencaj kaj teknikaj laborantoj de iu instituto kaj junaj laboristoj de koncerna fabriko en Ŝanhajo, kiuj kuraĝis iri vojon de neniu iritan kaj grimpi sur montpinton de neniu surgrim-pitan, kune kreis plej novan teknologion de fermenta devaksigo de petrolo en iom pli ol kvin jaroj, kiun kapitalismaj landoj ne sukcesis efektiviĝi en dekoj da jaroj.

Nun tiu ĉi nova teknologio jam estas aplikata en produktado. Post grandigita eksperimentado en la fabriko, estas pruvite ke altgradaj petrolaj produktaĵoj kun malalta solidigpunkto, rafinitaj per tiu ĉi nova teknologio, multe superas en kvalito la samspecajn produktaĵojn el Usono. Rilate al la utiligo de fermentilo produktita dum la procezo de la fermentado de petrolo, oni akiris ankaŭ rimarkindan sukceson.

Tiu ĉi nova teknologio kreita de la koncerna organizoj en Ŝanhajo malfermis vojon de pli multa,

pli rapida, pli bona kaj pli ekonomia utiligado de la riĉfontoj de petrolo en nia lando por produktado de altgradaj petrolaj produktaĵoj kaj alt-proteina fermentilo.

Kelkaj kapitalismaj landoj studis jam 50-60 jarojn tiun ĉi teknologion, sed ĝis nun troviĝis en la stadio de meza eksperimento nur iuj unuopaj landoj. Niaj laboristoj kaj sciencaj kaj teknikaj laborantoj en la koncerna organizoj en Ŝanhajo komencis studi la devakigon de petrolo per fermentado nur en majo de 1961. En la spirito de strebado al prosperiĝo, ili decidis atingi kaj superi kapitalismajn landojn en la Okcidento en tempo plej mallonga. Ili kuraĝis pensi, agi kaj revolucii, kaj jam en 1963 atingis unuajn rezultojn, kaj difinis la direkton de uzo de mikroboj por devaksigo en rafinado de petrolo. Poste, ili marŝis antaŭen surbaze de la jam akirita venko kaj finis, post pli ol du jaroj, la pligrandigitan eksperimenton. Laŭ la disponeblaj informoj, la plej granda kapacito de fermentujo uzata por devaksigo de petrolo nun

troviĝanta en la mondo estas 15,000 litroj, kaj la fermentujo de Ŝanhajo estas kelkoble pli granda ol ĝi.

La tuta procezo de eksperimentado de tiu ĉi nova teknologio estas nenio alia ol procezo de la kreiva studo kaj kreiva apliko de la verkoj de Prezidanto Maŭ fare de la junaj sciencaj kaj teknikaj laborantoj kaj laboristoj de la koncernaj organizoj. El la brilaj verkoj de Prezidanto Maŭ *Servu al la Popolo*, *Montotranslokigo Fare de Malsaĝa Avo*, *Rememore al Norman Bethune*, *Pri Praktiko* k. a., ili trovis por si la klaran direkton de antaŭenirado kaj samtempe treege grandan forton. Ili diris, ke dank' al la granda penso de Maŭ Zedong la petrol-laboristoj de Daking kreis la plej novan nivelon de tekniko de petrolo ekspluato en la mondo, kaj metis finon al la periodo de uzado de "fremda oleo" en nia lando. Havante la grandan penson de Maŭ Zedong, ni estas certaj ke ni povos ankaŭ surgrimpi la pinton de teknologio en rafinado de petrolo per mikroboj. Prezidanto Maŭ instruas al ni: "Ni faras nun ekstreme gloran kaj grandan laboron, kiun neniam antaŭe faris niaj antaŭuloj. Nian celon ni devas nepre atingi kaj ĝin atingi ni certe povos." Ni ĉina laboristaro

povos fari kion la okcidenta burĝaro povas; kaj kion la okcidenta burĝaro ne povas, ni ĉina laboristaro certe ankaŭ povos.

La unua granda problemo, kiun oni renkontis en la eksperimentado, estis trovi la mikrobon, kiu povas "formanĝi vakson". Kaj eltrovi tian mikrobon el sennombraj mikroboj ja estas ege komplika kaj subtila laboro. La junaj sciencaj kaj teknikaj laborantoj de iu instituto de la Ĉina Akademio de Sciencoj kolektis el multaj diversaj lokoj preskaŭ centon da grundspecimenoj, kaj en la spirito de la legenda heroo Malsaĝa Avo, kiu translokgis montojn, kribre elektis ĉirkaŭ mil specojn de mikroboj. Post multfoja provado, oni fine trovis kompare idealan specon de mikrobo, kiu povas "formanĝi vakson", kaj tiel solvis la kernan problemon de la devaksigo de petrolo per fermentado kaj sukcesis en la provado en laboratorio. Kaj tion sekvis la sukceso de eksperimentado en pli-granda skalo.

Kiuj entreprenis la industriigan mezan eksperimenton, estis pli ol dek junaj laboristoj, kun meza aĝo de malpli ol dudek tri jaroj. Neniam antaŭe ili kontaktis kun la industrio de petrolfermentado. Sed, ili ĉiam memoris la instruon de

*Gejunuloj de la grupo por eksperimentado de mikroba devaksigo en la Esploro pri Organika Kemio de Ĉina Akademio de Sciencoj studas la verkojn de Prezidanto Maŭ.*



## En Konstruado

50-KILOMETRA  
DIGO KONSTRUITA  
EN FUJU-GUBERNIO

La popolo de Fuju-gubernio, Gilin-provinco, konstruis pasintjare grandan digon kun longeco de kvindek km., kiu garantias abundan rikolton sur vasta terspaco.

Ĉirkaŭita de rivero en tri flankoj, Fuju-gubernio havas vastan fekundan ebenaĵon en la nordo, kiu, ĉiujare dum la riverŝvelado, estas inundata de la riverakvo. La tiea popolamaso urĝe postulis konstruon de granda digo por bari la akvon.

Por konstrui la digon, necesas fosado de pli ol 2,600,000 kubmetroj da tero kaj formovo de dek montetoj, kaj laŭ la plano la digo devis cetere iri trans akvon en naŭ lokoj. Krome la konstruo devis esti finita en unu spiro antaŭ la ŝvelado de la rivero, alie, la inundo komplete nuligus ĉion faritan. Tial la gvidantaj kadroj de la gubernia komitato de la partio timis riski kaj ne kuraĝis fari la decidon en la pasinteco. Poste ili komencis seriozan studadon de verkoj de Prezidanto Maŭ kun tiu ĉi problemo, kaj starigis al si la penson kun la "kuraĝo" en la unua loko: "fari firman decidon, timi neniun oferon kaj venki ĉian malfacilon por strebi al triumfo." Ili decidis gvidi la tutan popolon de la gubernio por konstrui la digon.

Printempe de la lasta jaro, kiam pli ol dek kvin mil gubernianoj-konstruantoj venis al la konstruejo, la gubernia komitato, antaŭ ĉio, organizis kaj gvidis ilin en fervora studado de verkoj de Prezidanto Maŭ, en la laborbudoj, apud vojoj kaj sur muroj, ĉie elpendas cititaj vortoj de Prezidanto Maŭ. Ili kaptis ĉiun utiligeblan momenton por studi verkojn de Prezidanto Maŭ kaj la tuta konstruejo fariĝis granda lernejo de la penso de Maŭ Zedong. "Konstrui la digon por la revolucio" fariĝis la komuna voĉo de la gubernianoj-konstruantoj.


La penso de Maŭ Zedong estas fonto de forto. La popolamaso, kiu foje legis la libron de Prezidanto Maŭ kaj posedis la penson de Maŭ Zedong, tuj kuraĝas pensi kaj agi kaj povas venki ĉiujn malfacilojn.

(daŭrigo sur p. 50)

Prezidanto Maŭ, kombinis la revolucion spiriton kuraĝi pensi, paroli, agi kaj sturmi kun strikte scienca sinteno, kaj faris gravan kontribuon en la batalo de sukcesigo de tiu ĉi nova teknologio. Dum la eksperimentado, ili rigore agis laŭ la instruo farita de Prezidanto Maŭ en *Pri Praktiko*. Kulturi mikrobojn por devaksigo de petrolo per fermentado estas problemo ege malfacila. Kiel igi la mikrobojn kreski kaj rapide kaj forte, kun alta efiko de "vaksmanĝado"? Estis du malsamaj opinioj, kiuj interbatalis tre akre. Tiukaze ili kune studis la verkon *Pri Praktiko*, en kiu Prezidanto Maŭ diris: "La kriterio de vero povas esti nur la socia praktiko." Sekvante tiun instruon de Prezidanto Maŭ, ili faris komparan provadon severe precizan laŭ la du malsamaj opinioj kaj lasis la finan vorton al la praktiko. Pere de praktiko, ili fine trovis novajn kondiĉojn por kulturo de la mikroboj kaj tiel reduktis la kulturalan periodon al duono.

Alia ekzemplo: en la komenco de la esplorado kaj eksperimentado, oni difinis kompare malsimplan teknologian ekipaĵon, kiu postulis komplikajn teknikojn, konsumis grandan movforton, kaj malebligis grandskalan industriajn produktojn. Por apliki la novan fermentan procedon de devaksigo de petrolo kiel eble plej rapide al produkto, la junaj laboristoj, kiuj partoprenis la industriigan mezajn eksperimentojn, decidis forĵeti la unue difinitajn teknologiojn. Ili aŭdace konjektis kaj elmetis tute novan simpligitan teknologion kaj pluroble pligrandigis la mezuron de fermentado. Kiam oni komencis la provadon, ambaŭ la solidiga punkto de petrolaj produktaĵoj kaj produkta kvanto de fermentilo ne atingis la atenditan normon. Sed tiuj ĉi junuloj neniam ŝanceliĝis. Ĉiufoje kiam ili malsukcesis, ili relegis la vortojn de Prezidanto Maŭ: "Faru firman decidon, timu neniun oferon kaj venku ĉian malfacilon por strebi al triumfo", kaj pliiĝis sian kuraĝon por venki malfacilojn. Ili kredis ke persisto signifas venkon. Kune kun veteranaj laboristoj, ili analizis detale ĉiun progreson en eksperimento, elserĉis la ĉefan kaŭzon de malsukceso, kaj alprenis necesajn rimedojn por daŭrigi la eksperimenton. Fine, prosperis al ili, ke la kvalito kaj produkta kvanto de la petrola produktaĵo kaj fermentilo ambaŭ atingis la intencitan normon.

La sukceso de la junaj laboristoj kaj sciencaj kaj teknikaj laborantoj en Ŝanhajo en kreo de nova tekniko de fermenta devaksigo de petrolo en mallonga tempo pliafoje montris, ke la penso de Maŭ Zedong estas orientilo por esplorado en scienco kaj tekniko, kaj ora ponto por surgrimpi la pinton de scienco. Homoj, kiuj sin armis per la penso de Maŭ Zedong, estas plej saĝaj, plej kuraĝaj kaj plej riĉaj je iniciativo.




*La verkoj de Prezidanto Maŭ ore brilas.*



# *Urba kaj Kampara Merkatoj en Plena Prospero*

*En la Pekina Magazeno klientoj aĉetas ŝtofojn kun koloraj desegnaĵoj.*





*Vendejo de ĉiutagaj bezonaĵoj de la Hintang-a Popola Komunumo en Zengĉeng-gubernio, Guangdong-provinco, aranĝas noktajn vendadon por la produktaj brigadoj.*


**L**A granda proleta kultura revolucio stimulis ne nur novan alttadjon en la industria kaj agrikultura produktado de nia lando, sed ankaŭ pliprosperejon en la urba kaj kampara merkatoj de la tuta lando.

La granda disvolviĝo de la industria kaj agrikultura produktado metis solidan materian bazon por la merkatoj. En la unuaj 8 monatoj ĉijare, la tuta kosto de la industriaj kaj agrikulturaj produktaj aĉetitaj de la komercaj fakoj de la tuta

lando plialtiĝis je 12.5 procentoj kompare al tiu en la sama periodo de la pasinta jaro, kaj la totalo de komercaĵoj provizitaj al la merkatoj je 10.4 procentoj kompare al tiu en la sama periodo de la pasinta jaro. Tio signifas, ke sur la bazo de konstanta plialtiĝo dum la lastaj kelkaj jaroj, la aĉetado kaj provizado ĉijare ree kreskis en kompare granda skalo.

Sur la urba kaj kampara merkatoj, la venda kvanto de la plejparto de la ĉefaj komercaĵoj plial-

*Amasoj da bananoj estas ŝipe transportataj de la membroj de la Hintang-a Popola komunumo en Zengĉeng-gubernio, Guangdong-provinco al la ŝtata aĉeta stacio.*




tiĝis en granda skalo. La venda kvanto de la produktaĵoj servantaj al pliproduktiĝo de agrikulturo, kiel duonmekanikigitaj agrikulturaj instrumentoj, insektmortigiloj, kemiaj sterkaĵoj k. a., plialtiĝis je pli ol 40 procentoj kompare al tiu de la sama periodo de la pasinta jaro. Ekzemple, la kvanto de malgrandaj agrikulturaj instrumentoj liveritaj de la Proviza kaj Venda Kooperativo de Siĉuan-provinco al kamparoj en julio kaj aŭgusto ĉijare plimultiĝis je 16 procentoj ol tiu en la sama periodo de la pasinta jaro. Antaŭ la rikolto de la mez-rizo en tiu provinco, la Proviza kaj Venda Kooperativo jam sendis al la produktaj grupoj dekojn da miloj da draŝiloj. Dank' al tio ke la komerca laboro sin direktis al kamparo, la aĉetado kaj provizado en tiu ĉi provinco plidisvolviĝis kaj disvastiĝis jaron post jaro, kaj la komercado fariĝis pli kaj pli vigla. En 1965, la aĉetotalo de la agrikulturaj, flankokupaj, lokaj kaj specialaj produktaĵoj en la tuta Siĉuan-provinco plialtiĝis je 14.2 procentoj ol tiu en 1964; kaj tiu en la unuaj 8 monatoj ĉijare plialtiĝis je 15.9 procentoj ol tiu en la sama periodo de la pasinta jaro. En 1965, la tuta kosto de provizaĵoj porproduktaĵoj kaj por ĉiutaga uzo liveritaj en la tuta provinco plialtiĝis je 19.9 procentoj ol tiu en 1964; kaj tiu en la unuaj 8 monatoj ĉijare plialtiĝis je 13.4 procentoj ol tiu en la sama periodo de la pasinta jaro. Dum la aŭtuno kun multege da agrikulturaj klopodoj en Hejlongjiang-provinco ĉijare, la kvanto de falĉiloj liveritaj atingis 1,920 milojn, ne parolante pri la kvantoj de aliaj provizaĵoj. En la unuaj 8 monatoj, la venda kvanto de la ĉiutagaj necesajoj de la popolo, kiel ŝtofo,

kotonaj trikaĵoj, kaŭĉukaj ŝuoj, petrolo, salo, porkaĵo, sukero kaj legomoj k. a. en la tuta lando, kreskis respektive de 10 ĝis 30 procentoj.

Kvankam la proviza kvanto de komercaĵoj grandskale pliiĝas, tamen la stoko de la komercaj fakoj ankoraŭ daŭre kreskas. Restas en stabileco la prezoj en merkatoj, kaj plue pliboniĝas la vivo de la popolo.

Kial la urba kaj kampara merkatoj troviĝas en tiom prospera stato ĉijare? La ĉefa kaŭzo kuŝas en tio, ke la vasta amaso de laboristoj kaj oficistoj en la komercaj fakoj de la tuta lando, kun profunda klasento, pli memkonscie, en pli bona organiza formo kaj sub plifortigita gvido disvolvis la amasan movadon de kreiva studado kaj kreiva aplikado de la verkoj de Prezidanto Maŭ. Laŭ la instrukcio de Prezidanto Maŭ, ke "la politika laboro estas la vivlinio de ĉiuj ekonomiaj laboroj", ili ripetade studis la verkojn de Prezidanto Maŭ, kiel *Servu al la Popolo*, *Rememore al Norman Bethune*, *Montotranslokigo Fare de Malsaga Avo* k. a., kaj plue starigis la mondkoncepton servi tutanime al la revolucio kaj la popolo. Kun heroa aspiro la vasta amaso de revoluciaj laboristoj kaj oficistoj asertis, ke ili volas fari la komercan entreprenon granda lernejo de la penso de Maŭ Zedong, kaj esti politikistoj de la proletaro sed ne komercistoj de la burĝaro.

Post la komenciĝo de la granda proleta kultura revolucio, la revolucia spirito de la vasta amaso



*Grasaj porkoj bredataj de la Hinanŝa-Ŝtata Agrikulturejo en antaŭurbo de Ŝanhajo estas portotaj al la urbo.*



*Kemia sterko grandkvante produktata de la Giangdu-a Kemisterka Fabriko, Giangsu-provinco, estas liverata al la vilaĝoj.*

de laboristoj kaj oficistoj de la komercaj fakoj plialtiĝis. Ili ekkomprenis klare, ke la komercaj fakoj estas grava pozicio de la batalo inter la proletaro kaj burĝaro, inter la du vojoj de socialismo kaj kapitalismo, kie troviĝas la batalo tiel sur ekonomia flanko, kiel ankaŭ sur politika kaj ideologia flankoj. Tial, kunlige kun la socialisma eduka movado, la vasta amaso de revoluciaj laboristoj kaj oficistoj aktive sin ĵetis en tiun ĉi grandan revolucion movadon senprecedencan en historio. Kunagante kun la ruĝaj gvardianoj en diversaj lokoj, ili rompis ĉiujn malnovajn ideojn, kulturon, morojn kaj kutimojn de la ekspluatitaj klasoj, kaj starigis la novajn ideojn, kulturon, morojn kaj kutimojn de la proletaro, kaj ŝanĝis la kapitalismajn administrajn metodojn kaj stilon en certaj flankoj. Tiel, la fizionomio de la merkato profunde ŝanĝiĝis, kaj pli klare speguliĝis la karaktero de la socialisma merkato servi al la industria kaj agrikultura produktado kaj al la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj.

La prospero de la urba kaj kampara merkatoj en la tuta lando rezultis el tio, ke la vasta amaso de komercaj laborantoj armis sin per la penso de Maŭ Zedong, kaj direktis sian altan revolucion aktivecon al la laboro de aĉetado, provizado, transportado kaj konservado, tiel ke ĉiuj taskoj estis multe, rapide, bone kaj ekonomie plenumitaj.

## KURANTAJ AFEROJ

### En Konstruado

(daŭrigo de p. 45)

Laŭplane, la konstruo estos finita en du sezonoj de printempo kaj aŭtuno, sed dank' al energia laborado de la konstruantoj, ĝi estis plenumita nur en tri monatoj. Pasintjare, en la tempo de la riverŝvelado, estis maro da akvo trans la digo longa je kvindek kilometroj, sed interne de la digo la vasta smeralde verda plantplena kamparo ampleksanta pli ol centmil muojn trovis sin tute sekura. Kaj aŭtune, oni havis riĉan rikolton. La antaŭdata finkonstruo de la digo instruis la gubernian komitaton kaj ankaŭ la vastan popolamason, tiel ke ili profunde ekkomprenis, ke se ili nur posedas la penson de Maŭ Zedong, ili povas ĉion movi, ĉion transformi kaj ĉion venki.

### AKRILONITRIL-LABOREJO KONSTRUITA

Nova laborejo por produkti akrilonitrilon (angle: acrylonitrile) estas konstruita kaj funkciigata por regula produktado lastan aŭtunon.

Akrilonitrilo estas grava interaĵo por fabriki novan sintezan materialon. Post polimerigo, oni povas elfari el ĝi bonajn fibrojn por fabriki ŝtofon kaj artefaritan lanfadenon kun ecoj varmkonserva, elasta, mola, malpeza, fortika kaj rezista kontraŭ ŝimo kaj insektoj. Krome, kunpolimerigita kun aliaj kemiaĵoj oni povas fari el ĝi bonegajn sintezan kaŭĉukon kaj plaston, kiuj estas vaste uzataj en la industrio, agrokulturo kaj nacia defendo.

Tiu ĉi nova laborejo estas entute projektita, konstruita kaj ekipita de nia lando mem.

### DUTAVOLA PINĈA GLACEIGA MAŜINO

La maŝino ĝenerale uzata por glaceigo en pres-tinkturaĵoj fabrikoj de diversaj landoj de la mondo, estas de unutavola tipo, kun unu ekstremo por enigo kaj la alia por eligo.

Lihin-a Tria Prestinktura Fabriko k. a. entrepreno en Ŝanhajo, sukcesis fari dutavolan pinĉan glaceigan maŝinon (angle: double layer clip chain mercerizing machine) dank' al kio ĝia produktkvanto altiĝis je 80% sen novaj ekipaĵoj kaj plivastigo de laborejo. Tio estas nova tekniko en la mondo. La maŝino nun estas en amasa produktado.

# MIAJ OK JAROJ

HJE JUE (Ŝpinistino de Tajjuana Ŝpinteksejo)

**Ĝ**IS nun jam pasis ok jaroj, ekde la jaro 1958, en kiu mi venis labori en tiu ĉi ŝpinteksejo.

Tiam mi estis 16-jara, verdire, mi ankoraŭ estis ludema knabino. Mi tre ŝatas la jaron 1958, kaj mi ankaŭ ŝatas ĉiam rememori ĝin. En tiu jaro la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio kaj Prezidanto Maŭ elmetis la Ĝeneralan Linion: Streĉi plene la energion kaj strebi forte antaŭen por multe, rapide, bone kaj ekonomie konstrui socialismon. En tiu jaro la tutlanda popolo faris la entuziasman antaŭensaltegon. Ankaŭ en tiu jaro mi surmetis la veston de ŝpintekstistino kaj eniris la vicojn de la laborista klaso, kaj la Partio kaj Prezidanto Maŭ fiksas ruĝan

radikon en mia penso. Nun, kiam mi ekrememoras la jaron 1958, mi ĉiam sentas varmegon en mia koro kaj neelĉerpeblan energion en mia korpo.

Tiuj ok jaroj estas jaroj, dum kiuj la Partio kulturis kaj edukis min, dum kiuj la penso de Maŭ Zedong komencis enradikiĝi en mia cerbo, kaj dum kiuj iris en mia penso la batalo por starigi la proletan ideologion kaj elimini la burĝan ideologion.

## Sub la Standardo de Antaŭensaltego

La antaŭensaltego fiksas ruĝan radikon en mia koro: ĉiam streĉi plene la energion, strebi forte antaŭen, disrompi superstiĉon kaj kuraĝi pensi kaj agi por la revolucio. Kiam mi ne povis progresi, mi rememoris pri la sperto de la antaŭensaltego. Rememorante pri la antaŭensaltego, mi regajnis mian forton: mi devas sturmi antaŭen, kiam mi posedas bonajn kondiĉojn, kaj kiam ne, mi devas krei tiajn por sturmi antaŭen!

En 1958, en la unua tago kiam mi eniris en nian ŝpinteksejon, antaŭ mi unue vidiĝis la granda ruĝa slogano: Streĉi plene la energion kaj strebi forte antaŭen por multe, rapide, bone kaj ekonomie konstrui socialismon. Post nia alveno la fabrikaj gvidantoj kuraĝigis nin dirante, ke ni devas kuraĝi pensi kaj agi kaj diligente lerni de la majstrinoj, por ke ni povu pli frue manipuli la maŝinojn kaj prizorgi pli multe da spindeloj. Ĉio, kion mi vidis kaj aŭdis, estis la antaŭensaltego. Tiam mi ankoraŭ ne komprenis la grandan signifon de la antaŭensaltego, tamen mi sentis ĝojon en mia koro kaj mi estis plena de forto. Mi nur havis deziregon tuj ellerni la teknikon kaj ekŝpini super la maŝino. Tio estis mia

*Hje Jue (la dua maldekstre) komunikas al siaj koleginoj la progresintan metodon de manipulado.*



korsento kaj ankaŭ la deziro de ĉiuj novaj laboristinoj, kiuj venis al la ŝpinteksejo tiutempe. La gvidantoj komprenis tion, kaj rompis la malnovan rutinon de sesmonata trejnado. Post la unumonata lernado pri politiko kaj ellerno de la elementa tekniko pri kunligo kaj ŝanĝo de fadeno, ni estis permesitaj labori super la maŝino, por ke ni lernu dum laborado, laboru dum lernado, lernu dum provado kaj kreu dum lernado.

En la unua tago, mi prizorgis cent spindelojn. Post la laborhoroj mi sentis malkontenton. Mi demandis la majstrinon, ĉu mi ne povas prizorgi pli multe da spindeloj. Ŝi, plena de ĝojo, respondis al mi: Vi prizorgu ducent morgaŭ!

La sekvintan tagon mi vere prizorgis ducent spindelojn. Post du tagoj mi denove sentis, ke mi ne plene uzis mian energion, kvankam mi prizorgis ducent. Ree mi demandis la majstrinon, ĉu la spindeloj povas esti ankoraŭ plimultigitaj. Post pripenso ŝi diris: “Se alia ducent estas aldonita, la tuto estas la nombro de la spindeloj de unu maŝino. Tiam oni devus fari rondiron. Ĉu vi povos ankaŭ tion fari?” Mi tuj sugestis: “Ĉu estas permesite, ke mi prizorgu kvarcent spindelojn en la sama pasejo?” Ke oni prizorgas kvarcent spindelojn en la sama pasejo, sen eliro el ĝi kaj rondiro, tio estis neregula labormetodo. Mi timis, ke la majstrino ne konsentos tion al mi. Ekster mia imago ŝi respondis kun granda ĝojo: “Bone, laboru laŭ la maniero kiun vi sugestis.”

La gvidantoj permesis al ni, ke ni venu al la maŝinoj por labori, lerni kaj sturmi en la praktikado. Tiel, post kelkaj tagoj ni iniciatis kelkajn novajn aferojn ne-“regulajn”. Ĉu tiuj ne-“regulaĵoj” taŭgis aŭ ne? Tiutempe mi sentis, ke ili taŭgas, sed mi ne povis klarigi la kaŭzon. Poste mi studis la verkojn de Prezidanto Maŭ, kaj mi komprenis, ke estis tre bone, ke oni rompis dum la antaŭensaltego la malnovan rutinon pri la trejnado de novaj laboristinoj, permesante ilin labori super la maŝino post mallonga periodo de politika edukado por ke ili lernu dum laborado kaj laboru dum lernado.

### Havi Rivalon por Antaŭenmarŝo

Dum la antaŭensaltego la gelaboristoj estis plenaj de energio kaj kuraĝis iniciati kaj preni sur sin novan taskon. Ankaŭ la kadroj estis plenaj de energio. Ili venis labori kune kun ni kaj ludis la rolon de antaŭirantoj. Ili ofte alportis por ni akvon kaj manĝaĵojn. La gelaboristoj sincere estimis kaj laŭdis ilin.

Sub la instigo de la kadroj mi sentis, ke mi akiris pli grandan kuraĝon por sturmi antaŭen. Iutage, kiam mi iris al la manĝejo, mi vidis ĉe la pordo brile ruĝan afiŝon, en kiu oni laŭdis la novan laboristinon Li Jagie pro tio, ke ŝi jam kapablas prizorgi sescent spindelojn. Mi tuj iris al mia majstrino kaj postulis, ke ŝi permesu al mi prizorgi ankaŭ sescent. La majstrino kaj la kadroj aprobis mian ideon. Sekve, en la deka tago post la laborado super la maŝino, mi sukcesis prizorgi sescent spindelojn.

Tio vekis la senton en mi, ke mi devas havi rivalon, se mi volas fari progreson. Kaj havante rivalon, mi povos trovi miajn proprajn mankojn, tuj starigi la celtabulon por pliperfektigi min, tiel ke mi pli rapide progresos. Poste mi trovis kamaradinon, kiu prizorgis okcent spindelojn. Mi lernis de ŝi kaj postkuris ŝin kun mia tuta forto. Rezulte, mi sukcesis prizorgi okcent spindelojn post kiam mi laboris iom pli ol dudek tagojn. Samtempe mi instigis min serĉi pli superan rivalon. Tiam la gvidanto instigis min demandante: “Ĉu vi kuraĝas sturmi al mil spindeloj?” Senhezite mi respondis: “Jes.” Nur la malnovaj laboristinoj kapablis prizorgi mil spindelojn, sed mi tamen sukcesis dank’ al la subteno de la majstrino kaj la gvidantoj de la fabriko.

Estis sur la fronto de la antaŭensaltego, ke mi aliĝis al la Ĉina Komunisma Junulara Ligo.

### Trovi la Kaŭzon de Manko

Dum la tri jaroj de antaŭensaltego mi atingis iujn rezultojn dank’ al la aŭdaca provado kaj akiris riĉan sperton. Sed ĉiu afero estas dividita en du flankojn: atingoj unuflanke kaj mankoj aliflanke. La antaŭensaltego hardis min al kuraĝaj pensado kaj agado, tiel ke mi ekhavis energion por fari iniciatojn. Sed mi ne bone utiligis tiun energion, ĉar mankis al mi la scienca sinteno esplori la leĝojn de objektivaj aferoj. Kvankam mi plialtigis mian kapablon prizorgi la spindelojn, tamen mi ne plibonigis la kvaliton de la fajnaj fadenoj.

La trijara reĝustigo rimarkigis al mi, ke mi ne konscie studis la verkojn de Prezidanto Maŭ, tial mi ne plene komprenis la spiriton de la Ĝenerala Linio. Pro tio mi atentis nur pri multeco kaj rapideco sed ne pri boneco kaj ekonomio. En mia penso ekzistis individuisma fiereco. Kiam mi kuratingis la antaŭirantojn, mia deirpunkto ne estis “plene” kaj “ĝisfunde” servi al la popolo, sed mi alprenis la eraran sintenon, pensante ke “ne nur vi laboras rapide, sed ankaŭ mi”. Krome,

mi ne estis perfekta en tekniko, ĉar mi ankoraŭ ne konis la objektivajn leĝojn de la aferoj.

### Post la Legado de Verkoj de Prezidanto Maŭ

Dum la tri jaroj de reĝustigo, sub la inspirado kaj edukado de la gvidantaro de la fabriko, mi komprenis la veron, ke fero ne fariĝas ŝtalo sen forĝado, kaj ke laboristoj ne povas sane maturiĝi sen studi la verkojn de Prezidanto Maŭ. Tiel plialtiĝis mia memkonscio de la studo de la verkoj de Prezidanto Maŭ.

En tiuj tri jaroj mi tralegis volumojn 1-3 de la *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*. Kelkajn artikolojn, ekzemple, "Servu al la Popolo", "Rememore al Norman Bethune", "Montotranslokigo Fare de la Malsaĝa Avo", "Pri Kontraŭdiro", "Pri Praktiko", k. c. mi legis pli ol dek fojojn. En 1963 mi jam kutimiĝis studi ĉiutage la verkojn de Prezidanto Maŭ. Se mi ne legis liajn verkojn en unu tago, mi sentis kvazaŭ mi ne manĝus, al mi mankis energio kaj rimedo en laborado, kaj

mi ne povis kontraŭstari malfacilojn kaj iris eraran vojon.

Mi estas obstina en karaktero. Mi neniam volas cedi, kiam mi trovas, ke mi estas malpli lerta ol aliaj. Sekve la individuisma fiereco kaj la revolucia malcedemo ĉiam interbatalis en mia kapo. Nur post la studo de la verkoj de Prezidanto Maŭ mia revolucia malcedemo iom post iom montris sin supera kaj subigis la individuisman fierecon.

Majstrino Li Gujĵing, kiu laboris kun mi en la sama laborejo, estis tre kompetenta en tekniko. Ŝi kapablis tiel rapide kunligi fadenojn, ke ŝi povis fari dudek kunligojn en unu minuto. Mi povis fari dek naŭ en unu minuto, nur je unu malpli ol ŝi. Laŭ racio, mi devis diligente lerni de ŝi. Sed, en la komenco, mi pensis malcedeme: Mi ne lernos vian sperton, tamen mi certe superos vin. Tial mi tutforte klopodis pliperfektigi mian teknikon, kun sola intenco superi majstrinon Li. Estis mirinde, ke malgraŭ mia granda penado mia nombro ĉiam restis dek naŭ.

*Hje Jue studas la verkon de Prezidanto Maŭ kune kun siaj kolegiinoj.*



Konstatinte mian afliktiĝon, la sekretario de la partia filio vizitis min por intime paroli kun li. Mi detale rakontis al li, kiel mi klopodis atingi kaj superi majstrinon Li. Finaŭskultinte min, li konsilis, ke mi studu la artikolon “Rememore al Norman Bethune” kaj trovu en ĝi forton kaj rimedon.

Post la laborhoroj mi studis tiun artikolon. Kvankam mi jam antaŭe studis ĝin, sed ĉi-foje la studo sentigis al mi apartan intimecon, kaj la frazon “**Antaŭ ĉiu afero, ili unue kalkulas por si mem.**” Prezidanto Maŭ diris kvazaŭ speciale al mi mem. Kiam la aliaj antaŭiris min, mi tuj estis en malgaja humoro. Ĉu tio ne estis elmontriĝo de egoismaj pensoj?

Demetinte la libron, mi profundigis en pensado: Mi volis superi majstrinon Li, ĉar mi ne deziris esti senentreprenema homo en la vicoj de revoluciuloj, tial ne povas esti dirite, ke mi neniom zorgas pri la revolucio. Sed en tio ankoraŭ enmiksigis multe da malĝustaj ideoj, ĉar mi ne povas toleri la fakton, ke alia iras antaŭ min kaj estas laŭdata en la laborejo, dum mi estas preskaŭ same lerta, sed ne laŭdata. Kaj mi opiniis, ke la progreso kaj sukceso de alia forprenis de mi la honoron, pro tio mi, streĉita de malkontento, decidis nepre superi ŝin. Pro kio mi do havis ĉi tian penson? Ĉu ne pro mi mem? Kaj kia estas mia penso? Ĉu ĝi ne estas egoisma penso?

Komparante min kun Bethune mi reliefigis mian neproletan penson.

Leginte “Rememore al Norman Bethune”, mi plie eklegis la artikolon “Servu al la Popolo”. Prezidanto Maŭ diris: “**Ni alvenis el plej diversaj anguloj de nia lando kaj kolektiĝis kune por komuna revolucia celo.**” Mi pensis, ke Li Gujĝing estas mia klasa fratino kaj mia kamaradino, sed mi rigardas maljuste al ŝi. Ŝi plirapidigis la kunligon de fadenoj nur pro tio, ke ŝi volas pli multe ŝpini por la revolucio. Tamen mi nur volis, ke mi superu la alian kaj la alia ne superu min. Ju pli profunde mi pripensis, des pli mi sentis la batadon de mia koro, la ardiĝon de mia vizaĝo, kaj la malpravon de mia sinteno al mia klasa fratino. Laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ mi forlasis la ideon superi la antaŭiranton pro individuisma konsidero kaj firmigis mian decidon superi tiun nur por revolucio.

Poste mi faris kamaradinon Li mia majstrino kaj atenteme lernis ŝian sperton. Post periodo da lernado mi ne nur akiris ŝian sperton, sed ankaŭ trovis dum mia lernado, ke ŝi faras tro grandan cirkon ĉirkaŭ la faden-kondukilo kaj per tio malŝparas tempon. Mi atentigis ŝin pri tio. Samtempe, mi trovis solvon por tio dum mia praktikado, kaj mi sciigis al ŝi mian personan sperton. Tia-

maniere mia rapideco de kunligo baldaŭ superis dudek.

El tio mi profunde ekkomprenis ke kiam ni posedas la penson de Maŭ Zedong, ni povas konkuri ĉion, sed kiam ni forlasis la penson de Maŭ Zedong, ni povas iri antaŭen eĉ ne unu colon.

Pli poste, el “Pri Kontraŭdiro” mi pliaŭskultinte komprenis ke interne de iu ajn afero ekzistas batalo de kontraŭaĵoj, kaj ke sub certaj kondiĉoj unu el la kontraŭaĵoj, tra batalado, venkos la alian kaj ili transformiĝos unu al la alia. Post profunda pripenso mi trovis, ke tiu ĉi vero, kiun Prezidanto Maŭ instruis al ni, ĝuste klarigas la procezon en kiu mi konkuris kun majstrino Li kaj poste superis ŝin. Kiam mi ekhavis la deziron superi ŝin en mia kapo estiĝis batalo de kontraŭaĵoj, tio estis batalo inter individuisma heroismo kaj revolucia heroismo. Dum tiu batalo mi studis la verkojn de Prezidanto Maŭ kaj ekposedis la penson de Maŭ Zedong — la plej bonan batalilon, kiu rezultigis la venkon de revolucia heroismo super la individuisma heroismo. Tiamaniere mi forlasis la ŝarĝon en mia penso superi alian pro individuisma konsidero, kaj firmigis mian kredon superi alian por revolucio. La individuisma malcedemo fariĝis revolucia malcedemo.

### Serĉi Objektivajn Leĝojn de Ŝpinado

Poste, sub la direktado de la filozofia penso de Prezidanto Maŭ, mi plue provis serĉi la objektivajn leĝojn de ŝpinado por plialtigi la kvaliton de la produktaĵo. Antaŭe, mi ofte faris tuberon tie, kie la du fadenoj estis kunligitaj. En la komenco mi atribuis tion al la fakto, ke mi ne bone posedas la manieron de kunligado. Tial mi plenforte ekzercis min en kunligado, sed malgraŭe la tuberoj ankoraŭ aperis.

Kial ĉiam aperis tuberoj? Kun tiu ĉi problemo mi denove studis la verkojn de Prezidanto Maŭ.

Prezidanto Maŭ diris: “Se oni volas sukcesi en sia laboro, t. e. atingi la antaŭkonceptitajn rezultojn, li nepre devas konformigi siajn pensojn al la leĝoj de la objektiva ekstera mondo; alie li fiaskos en praktiko”.

La instruo de Prezidanto Maŭ lumigis mian koron. Mi pensis, ke same kiel aliaj aferoj la kunligado de fadenoj ankaŭ havas sian propran leĝon. Se mi ne konas tiun leĝon kaj ne agas laŭ ĝi, kiel mi povas malaperigi la tuberojn?

Por trovi tiun objektivan leĝon mi observis apud alies maŝino post mia labordeĵoro. Ofte mi staris kelkajn horojn forgesante mian manĝon kaj lacon. Lerninte alies spertojn mi denove pene ekzercis min. Tiamaniere mi lernis la spertojn de



pli ol tridek kamaradinoj. Tamen, ne efikas nur la lernado de la spertoj de aliaj. Laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ mi ekzamenis alies spertojn per mia propra praktikado, eltiris tion, kio estis utiligebla, rifuzis tion, kio estis neutiligebla, aldone enmetis tion, kio estis propra al mi mem kaj faris provon fojon post fojo. Tiel mi fine trovis la manieron de kunligado “malpeze ŝovi la rompitan finon supren ĝuste kontraŭ la paralelaj fibroj”. Tio fundamente efektivigis kunligon sen tubero.

### Antaŭ la Nova Situacio

Post tri-jara antaŭensaltego oni akiris riĉan sperton. Post trijara reĝustigo la sperto estis resumita. Tiam aperis nova alttaĵdo de produktado tra la tuta lando, kaj la partia komitato de nia ŝpinteksejo elmetis la alvokon por plimultigo de produktaĵoj sen plimultigo de laborantoj. Mi treege ekscitiĝis, ke mi donis al mi mem la taskon prizorgi 1,600 spindelojn. En tiu momento iuj maltrankviliĝis, supozante ke tio malbone efikas al la kvalito de la produktaĵoj. En mia koro mi deziris “elmergiĝi je la pinto” por la revolucio, sed kelkfoje mi timis “elmergiĝi”.

Kun tiu ĉi problemo mi denove studis la verkojn de Prezidanto Maŭ. La instruo de Prezidanto Maŭ donis al mi klaran ideon, akriĝis miajn okulojn kaj difinis mian direkton. Mi pensis: Mi ne devas timi la malkovron de miaj mankoj sur la vojo antaŭen, se mi volas “elmergiĝi”; mi ne devas timi malfacilojn nek riskojn, se mi volas fari revolucion. La verkoj de Prezidanto Maŭ ebligis al mi kompreni ian veron kaj akiri iujn ĝustajn vidpunktojn.

Dum “elmergiĝado” neeviteble malkovriĝos mankoj. Tio estas objektiva leĝo. La afero ĉiam tiel statas, ke tio, en kio oni jam lertiĝis, ne facile vidigas mankojn kaj malofte kaŭzas erarojn. Sed en la saltego al pli alta nivelo troviĝas multo, en kio oni ne lertiĝas, kaj tio facile malkovros mankojn kaj neeviteble kaŭzos erarojn. Tamen, la procedo konkeri la mankojn kaj reĝustigi la erarojn estas antaŭenmarŝo.

“Elmergiĝo” certe altiros la atenton de la amaso. Tio estas objektiva leĝo. Kiam la amaso observas, multaj paroj da okuloj direktas sin al la “elmergiĝinta pinto”. Ili rigardas detale kaj senpreterlase, ke ili trovos tiujn mankojn, kiujn mi mem ne vidis kaj ili elmetos tiujn opiniojn, kiujn mi mem neniam pripensis. Tio montras la zorgemon kaj kontrolon de la amaso rilate al la “pinto”.

“Elmergiĝo” memkompreneble rompos la malnovan ordon kaj detruos la malnovan ekvilibron. Tio estas ankaŭ objektiva leĝo. Kiam la malnova ordo estas rompita, oni povas starigi novan ordon. Kiam la malnova ekvilibro estas detruita, oni povas

aranĝi la novan. Tiamaniere, ondo post ondo, nia revolucia afero senĉese antaŭenpuŝiĝos.

Kompreninte la veron kaj akirinte korektajn vidpunktojn, mi sentis ke la demando, ĉu oni kuraĝas aŭ ne “elmergiĝi”, estas esence demando kun granda signifo, t. e.: ĉu oni kuraĝas aŭ ne fari revolucion, fari oferon por ĝi kaj faligi batale la ideon “mi”. Sekve, mi faris la decidon, ke mi nepre “elmergiĝu”.

### Nova Antaŭensalto

En marto de la pasinta jaro la nombro de la spindeloj, kiujn mi prizorgis, fine plialtiĝis de 1,200 al 1,600.

Tio estis la unua fojo, ke mi “elmergiĝis” post trijara reĝustigo.

El la procezo de tiu ĉi “elmergiĝo” mi konstatis, ke estas io nova kompare kun la trijara antaŭensaltego de 1958 ĝis 1960. Ĉefe estas la alesto de “stabileco” kaj la elstarigo de “boneco”. Atento estas ankaŭ donita al la kombino de laborfervoro kun necesa ripozo. Post pli ol kvar monatoj da provado kaj praktikado, de kiam mi en marto plimultigis la nombron de prizorgitaj maŝinoj kaj spindeloj, nur en la komenco de julio, oni komencis disvastigi la sperton en la ŝpinteksejo sub organiziteco kaj gvidado. Kvankam dum la plimultigo de la prizorgitaj maŝinoj kaj spindeloj aperis iuj mankoj, tamen post mia penado kaj sub la helpo de la gvidantoj kaj gekamaradoj mi resumis la metodon de rondirado en prizorgado de 1,600 spindeloj, plue plibonigis la laboron de purigado, kaj plialtiĝis la rapidecon kaj kvaliton de la laboro de faden-kunligado, tiel ke la novaj problemoj aperintaj post la “elmergiĝo” komencis esti solvitaj. Kaj la nova pasiva situacio transformiĝis en novan aktivan situacion, kaj mi komencis posedi novan aktivecon sub la kondiĉoj de prizorgado de 1,600 spindeloj. Ankaŭ estis atingite ke la tuta laboro estas plenumata senakcidente. Plej ĝojigis min la fakto, ke la “elmergiĝo” en produktado estis efektiva ne nur de mi mem sed ankaŭ de multaj aliaj en nia ŝpinteksejo. Tio estigis novan antaŭensalton en nia produktado.

Kion mi neniam forgesos dum mia tuta vivo estas tio, ke mi vidis nian grandan gvidanton Prezidanton Maŭ en la Nacia Festtago de la pasinta jaro. Starante apud Prezidanto Maŭ mi larmis de emocio. Tiam mi ĵuris en mia koro, ke mi ĉiam restos fidela al la penso de Maŭ Zedong. Tio estas ĵuro por mia tuta vivo. Mi devas pliintense studi kaj plibone posedi la penson de Maŭ Zedong — la plej bonan armilon, por batali kontraŭ miaj propraj mankoj kaj senĉese marŝis antaŭen al la pinto.



# Kiu Revolucias. Devas Studi Verkojn de Prezidanto Maŭ

LI DONG

ĈE iu landlima gvardio en Tibeto, cirkulas kortuŝa rakonto pri tibeta armeano, kiu ne scipovis legi sed pene kaj diligente studas verkojn de Prezidanto Maŭ.

Tiu armeano estas nomata Cering Ĉojfel.

En aŭtuno de 1965, li eniris en la vicaron de la Ĉina Popola Liberiga Armeo, kaj same kiel aliaj rekrutoj li havis por ĝi senton de senlima admiro.

En la Liberiga Armeo, la granda lernejo de la penso de Maŭ Zedong, la unua leciono, kiun li ricevis, estis *Servu al la Popolo*. Post la eksplikado de la politika direktanto, la batalantoj komencis laŭtleĝon. Tiam Cering Ĉojfel tre maltrankviligis tiel ke lia frunto ekŝvitis, ĉar li ja ne sciis legi. La vica politika direktanto Traŝi alpaŝis al li kaj diris intime: “La verkoj de Prezidanto Maŭ estas ‘trezoro’, en kiu ĉiu frazo estas revolucia vero. Kiu revolucias, devas studi verkojn de Prezidanto Maŭ. Kiu ne legas ilin, tiu trovas sin kvazaŭ blindulo en irado ne povanta sin movi antaŭen eĉ je unu colo.” Kaj li aldonis: “La vojo kuŝanta antaŭ vi estas sufiĉe malfacila, vi devas ja samtempe konkeri la citadelon de legscio dum via studo de verkoj de Prezidanto Maŭ.”

Kial li ne scipovis legi? Tiu demando vekis al li memorojn pri la pasinteco.

Antaŭ la Liberiĝo, en iu neĝblova vespero, lia panjo eskapis el la domo de servutulmastro kune kun li kaj liaj sep gefratoj. Portante nur ĉifonan ŝaffelon sur la korpo, ili ne povis rezisti la atakon de la ventego kaj neĝfrosto. Post kelkaj tagoj mortis liaj tri pliaĝaj fratoj kaj unu fratineto pro malvarmo kaj malsato. Poste ili venis al Ŝkaze kaj li almozpetadis sur la stratoj, vivante nehoman vivon.

Rememorante tion, li ne povis reteni siajn varmajn larmojn. Lia sango bolis pro la malamego al la krima feŭdisma servutsistemo kaj la senlima amo al la Partio kaj Prezidanto Maŭ, ke li longe ne povis kvietiĝi en si. Kiel mi povus esti la nuna Cering Ĉojfel sen la Partio kaj Prezidanto Maŭ! — li pensis. La favoro de Prezidanto Maŭ estas pli alta ol la monto Himalajo kaj pli longa ol la rivero Jalucangpu! Li forviŝis la larmojn kaj ĵuris decideme: Mi legos la verkojn de Prezidanto Maŭ, aŭskultos liajn vortojn kaj sekvos lin la amatan revolucii dum mia tuta vivo!

Li komencis sian lernadon kun forta deziro studi la “trezoran” libron pro revolucio. Li aĉetis notlibron kaj petis sian batalamikon skribi sur la unua paĝo la vortojn “Vivu Prezidanto Maŭ” kaj sur la dua paĝo la vortojn “Servu al la popolo tutkore kaj plenanime”. Ekde tiam li lernas ĉiam kaj ĉie. En laborpaŭzo, li skribis per sia fingro sur la tero por sin ekzerci en skribado. Dum la intertempo de trejnado, li tenis la pafilon per unu

mano kaj per la alia li skribis sur la malmola tero la vortojn "Vivu Prezidanto Maŭ". Kiam lia montra fingro sangis pro troa frotado, li ekuzis anstataŭ ĝi la longan fingron. Kiam falis neĝo, li ne haltigis sian lernadon kaj skribis fingre sur la neĝo. Kiam liaj fingroj rigidigis pro frosto, li ilin proksimigis al la buŝo, haŭ-is al ili kaj frotis ilin sur la manplato, kaj tiel daŭrigis sian ekzercadon. Finfine, li jam povis nete skribi la vortojn "Vivu Prezidanto Maŭ". Kiel ĝoja li estis! "Vivu Prezidanto Maŭ!" li laŭte kriis nereteneble.

Post tio li lernis aliajn artikolojn de Prezidanto Maŭ kaj tio portis al li pli grandan malfacilon. La politika direktanto konsilis al li lerni la artikolon *Montotranslokigo Fare de Malsaĝa Avo*. Li voĉlegis ĝin por Cering Ĉojfel kaj klarigis ĝian enhavon vorton post vorto kaj frazon post frazo. "Alfronte al malfaciloj," li kuraĝigis Cering Ĉojfel, "vi devas havi la spiriton de Malsaĝa Avo translokigi montojn. Nur tiel vi povos ilin konkeri." Reveninte al sia subplotono, Cering Ĉojfel petis sian batalamikon voĉlegi por li kaj mem sekvis la legadon. Li pensis en si: La Malsaĝa Avo havis firman volon translokigi montegojn, kaj mi, batalanto de la Liberiga Armeo, devas havi volon eĉ pli firman ol la Malsaĝa Avo. Li prenis sin kiel la Malsaĝan Avon kaj analfabetecon kiel la montegon, kaj faris firman decidon konkeri tiun kulturan citadelon.

Ekde tiam, li ĉiam portis kun si verkon de Prezidanto Maŭ. Li petis ĉies klarigon kaj legis ĝin en ĉiu libera minuto. Li eĉ ne preterlasis la "ruĝajn koltukojn" (junpionirojn) por fari demandojn. Vidante ke li lernis verkojn de Prezidanto Maŭ tiel diligente, iuj el la "ruĝaj koltukoj" estis tre kortuŝitaj kaj volonte instruis al li voĉlegadon kaj lernigis al li skribadon movante lian manon per mano. Por pli bone sin ekzerci en skribado, li faris por si lignan skribilon, longan je 5-6 coloj, sur kiu estis gravuritaj la vortoj "klerigi sin pro revolucio", kaj per ĝi li lernis skribadon sur tero aŭ sablejo. Tagon post tago ĝia longeco reduktiĝis ĝis nur 2-3 coloj. Liaj batalamikoj ĉiuj kortuŝigis pro lia diligenteo en lernado de la verkoj de Prezidanto Maŭ. Ili diris kun estimo kaj admiro: Tio, kion Cering Ĉojfel forkonsumis, estas nur ligna skribilo; sed tio, kion li akiris, estas la ĉiamvenka penso de Maŭ Zedong. Cering Ĉojfel ne nur studis verkojn de Prezidanto Maŭ en ĉiuj liberaj minutoj, sed ankaŭ prenis multajn eldirojn de Prezidanto Maŭ kiel kantojn kaj kantis ilin ĉiutage. Post longa tempo, li jam povas tre bone parkeri multajn dirojn de Prezidanto Maŭ kaj ankaŭ uzi tiujn dirojn por direkti sian pensadon kaj agadon. Li diris: "Dum mia tuta vivo, mi

devas servi al la popolo tutkore kaj plenanime kiel Ĝang Side, fari bonon sole al aliuloj sen penso pri mi mem kiel Bethune, kaj trakti malfacilojn same sentime kiel la Malsaĝa Avo kiu pretis translokigi montojn."

En aprilo lastjare, sekeco trafis la Tibetan Alt-ebenejon, kie la legomoj plantitaj de la armeo pli kaj pli velkiĝis. Sub la brulanta suno, Cering Ĉojfel serĉadis akvofonton en la montaro. Vidante ke la legomoj de la armeo suferas sekecon, la najbaraj kamparanoj decidis cedi la akvofonton por unu tago al la armeo. Sed Cering Ĉojfel neniel volis ĝin akcepti. Montrante la fendigintajn grenkampojn de la kamparanoj, li diris: "Ankaŭ viaj kampoj bezonas la akvon!" Ambaŭ flankoj ne povis cedi la alian, kaj fine Cering Ĉojfel devis konsenti akvumi siajn legomojn por unu vespero. Sed, vespere, ne longe post kiam la akvo fluis en la legomkampojn, subite breĉiĝis la digeto. Nun, ĉiu guto signifas savon de unu legomo! Neniu guto da akvo devas esti vane perdita! Cering Ĉojfel pafe alsaltis, demetis sian surtuton kaj ŝtopis per ĝi la breĉon. Tamen, tio ne sufiĉis, tiam li aldonis sian trikitan veston. Sed la breĉo restis ankoraŭ ne ŝtopita. Li do simple kuŝigis sin sur la breĉon, kaj levis sin nur kiam alkuris liaj kamaradoj kaj plene ŝtopis la breĉon. Tiam lia tuta korpo estis plena de koto kaj akvo, sed la verko de Prezidanto Maŭ, kiun li portis kun si, estis tamen tute pura kaj sendifekta. Ĉiuj miris pri tio, kaj li diris ridante: "La libron mi metis ja antaŭe sur la teraltaĵo. La verko de Prezidanto Maŭ estas vivradiko de ni malriĉuloj! Forhaku la kapon kaj fluigu la sangon, sed la 'trezoran' libron de Prezidanto Maŭ oni neniam perdu!"


En la studo de la verkoj de Prezidanto Maŭ, Cering Ĉojfel gajnis riĉajn rikoltojn kaj en politiko kaj en sinklerigo.

Nun, li jam scias legi la verkojn *Servu al la Popolo, Rememore al Norman Bethune, Montotranslokigo Fare de Malsaĝa Avo kaj Analizo de la Klasoj en la Ĉina Socio*. Li ĉiam agas laŭ la instruoj de Prezidanto Maŭ kun la firma volo esti akcelanto ne nur de la ĉina revolucio sed ankaŭ tiu de la monda revolucio. Komencante kiel ordinara batalanto kaj kreskinta kiel servutulo, li jam fariĝis subplotonestro en malpli ol unu jaro post sia aliĝo al la armeo. En aŭgusto lastjare, li glorie aliĝis al la Komunista Partio de Ĉinio kaj fariĝis revolucia batalanto de proletaro. Ĉiuj lin laŭdis senĉese: Cering Ĉojfel estas plia firma daŭriganto de la revolucio sub la nutrado de la penso de Maŭ Zedong.

**En Konstruado**

**TRIFLANKE MEM-MALŜARĜA  
KAMIONO PRODUKTITA EN  
GINAN**

La Ginan-a Ĝenerala Aŭto-fabrika sukcesis provfari 7-tunan, 3-flanke mem-malŝarĝan kamionon kun fabrikmarko de "Flava Rivero". Ĝi povas klini sian plankon en tri direktojn, dekstren, maldekstren kaj malantaŭen, dum malŝarĝado, kies levtempo bezonas nur naŭ ĝis dekdu sekundojn, ĝia plej granda klinangulo povas atingi kvindek gradojn. Ĝi estas valora transportilo por konstruejoj kaj fabrikoj, kie multe da nepakitaj materialoj estas transportataj.



**ALBANA TRITIKO DONAS RIĈAN  
RIKOLTON SUR KINGHAJ-  
ALTEBENEJO**

Pasintjare, la bonspesia tritiko el Albanio, *Abobonza* plantita sur Kinghaj-altebenejo donis tre bonan rikolton ĝenerale. La plej alta produktkvanto en iuj lokoj atingis pli ol mil ĝinojn po muo.

Tiu specio de trikiko estis transportita tien la unuan fojon en 1957. Kiel vintra tritiko, estis malfacile por ĝi travivi la vintron, pro la malvarmega vintra klimato de Kinghaj, sed lokaj kamparanoj kaj agronomoj sekvis la instruojn de Prezidanto Maŭ kaj, post senĉesa praktikado kaj venkinte multajn malfacilojn, eltrovis la leĝojn pri kresko de tiu ĉi nova specio. Oni nun semas ĝin en printempo, rikoltas ĝin en aŭtuno, kaj akomodis ĝin iom post iom al la loka grundo kaj klimato, tiel ŝanĝante ĝin en printempan tritikon de Kinghaj-altebenejo. Dum la lastaj jaroj, la plantareo de tiu ĉi specio de tritiko etendiĝas jaron post jaro. Laŭ statistiko, pasintjare, en multaj tritikaj regionoj de la provinco Kinghaj, la plantareo de *Abobonza* ampleksis jam proksimume 70% el la totala areo de tritikplantado, kaj ĝia pomua produkto atingis ĉ. 500 ĝinojn.

**Ĉinaj Gefiloj**

**Nesubigeblaj**

**P**LI ol unu jaron, la reakciaj fortoj de la indonezia dekstrularo faris malhumanan persekutadon kontraŭ la elmigrintaj ĉinoj en Indonezio. Multaj elmigrintoj de nia lando estas mortigitaj, iliaj domoj estas forbruligitaj kaj havaĵoj forrabitaj. Nia registaro plurfoje faris fortajn protestojn kontraŭ la indonezia registaro, sed pli kaj pli furioziĝis la grandskala persekutado kontraŭ ĉinoj fare de la reakciaj fortoj de la dekstrularo. Por defendi laŭleĝajn interesojn de niaj elmigrintoj, nia registaro sendis speciale ŝipon al Indonezio por revenigi niajn suferantajn gefratojn, kiuj memvolas reveni al la patrio.

En la 10-a de oktobro, 1966, la unua grupo de pli ol mil persekutitaj ĉinoj, post multaj bataloj kaj venkoj super malhelpoj kaj malfaciloj, jam revenis en la sinon de sia patrolando, per la ŝipo Guanghai sendita de nia lando al Indonezio.

Dum sia restado en Indonezio, tiuj ĉi multe suferintaj elmigrintaj ĉinoj faris heroajn batalojn kontraŭ la dekstraj perfortuloj por rezisti la brutalajn persekutojn de la dekstraj reakciaj fortoj kaj defendi la dignon de la patrio. Ilia heroa batalado montris, ke ili indas esti nomataj ĉinaj gefiloj en la epoko de Maŭ Zedong kaj ĉinaj elmigrintoj varme amantaj sian grandan socialisman patrolandon.

En koluzio kun la spionoj de la bando de Ĉiang Kajŝek, la indonezia reakciularo sen-skrupule faris politikajn persekutojn kontraŭ la

elmigrantaj ĉinoj en la regiono de Atjeh. En Bandar Atjeh, la indoneziaj perfortuloj vane provis kulpigi false la ĉinojn pri "partopreno en la Afero de 30 Septembro". Kiam unu patriota ĉino estis kontraŭleĝe forkondukata de la perfortuloj, li jam ĉeloke malkovris la senhontan intrigon de politika persekuto kontraŭ la ĉinoj fare de la indonezia reakciularo. La perfortuloj, koleriĝintaj de honto kaj ĉagreno, unue forte pugnobatis la vizaĝon de tiu ĉi patriota ĉino kaj debatis al li unu denton, kaj poste ili metis sabron sur lian nukon por devigi lin trinki urin-fekajon. La ĉina patrioto forte indignis kontraŭ la brutalajo de la indonezia reakciularo, li per forta mansvingo debatis la fetoraĵon el la mano de la perfortulo, kaj pretis mortlukti kun li. Sed timigite de la brava rezisto de la patrioto, la perfortulo haste retropaŝis, kaj ne plu kuraĝis tuŝi lin eĉ je hareto, tiel bankrotis la fintrigo de politika persekutado.

Ekde la jarfino de 1965 ĝis aŭgusto de 1966, en la regiono de Atjeh regis rasisma teroro de opono kaj ekskludismo kontraŭ ĉinoj. La perfortuloj senditaj de la indonezia milita aŭtoritato ofte kriaĉis kontraŭĉinajn sloganojn sur stratoj en la noktomezo, atakis loĝejojn kaj butikojn de ĉinoj, eĉ trenis ilin el la lito eksterdomen, kaj batis ilin per pugnoj kaj piedoj, kaj devigis ĉinojn forlasi la regionon de Atjeh en la tempo fiksita de la milita aŭtoritato. La dekstraj perfortuloj de Kualasimpang noktomeze entrudiĝis en la domon


de Liu Jujing, ĉina virino kun ok infanoj, deklarante, ke ili mortigos ŝian tutan familion. Liu Jujing diris al si mem: La morto ne povas timigi la ĉinan popolon! Mi estas la elmigranta popolano de la Ĉina Popola Respubliko kaj ne hontigos mian patrimon antaŭ la indoneziaj perfortuloj! Ŝi ĵetis koleregan rigardon al tiuj dekelkaj perfortuloj, kaj fingromontrante kriis al ili riproĉe: "Venu! Mortigu min, se vi kuraĝas! Aŭskultu, ni nepre venĝos nin, se vi nur ne sukcesos mortigi ĉiujn ĉinojn!" Ŝia sentima sinteno timigis la perfortulojn, kiuj senvorte interrigardis sin vizaĝo kontraŭ vizaĝo kaj forŝteliĝis unu post alia.

La granda socialisma patrolando gvidata de Prezidanto Maŭ estas potenca apogo por la elmigrantaj ĉinoj. Kaj la granda penso de Maŭ Zedong estas neelĉerpebla forto en ilia batalo kontraŭ la malamiko. Multaj patriotaj ĉinoj ankoraŭ persistis en studado de la verkoj de Prezidanto Maŭ eĉ sub la kruela persekutado de la dekstraj reakciaj fortoj de Indonezio. En la batalo kontraŭ la persekutado, niaj elmigrantoj ĉiam trovas kuraĝon kaj fortojn pensante pri Prezidanto Maŭ kaj la granda patrolando. Ili ĵuris je morto por defendi la honoron de sia patrio kaj la altan prestiĝon de Prezidanto Maŭ. Iutage, la ĉinoj en la tuta urbo de Lhokseumawe ĉiuj estis perforte kolektitaj de la dekstraj perfortuloj sur placo por turmenti ilin sub la brulanta suno. Por tio la ĉinoj multe suferis de soifo, vundiĝis haŭte pro

*La suferintaj elmigrantaj gefratoj revenis en sian patrimon, kriante kun ekscito: "Vivu Prezidanto Maŭ! Vivu! Vivu Longe!"*



*Persekutitaj elmigrintaj ĉinoj studas la verkojn de Prezidanto Maŭ sur la ŝipo Guanghua.*



la brula varmego, kaj sur la piedoplendoj aperis brulvezikoj, sed tio ne povis bruldifekti ilian fortan volon en defendo de la digno de la patrolando. Kiam la dekstraj perfortuloj devigis ilin krei sloganojn malhonorigajn kontraŭ sia patrio kaj gvidantoj de la ŝtato, neniu el la indignantaj ĉinaj elmigrintoj priatentis la ordonon de la perfortuloj. Tiuj ĉi furioziĝis pro tio kaj freneze batis ilin, sed neniu el la ĉinoj submetiĝis. Ili male laŭtkriis: “Faligu la usonan imperiismon!” “Faligu la reakciajn fortojn de Indonezio!” kaj aliajn sloganojn. La patriotaj ĉinoj ĉiam persistis en la batalo kaj restis en solidareco kaj unuanimo, kaj fine la perfortuloj devis deprimito disiri. Kelkajn tagojn antaŭ la devigita forlaso de sia loĝloko, multaj ĉinoj en Lhokseumawe, algluis al la pordo de sia domo la ruĝan standardon kun kvin steloj. La dekstraj perfortuloj uzis barbarajn rimedojn de minaco, kruela batado k. s. por deŝiri la flagon. En defendo de la digno de sia patrio, niaj patriotaj gefratoj tieaj faris vizaĝkontraŭvizaĝajn batalojn kontraŭ la dekstraj perfortuloj, kiuj troviĝis sub la ŝirmo de armitaj armeanoj kaj policistoj de Indonezio, kaj defendis sian nacian standardon.

La reakciularo de Indonezio uzis ĉiujn kruelajn rimedojn de bruligo, mortigo, batado, prirabo ktp. por persekuti freneze la elmigrintajn ĉinojn. Samtempe ili logtrompis, mensogis kaj faris aliajn malnoblaĵojn por detruigi la patriotan unuiĝon de la elmigrintaj ĉinoj, vane intencante devigi ilin rezigni sian civitanecon al Ĉinio, perfidi sian patrion aŭ partopreni la reakcian organizon de la bando de Ĉiang Kajŝek. Sed, la patriotaj elmigrintaj ĉinoj armitaj per la penso de Maŭ Zedong estas sagacaj kaj klarvidaj, ili foje kaj refoje fraka-

sis la intrigojn de la indonezia reakciularo. Iu ekonomia policisto de Indonezio, kiu estis “konsilisto” de reakcia organizo de la bando de Ĉiang Kajŝek en Kualasimpang, foje mensogis antaŭ la ĉinaj geedzoj Huang Guan hong, ke “en Ĉinio oni havas nenion por manĝi”, por devigi ilin ŝanĝi sian civitanecon aŭ partopreni la reakcian organizon de Ĉiang Kajŝek. La geedzoj tuj riproĉis lin: “Ni ĉinaj elmigrintoj neniam perfidos nian nacion, nek fariĝos perfiduloj de la patrio, kiuj fifamos je dekmilo da jaroj! La ĉina popolo estas sentima antaŭ perforto kaj morto!” La 14-jara ĉina knabino Hie Ĉungiaŭ en Takingeun, kondukita de perfortuloj sinsekve en kvar enketejojn, kie ŝi estis kontraŭleĝe enketata de pli ol dudek kanajloj, sed ŝi ĉiam timis nenion. Kiam ili provokis ŝin, postulante ke ŝi rezignu sian civitanecon al Ĉinio, ŝi severe riproĉis ilin, dirante: “Mi estas ĉino. Mi amas mian patrion! Estas absolute neeble, ke vi volas libere ofendi kaj persekuti nin, aŭ devigi nin rezigni nian civitanecon!” La perfortuloj povis diri nenion kontraŭ Hie Ĉungiaŭ.

La dekstraj reakciaj fortoj de Indonezio, unuflanke, ĉiumaniere malhelpis nian laboron por revenigo de la suferintaj ĉinoj, kaj aliflanke senhonte disemis klaĉojn: “La nova Ĉinio ne havas kapablon sendi ŝipon por revenigi siajn elmigrintojn.” “La ĉina ŝipo ne kuraĝas alveni.” Krome, ili ankaŭ timigis niajn elmigrintojn per ekstreme senhontaj klaĉoj, ekzemple: “Eble vi veturos per ŝipo de Usono aŭ de Tajvano.” Tiuj ĉi malnoblaj manovroj de la indonezia reakciularo neniom ŝancelis la firman volon de la suferintaj ĉinoj, kiuj memvolas reveni al sia patrolando. Iu




*Suferinta elmigrinto Caj Ven-hiu, kies edzo estis mortigita de perfortuloj de la indonezia dekstrularo, havas profundan dankemon al Prezidanto Maŭ.*

ĉina virino diris: “Nia patrolando prizorgas nin, la registaro certe sendos ŝipon por revenigi nin!” Kaj la suferintaj elmigrintaj ĉinoj en Takingeun sin kuraĝigis unu la aliajn: “Unueco estas forto, ni nepre ne suriros la ŝipon, kiun sendis ne nia patrio, kaj absolute ne estu trompitaĵ de la indonezia reakciularo!”

En Pulaubrajan, kiam la indonezia registaro fabrikis malfacilojn por malebligi la albordiĝon de nia ŝipo, la dekstra aŭtoritato trompis niajn suferintajn elmigrintojn, intencante irigi ilin al la kajo de la haveno Belawan, por provi perforte peli ilin laŭ la nomlisto de ĝi aranĝita, sed la suferintaj ĉinoj insistis atendi la alvenon de nia konsulo por aranĝi la revenon al la patrio, alie ili absolute ne forlasos Pulaubrajan. Fine, la indonezia dekstra aŭtoritato ne povis ne lasi nian ŝipon albordiĝi en la haveno.

En la meza kaj lasta tagdekoj de aŭgusto, la suferintaj ĉinoj en multaj lokoj de Atjeh estis sinsekve devigitaj forlasi la regionon. Ankaŭ 208 suferintaj ĉinoj en Takingeun devigite veturis al Medan, kie ili atentos ŝipon por reveni al la patrio. Survoje ili renkontis minacojn kaj ofendojn de la dekstraj perfortuloj, sed ili fine atingis la cello-




*Atinginte Jangĉun-forstejon, la unua grupo da elmigrintaj ĉinaj gejunuloj, kiuj revenis el Indonezio, partoprenas la socialisman konstruadon de sia patrio.*

kon post tutaj tri tagoj kaj tri noktoj, dum kiuj ili grimpis trans altajn kaj krutajn montojn, tranoktis sub la libera ĉielo, trinkis ŝliman akvon por kvietigi la soifon, kaj rompis multajn barojn. En iu loko la dekstraj perfortuloj, vidinte, ke la ĉinoj estas malcedemaj, diris kun deprimiteco: “Kial la ĉinoj estas tiel malmolaj? La ŝtono estas ja malmola, tamen oni povas ĝin frakasi, ili estas pli malmolaj ol la ŝtono, oni batas ilin sed ilin dispecigi ne povas!”

Post kiam la suferintaj ĉinoj kolektiĝis en Medan, por kaŝi siajn krimojn de la persekutado kontraŭ la ĉinaj elmigrintoj kaj por flati al la usona imperiismo, la indonezia registaro eĉ sendis armitajn armeanojn kaj policistojn por protekti usonajn raportistojn, kiuj iris al koncentrejo de suferintaj ĉinoj en Medan por fari kontraŭĉinajn fotojn por trompi la mondan publikon. Sed,

*“Rifuĝejo” por persekutitaj ĉinaj elmigrintoj en la Mezlernejo por Elmigrintaj Ĉinoj en Medan, Indonezio, estis freneze atakita de la dekstraj perfortuloj de Indonezio. La ĉinoj maltimaj antaŭ la perforto de malamikoj defendis la dignon de sia patrio.*



tiuj usonaj raportistoj renkontis fortan rebaton de la ĉinaj suferintoj. Meze de septembro, 1966, la usonaj raportistoj, en akompano de armitaj armeanoj kaj policistoj, en kvin fojoj venis en la rifuĝejon en Medan por foti ŝtele. Ekvidinte ilin, la tuta ĉina suferintaro ekpensis, ke la usona imperiismo estas la morta malamiko de la ĉina popolo, kaj rememoris la instruon de Prezidanto Maŭ, ke ĉiuj reakciuloj estas paperaj tigroj. Ĉe tio tuj ekflamis en ili la fajro de kolero kaj venis al ili granda kuraĝo. Ili laŭte kriis kun levitaj pugnoj: “Frakasu la usonan imperiismon!” “For Jankiojn!” Kaj ili ĵetis al la kapoj de la usonaj raportistoj ŝtonojn, botelojn, fruktokernojn kaj lignajn sandalojn, tiel ke la timigitaj raportistoj forkuris ŝirmante sian kapon. Kiam la indoneziaj dekstraj oficiroj ordonis minacon per sonigado de pafoj, la ĉinoj laŭte kantis la kantojn *Navigadon en Maro Oni Dankas al la Direkttilisto, Unueco*

*Estas Forto* kaj laŭte kriis: “Frakasu jankiojn!” “Vivu la patrio!” “Vivu Prezidanto Maŭ!”

En la koncentrejo de Pulaubrajan, kiam niaj gefratoj aŭdis, ke usonaj raportistoj venas por fotado en akompano de armitaj armeanoj kaj policistoj, ĉiuj elmigrintoj, viroj kaj virinoj, junuloj kaj maljunuloj, sturmis eksteren. Iu maljunulino, jam pli ol okdekjara, kun apogbastono enmane, ankaŭ eliris sekvante la amason, dirante: “Per tiu ĉi bastono mi donu batojn al jankioj!” La usonaj raportistoj estis tiel timigitaj, ke ili eĉ ne kuraĝis eliri el sia aŭto kaj forveturis rapide.

La sentima batalspirito de la elmigrintaj gefratoj ricevis simpatian kaj laŭdojn de la indonezia popolo. Ili diris: “Vere, la ĉina popolo havas la revolucionan volon!” “Brava estas la ĉina popolo!” Unu indoneziano, kiu vidis ĉeloke, kiel la suferintaj ĉinoj forpelis la usonajn raportistojn, diris al la suferintoj: “Vi venkis!”





# Nova Atingo de Ĉina Skulptarto


*Komunumanoj studas verkon de Prezidanto Maŭ dum paŭzo.*

**P**ERSISTE sekvante la literaturartan direkton de Prezidanto Maŭ, aro da skulptistoj en Siĉuan-provinco iris al Daŝu-komunumo de Han-juan-gubernio partopreni la produktan batalon kune kun la tieaj malriĉaj kamparanoj kaj malsuperaj mez-kamparanoj, kaj ree sukcese modlis revolucion argilan statuaron “Novaj Malsaĝaj Avoj en Daŝu”. Tio estas alia nova atingo en ilia servado al la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj kaj al socialismo per sia skulptarto.

En la statuaro “Novaj Malsaĝaj Avoj en Daŝu” estis modlitaj entute 33 figuroj esprimantaj laborantan popolon. Ĝi konsistas el tri cikloj, nome

“Montohakado por Digokonstruado”, “Fluobardado per Ŝtonoj” kaj “Kampopreparo kaj Agrigo”. Ĝi koncentre montris la revolucion spiriton de la Daŝu-anoj en ilia heroa kaj obstina batalo kontraŭ la ĉielo, tero kaj akvo kaj la revolucion temperamenton de la centmiliono kamparanaro armita per la penso de Maŭ Zedong, kaj prikantas la grandan batalon por transformo de la naturo fare de la centmiliono kamparanaro en konstruado de nova socialisma kamparo.

“Novaj Malsaĝaj Avoj en Daŝu” estas varmege laŭdata de la vastaj revolucionaj amasoj. La vicprezidanto de la Prepara Komitato de Asocio de



*Maldekstre:  
Komunumanoj streĉe  
laboras sur la monto  
kie ili hakas ŝtonojn  
kaj konstruas digojn.*

*Supre dekstre:  
Daŝu-aj virinoj la-  
boras.*

*Malsupre dekstre:  
Fluobarado per ŝto-  
noj.*

Malriĉaj Kamparanoj kaj Malsuperaj Mez-kamparanoj de Daŝu-komunumo, maljuna malriĉkamparano Giang Ŝeng-an kaj la maljuna komunumano Vang Jongking, kiu aĝas pli ol 80 jarojn, tre emociite diris: “La statuoj en la malnova socio estis tiuj de dioj kaj similaj, per kiuj la reacia regantaro propagandis feŭdisman superstiĉon, trompis kaj subpremis nin, vane provante sklavigi nin poreterne. Nun sub la gvidado de la Komunista Partio kaj Prezidanto Maŭ, la skulptistoj elmodlis figurojn de ni malriĉaj kamparanoj kaj malsuperaj mez-kamparanoj, tio ja estas granda revolucio mondrenversa.” Kiam la funkciuloj kaj membroj de Daŝu-komunumo, kiuj siatempe partoprenis en la montohakado kaj digokonstruado, vidis la scenon, montratan en la skulptaĵo, pri la fervora studado de verko de Prezidanto Maŭ fare de komunumanoj ĉe la konstruejo, ili aparte kortuŝiĝis kaj unuanime opiniis, ke tiu statuaro profunde spegulas la senliman amon kaj kredon al la penso de Maŭ Zedong de la multnombraj komunumanoj malriĉaj kamparanoj kaj malsuperaj mez-kamparanoj kaj ilian noblan idealon meti la patrolandon en la koron

kaj ĉirkaŭpreni la mondon en la vido. Liu Fujin, vicsekretario de la Partia Komitato de Daŝu-komunumo, kaj Liu Ĝengven, vicsekretario de la Partia Filio de Ĝongba-brigado kaj heroo en la lukto de fluobarado per ŝtonoj, diris: “La penso de Maŭ Zedong estas la vivradiko de ni Daŝuanoj kaj de niaj revoluciaj amasoj en la tuta lando. Nia Daŝu-komunumo leviĝis dank’ al la penso de Maŭ Zedong, oni povas vere speguli la novan spiritan fizionomion de niaj multnombraj komunumanoj nur per esprimo de ilia plena entuziasmo por kreiva lernado kaj kreiva aplikado de la verkoj de Prezidanto Maŭ.

Post rigardo de tiu grandtipa argila statuaro la multnombraj komunumanoj ricevis vivan edukon, kaj ili lernas de la penso, iras la vojon kaj faras meritplenajn agojn de la herooj. Ili diris: En la malnova socio, per modligo de dioj la bienula klaso celis trompi la malriĉulojn, sed hodiaŭ ni modlas figurojn de herooj por ke ni lernu de ili kaj unuanime konstruu nian grandan socialisman patrolandon.

*Grandtipa argila statuaro “Novaj Malsaĝaj Avoj en Daŝu”*



**Kultura Vivo**

**JAPANAJ GEJUNULOJ  
SURSCENIGIS**

*KANTO PRI OŬJANG HAJ*

En nov., 1966, la dualernojraj studentoj de la ĉinlingva fakultato de la Tokia Instituto de Aziaj kaj Afrikaj Lingvoj en Japanio scenarigis la “Reveno al Hejmloko”, la sepan ĉapitron de *Kanto pri Oŭjang Haj*, kiu estas fame konata romano de Ĉinio, priskribanta la bonan batalanton de Prezidanto Maŭ — Oŭjang Haj. La studentoj mem prezentis la dramon en la ĉina kaj gajnis entuziasman laŭdon de la japanaj spektatoroj.

La studentoj, kiuj gvidis la scenarigon kaj prezentadon de la teatraĵo, diris: Ni prezentas la dramon *Kanto pri Oŭjang Haj* por plibone komprenigi la signifon de la granda proleta kultura revolucio de Ĉinio kaj samtempe ankaŭ por plifortigi la amikecon inter la ĉina kaj japana popoloj.

La pliparto de la amatoraj aktoroj estis duon-laboraj kaj duon-lernaj studentoj. La amara travivaĵo de la familio de Oŭjang Haj en la malnova ĉina socio kaj lia kreskado sub la nutrado de la penso de Maŭ Zedong profunde emociigis la aktorojn kiuj partoprenis la prezentadon.

**LA 3-A ĴURNALISMA KURSO  
POR AZIAJ KAJ AFRIKAJ  
ĴURNALISTOJ MALFERMIĜIS**

La 3-a ĵurnalisma kurso por aziaj kaj afrikaj ĵurnalistoj, aranĝata de la Azia kaj Afrika Ĵurnalista Asocio, malfermiĝis en Pekino je la 5-a de nov., 1966. Ĝin partoprenas ĵurnalistoj senditaj de Azanio (Sudafriko), Sudokcidenta Afriko, Mozambiko, Basutolando, Zimbabve, Cejlono kaj aliaj landoj.

Djawoto, la ĝenerala sekretario de la Azia kaj Afrika Ĵurnalista Asocio, kaj aliaj ĉestis la inaŭguran ceremonion. La Tut-Ĉinia Ĵurnalista Asocio donacis al la kursanoj ekzemplerojn de *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong* en la angla traduko.



# Kanto pri Oŭjang Haj

Kanto pri Oŭjang Haj estas bona kaj tre alloga romano kaj estas elstara verko de la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko, kiu priskribas novajn homojn de la granda socialisma epoko. Ĝi sukcese modlas noblan figuron de granda komunisma batalanto, kiu rapide kreskis sub nutrado de la penso de Maŭ Zedong. Komence de tiu ĉi numero ni daŭrige publikigos la 9-an ĉapitron de la dirita romano.

— La Redakcio

## 9-a Ĉapitro: Sturmo kontraŭ Flamanta Fajrego

### “BATALAMIKO DE LEJ FENG”

LA aero estis eksterordinare freŝa je la tagiĝo. En la matena vento alportiĝis la klara kaj agrabla anoncsignalo de la Centra Popola Brodkasta Stacio, kaj en akompano de la eleganta melodio de *Ruĝas la Oriento* ĉio denove sin kovris per brilo de aŭroro. Nia vivplene prosperanta patrolando estis marŝanta antaŭen per grandaj paŝoj.

Oŭjang Haj venis al la ekzercejo frue en la mateno. Tenante en sia mano la libron *Pri Kontraŭdiro*, li legis ĝin kaj samtempe pripensis. Kiam li atingis la liniojn: “En studo de problemo, oni devas eviti subjektivismon, unuflankecon kaj supraĵecon. Subjektivismo signifas ne scii rigardi problemon objektive, t. e., ne scii rigardi problemon el la materiisma vidpunkto”, li sentis, ke kvankam la hieraŭa disputo ankoraŭ ne finiĝis, tamen li devas detale konsideri la opinion de la anstataŭanta politika vic-direktanto kaj postuli de si rigore kaj malindulge kaj tiel kontroli sian laboron kaj tiun de la subploto.

Profitante la mallongan tempon antaŭ la manĝo, la 7-a subploto ree okazigis subplotonan kunvenon, kies ĉefa enhavo estis lerni la instruon: “humileco estigas progreson” kaj pridiskuti, kiel korekte trakti la atingojn de la subploto. Samtempe, oni ankaŭ dufoje laŭtleĝis la “8 postulojn al la batalantoj pri respekto al la kadroj”. La kamaradoj ekzamenis siajn proprajn pensojn precipe en ligo kun la 2-a postulo: “respekti la kadrojn, obei direktadon, observi disciplinon kaj kontraŭi ekscesan demokration.” Ankaŭ Liu Janŝeng refoje parolis pri sia eraro de senorganiziteco kaj sendisciplineco. Ĝuste kiam li volis menci la disputon kiun li havis kun la anstataŭanta politika vic-direktanto, Oŭjang Haj rapide haltigis lin per tusado. Pli frue Oŭjang Haj jam admonis lin, ke

li ne parolu pri tiu afero en la kunveno, kaj ke estiĝos malbona influo, se la kamaradoj estos informitaj pri la afero — tio ne estas fleksiĝo al iu sed estas en la intereso de la revolucio. Juna Liu palpebrumis kaj reenglutis siajn vortojn. Ĉe la fino Oŭjang Haj resumis la opiniojn de la subplotonanoj en la jenaj punktoj: Estu humilaj kaj singardemaj, kaj evitu fierecon; akriĝu la koncepton pri organiziteco kaj disciplineco kaj observu la disciplinojn; kontraŭu liberalismon kaj modele praktiku ĉiujn regulojn kaj principojn.

Kunportante la protokolon de la kunveno kaj la garantiskribon komune faritan de ĉiuj subplotonanoj, Oŭjang Haj iris al Hĵue Hinven por fari raporton. Hĵue Hinven instrukiis, ke estas tre bone, ke ili rekonis tiamaniere la demandon, sed ili devas fari plian paŝon elfosi la radikon de iliaj pensoj, precipe Oŭjang Haj mem devas aparte ekzameni sian fierecon kaj memkontenton, kaj nur tiel la nunaj atingoj povas esti firmigitaj kaj progresado povas esti daŭrigata.

Kiam Oŭjang Haj revenis al la subploto, en la ĉambro estis multaj homoj vikle parolantaj. Estis dimanĉo. Liu Janŝeng estis irona al la urbo por esti fotografata, kaj kamaradoj de la subploto kaj ploto petis lin plenumi por ili komisionojn. Unu el ili deziris, ke li portu lian fontoplumon al la riparejo, alia volis, ke li sendu por li monon per la poŝto, la tria petis, ke li prenu por li el la poŝtejo pakajon, la kvara postulis ke li aĉetu por li leterpaperojn kaj kovertojn, ankoraŭ aliaj intencis havigi al si la libron *Rakonto pri Lej Feng*, kudrilojn kaj fadenojn, ktp. Unuj petis kaj aliaj vokis, kaj juna Liu estis tute konfuzita. “Ĉiu laŭ sia vico, kamaradoj,” li laŭte diris, nur tiam ĉesis konfuza bruado. La kalkulo montris, ke kvin el la komisionoj estas por aĉeti librojn, kvin aliaj deziras

sendi monon, kaj la ceteraj komisionoj konsistas el fliko de vestoj, riparo de fontoplumoj, ktp. Li devis fari sume dudek tri aferojn, pli aŭ malpli gravajn, inkluzive de fotografado por si mem.

“Ho, mia ĉielo! Sufiĉe giganta estos mia tasko!” juna Liu eligis sian langon.

“Eble vi sola ne povos plenumi ĉion,” diris Oŭjang Haj kunsente.

“Estas nenio. Mi devas lerni de Lej Feng,” ridis Liu Janŝeng. Reordiginte kion li devis kunporti, li demandis Oŭjang Haj:

“Subploton-estro, ĉu vi ne volas ion por vi?”

Oŭjang Haj agrafis por li la kolumon laŭ la postulo de disciplino kaj diris: “Rapidu for! Pozu bone dum fotografado. Krome, nepre revenu antaŭ vespermanĝo. Kion mi volas, tio estas ‘disciplino observita kaj reveno laŭtempa’.”

“Jes!” Liu Janŝeng ŝovis al sia zono porekzercan grenadon, intencante fari kelkajn bonajn ĵetojn preterpasante la grandan ekzercejon de la stabejo de la regimento. Li pensis, ke la estroj de la roto kaj subplotono jam publike laŭdis lin, tial li devas fari pluan penadon por plialtigi sian atingon en grenad-ĵetado.

“Gardu sekurecon kaj ne vundu aliajn,” Oŭjang Haj atentigis lin.

“Estu trankvila. Ĉio bone iros!” Liu Janŝeng kuris kantante al la deĵoranta plotonestro por peti forpermeson.

Post la matenmanĝo, Oŭjang Haj gvidis la kamaradojn de la 7-a subplotono purigi la manĝejon, kaj tuj poste li ekpensis, ke la ŝirmilo de la mur-gazeta tabulo antaŭ la pordo de la klubo ankoraŭ ne estis alfiksitaj. Li memoris, ke troviĝas kelkaj senutilaj pecoj da cedroŝelo malantaŭ la kuirejo kie oni kutime metas brullignojn. “Bone. La cedroŝelo ja tute taŭgas por fari ŝirmilon. Ni ja havos bonan ŝirmilon el cedroŝelo.” Tiel pensante li kuris al la brullignejo.

Ĝuste preterpasinte la pordon de la kuirejo, li vidis de malproksime iun kamaradon en veŝto tie laborantan. Alproksimiĝinte li konstatis, ke la anstataŭanta politika vicdirektanto okupas sin pri senŝeligo de arbotrunko per ŝpateto. Lia korpo estis plene kovrita de ŝvito, kaj lia veŝto tute malsekiĝis. Kompreneble li jam laboris dum longa tempo.

“La politika vicdirektanto pensis pri tio ja pli frue ol mi,” Oŭjang Haj diris al si mem. “Mi devas bone lerni de li ĉi-rilate. Pri fizika laboro li ĉiam okupas sin, tuj kiam li trovas okazojn, kaj lia agado rapide sekvas vortojn senprokraste.

Eĉ en dimanĉo oni tre malofte trovas lin ripozanta.” Li ankoraŭ memoris la scenon, kiam li unuafoje intervidiĝis kun Hjue Hinven, kaj murmure ripetis liajn vortojn:

“Se oni restas ĉiam senokupa kun falditaj brakoj de la mateno ĝis la vespero, ĉu tio ne sufokos lin ĝis malsano?”

Ĝuste kiam Oŭjang Haj alpaŝis por doni helpon, Hjue Hinven diris:

“Oŭjang Haj, kial vi venis ĉi tien? Tuj reiru ripozi!”

“Kial do vi...vi...?” Oŭjang Haj ne volis cedi.

“Kial vi komparas vin kun mi?” diris Hjue Hinven. “Mi restis ĉi tie kvankam nur mallonge, tamen mi estis profunde konvinkita, ke kiuj okupiĝas pri plej penigaj laboroj en la roto, estas vi subplotonestroj. Ĉu en la tago, ĉu en la nokto, vi gvidas dekelkajn kamaradojn en plej diversaj korplaboroj kaj batal-ekzercoj, kaj en ĉiuj aferoj vi devas doni ekzemplon kaj esti la unuaj kiel modelo. Hodiaŭ estas ja dimanĉo, do iom refreŝigu vin. Reiru kaj kuŝu sur la lito, eĉ se vi ne povas endormiĝi!”

Konstatinte, ke li preskaŭ finis sian laboron, Oŭjang Haj povis nur returni sin kaj veni al la kuirejo.

“Iru for! Kial vi venas denove ĉi tien?” ankaŭ la provizisto Li Hiang irigis lin eksteren. “Ne estas laboro por vi hodiaŭ. Oni jam pretigis la vermicelon por la posttagmezo. Kaj ĝaĝiangon (fritita spicaĵo por manĝi kun vermicelo) vi Hunan-ano ja ne scias fari, prefere reiru ripozi.”

Oŭjang Haj pensis, kiel ni junuloj povus resti senfaraj, kiam eĉ la kadroj ne ripozas dum la dimanĉo! Li enpuŝis sin tra la pordo por trovi iajn bagatelajn laborojn. Sed la kuirejo estis efektive en bona ordo kaj ĉio estis pretigita. Li montris al la vaporumiloj kaj demandis:

“Kamarado provizisto, kial ni ne manĝis mantoon (ĉina pano, vaporumita sed ne bakita) jam tiel longe? Ĉu eble ne sufiĉas laborantoj je via dispono?”

“Ni havas sufiĉe da laborantoj, sed la vaporumiloj difektiĝis. La kamaradoj de la riparista grupo estas treege okupitaj kaj ankoraŭ ne trovis tempon por ĝi.”

Oŭjang Haj ekzamenis la vaporumilojn. Laŭ lia tekniko pri la riparo de bambukorboj, li mem povis ripari ĝin se li nur sukcesis havigi al si bambuon. Li ĝojis en si, ke li finfine trovis ian laboron, alie li ne sciis, kiel pasigi la dimanĉon. Farinte decidon en si mem, li diris:

“Nu, mi venas tro malfrue kaj ne povas doni ian helpon. Nun mi simple iros ludi pilkon.”

“Vi estas prava! Sciu sin refreŝigi post laboro. Ĵus Egkreskulo Liu iris ĉien por serĉi vin. Li diris, ke okazos maĉo kun la 1-a roto.”

Oŭjang Haj ne havis la intencon ludi pilkon. Li petis de la deĵoranta plotonestro forpermeson, ĉar li decidis iri al la Nankoŭ-komunumo. Kvan-kam estis necese piediri pli ol 40 liojn ir-reire, tamen la bambuoj produktataj tie estis bone konataj en periferio de kelk-cent lioj, kaj ankaŭ la prezo estis malalta, do estis peninde. Krome, antaŭ kelkaj tagoj la rotestro diris, ke la vektoj por la produktaj laboroj ne sufiĉas. En tiu ĉi monato Oŭjang Haj ŝparis kelkajn juanojn, tial li pensis, ke li simple aĉetu pli da bambuoj, kaj per tio la demandoj de la vaporumiloj kaj vektoj povos esti samtempe solvitaj. Li kalkulis kaj trovis, ke li havas sufiĉe da tempo por sia entrepreno, kaj li ekiris kunportante la romanon *Ruĝa Roko*, kiun Ĝoŭ Huŝan donacis al li. Li pensis, ke li povos relegi la paragrafojn pri fratino Giang kaj Hju Junfeng dum sia ripozo survoje.

Oŭjang Haj alvenis al la Nankoŭ-komunumo ĉe tagmezo. Li klarigis sian intencon, kaj la komunumo tuj konsentis helpi lin. Iu maljunulo estis sendita akompani lin por haki bambuojn. Unue li hakis du dikajn kaj longajn bambuojn. Kiam li intencis haki la trian, la maljunulo haltigis lin.

“Juna kamarado, kiom da homoj vi venis ĉi tien?” demandis li.

“Nur mi sola.”

“Ĉu vi povas porti ilin sur via ŝultro?” diris la maljunulo observante lin de la kapo ĝis la piedoj. “Provu unue mezuri ilian pezon.”

Oŭjang Haj sukcesis porti la bambuojn sur sia ŝultro kun granda peno, tiel ke lia vizaĝo tute ruĝiĝis. Laŭ takso ili eble pezis ĉirkaŭ 180 ĝinojn. Li diris iom honteme:

“Ja tre pezaj estas ĉitieaj bambuoj.”

“Tiuj ne estas la plej grandaj, juna kamarado, estas ankoraŭ bambuo, kiu pezas pli ol cent ĝinojn. La bambuoj el niaj montoj estas tre famaj. Se vi uzos ilin kiel kolonojn aŭ trabojn, ili ne putriĝos aŭ difektiĝos dum dekoj kaj eĉ cento da jaroj. Ili eltenos la uzadon pli longe ol la ligno!” La maljunulo diris kun fiero sento. Li suprenfaldis siajn manikojn kaj daŭrigis: “Juna kamarado, vi ne povas ŝultroporti ilin sola, do mi helpos vin.”

“Ho ne! Mi ne povas ĝeni vin. Vi jam estas tiel grandaĝa....”

“Grandaĝa? Laŭ la nova maniero de kalkulo mi estas ĝuste sepdekjara. Mi naskiĝis en la jaro 1893. Oni diris, ke mi.... mi....” la maljunulo skuadis sian kapon pro ekscitiĝo, “ke mi estas samaĝa kiel Prezidanto Maŭ.”

“Ha!” nur nun Oŭjang Haj eksciis, ke Prezidanto Maŭ jam havas sepdek jarojn. Li pensis: Prezidanto Maŭ havas tiel grandan aĝon kaj ankoraŭ laboras por la tutlanda popolo tage kaj nokte, nu kion ni junuloj povas diri! Li rapide pagis la prezon kaj, plena de energio, surŝultrigis la bambuojn kaj komencis reveni al sia restadejo.

Per grandaj paŝoj Oŭjang Haj iris returne. Pensante pri Prezidanto Maŭ, li sentis, kvazaŭ iu subtenus per mano lian korpon kaj la bambuojn sur lia ŝultro. Ŝajnis, ke la bambuoj, kiuj pezis proksimume 200 ĝinojn, ne plu ekzistas. Ĉiam pli rapide li marŝis je unu spiro pli ol dek liojn. Transvadinte malgrandan riveron, li atingis duonon de la tuta vojo, kaj nur tiam li ekhaltis por refreŝigi sin. Li sidis sur la bordo, trempis siajn piedojn en la malvarman akvon kaj komencis legi la romanon *Ruĝo Roko*.

Ĉiufoje, kiam li legis la vortojn diritajn de fratino Giang antaŭ sia martiriĝo, Oŭjang Haj ekscitiĝis dum longa tempo. Li povis parkere reciti tiujn sentencojn, kiaj: “Se estas necese oferi nian vivon por la idealo de komunismo, ĉiu el ni devas kaj povas tion fari sen kolorŝanĝo de la vizaĝo kaj batego de la koro;” kaj “spite de la tempesto kaj pluvego kaj spite de timigaj ondegaj... ni devas nepre direkti nian batalstandardon al komunismo.” Li pensis ke, se komunisto sentas neniun timon antaŭ morto, tion decidus la granda afero, al kiu li sin dediĉas. Fratino Giang kaj ŝiaj kamaradoj oferis sian vivon, sed la afero de komunismo puŝiĝis unu paŝon antaŭen. Kiom da personoj daŭre batalas por la liberiga afero de la proletaro, heredante la postlasitan volon de la martiroj! Eĉ mi, kiu iam estis almozuleto kaj preskaŭ mortis sub neĝamaso en Korvonesto, staras nun ankaŭ en la batalvicoj. Ĉiu homo mortos; sed nia revolucia afero neniam finiĝos kaj estos heredata de miloj kaj miloj da generacioj. Kio estas timinda por tiu, kiu tutkore dediĉas sin al la revolucia afero? Li jam lasis flanken sian personan sekurecon. Oŭjang Haj diris al si mem:

“Al tiu, kiu vidas en sia koro la finfinan triumfon de la revolucia afero, ne estas morto en liaj okuloj.”

Kiam Oŭjang Haj pensis pri tio, tiuj noblaj nomoj kiel Dong Cunĵuj, Huang Giguang, Ĝang Side, Norman Bethune kaj aliaj aperis en lia cerbo.

Kvankam li neniam vidis ilin, tamen iliaj figuroj restis tre konkrete en lia kapo. Kiam li nur fermis siajn okulojn, li povis vidi klare tiujn martirojn: Dong Cunĵuj tenas pakon da eksplodaĵo, fiksante sian rigardon al la fumanta meĉo; Huang Giguang ĵetas sin sur la fajro-punkton de maŝin-pafilo kun ruĝa standardo de sturmo post si; Ĝang Side en griza armeana uniformo venas kun rideto de la monto de Ansaj vektportante ligno-karbojn ĵus faritajn; Norman Bethune kun okul-vitroj operacias tutanime vunditan soldaton; fratino Giang, surmetinte sian ruĝan trikitan jakon, firme iras el la malliberejo de Gele-monto al la ekzekutejo, kaj la sunlumo verŝas sin sur ŝian vizaĝon kaj ŝian tutan korpon . . . Li vidis tiujn grandajn batalantojn, aŭdis iliajn voĉojn kaj ankaŭ komprenis, ke la kaŭzo, pro kio iuj tiel diligente laboris por la popolo ĝis sia lasta spiro kaj aliaj montris sin tiel senĝenaj kaj trankvilaj antaŭ la morto, estas tio ke ili estis plenaj de dev-konscio al la proleta liberiga afero kaj de fido pri ĝia triumfo. Nun al Oŭjang Haj kvazaŭ sonis en liaj oreloj la vortoj, per kiuj la herooj esprimis al li sian esperon: “. . . Ĉu vi vivos, batalos kaj oferos vian tutan senpantan vivon por defendi la ruĝan flagon?” Li karesis la libron *Ruĝa Roko*, kiun li tenis en sia mano, kaj murmuris al si mem:

“Kiom multaj laboroj estas en la batalo por komunismo, kiujn mi devas plenumi, kaj kiom malmulte mi faris!”

La suno kliniĝis okcidenten, kaj sur la akvo falis la longa ombro de Oŭjang Haj. Li rapide surŝultrigis la bambuojn kaj iris en la direkto al la roto. Tuj kiam li surgrimpis deklivon, li aŭdis kriojn malantaŭ si. Returniĝinte li trovis, ke nuboj da flava fumo ruliĝante leviĝis el iu domo trans la rivero.

“Fajrego!” li kriis surprizite kaj, forĵetinte siajn bambuojn, li fluge kuris al la direkto de la fumanta domo.

La domo estis ĉirkaŭvolvita de densa fumo. Kelkaj virinoj kaj infanoj staris apude kaj laŭte kriadis. 6-7-jara infano ploregis plenvoĉe kontraŭ la pajlotegmentita domo:

“Avinjo! Avinjo . . .”

Tion aŭdinte, Oŭjang Haj tuj komprenis, ke en la domo restas ankoraŭ homo. Kvazaŭ fluganta sago li saltis tra la pordo.

Pro la densa fumo en la domo li povis vidi nenion. Kun maltrankvilo li serĉis ĉie, laŭte kriante:

“Ĉu estas homo tie? Eliru rapide! . . . Avinjo! . . .”

Neniu respondo.

Oŭjang Haj palpis ĉirkaŭe, sed li ne trovis la avinon. Kunprenante du vatitajn litkovrilojn li kuris eksteren.

La infano ankoraŭ ploradis kaj vokadis sian avinon. Oŭjang Haj kuris al li:

“Frateto, ne ploru. Kie estas via avinjo?”

La infano ne povis paroli pro konsterniĝo, sed nur montris la domon per sia fingro. Oŭjang Haj denove sturmis al la pordo. Ĝuste kiam li atingis la pordon, hon! la densa fumo turniĝis en helan fajregon kaj ekestis brulego. Du virinoj rapidis antaŭen kaj kaptis Oŭjang Haj per sia tuta forto, kriante:

“Vi ne povas eniri, k-do armeano . . .”

Ĝuste la voko “k-do armeano” donis al Oŭjang Haj grandegan kuraĝon. Fulmis en lia kapo la frazo: “Oni devas sturmi kontraŭ flammanta fajrego!” Li liberigis sin svingante la brakon kaj ree saltis en la fajregon.

“Avinjo, venu eksteren! . . .”

Sed li povis vidi kaj aŭdi nenion, kaj apenaŭ povis spiri pro sufokiĝo. Subite falis sako de sur la planko de la brulanta subtegmentejo: Jen tie estas la homo!

La subtegmentejo konsistis nur el tabuloj fiksitaj meze de la termuro, kaj ĝi estis iom pli alta ol staturo. Ne havante tempon por trovi la ŝtuparon, Oŭjang Haj saltis de sur la tero, kaptis la plankon per ambaŭ manoj, kaj svingis sin supren. Li vidis neklare homon kuŝantan, kiu ŝajne svenis sufokite de la densa fumo. Li haste demetis sian militan jakon, kovris per ĝi la hararon de la maljunulino, portis ŝin sur la dorso kaj saltis malsupren. Kun neatenditaj fortoj kaj kuraĝo Oŭjang Haj sukcesis desalti de la subtegmentejo alta je 6-7 futoj, kun la maljunulino sur la dorso. Kiam li elkuris la domon, la junuloj kiuj laboris sur la kamparo jam alkuris kun hasto.

Unuj verŝis akvon, aliaj savis objektojn el la fajro. Oŭjang Haj levis sitelon da akvo, malsekigis sian tutan korpon kaj denove grimpis sur la subtegmentejon. Li malmuntis la bruligatajn tabulojn kaj ĵetis ilin eksteren unu post la alia. Tiel estis malhelpita la disvastiĝo de la fajrego, kaj post pli ol dek minutoj ĝi tute estingiĝis.

Duono de la ĉarpentaĵo estis forbruligita kaj la tuta tegmento estis for. Feliĉe preskaŭ ĉiuj

objektoj en la domo estis savitaj. La maljunulino sidis sur la tero rigardante la bruligitan domon kaj ĉagrene larmis. Montrante la sakon, la estro de la produkta brigado diris al ĉiuj:

“Samvilaĝanoj! Avino Huang kuris en la fajregon kaj riskis sian vivon por tiu ĉi sako da bonspeciaj tritik-semoj. Nun la domo estis bruligita. Diru, kion ni faru?”

“Konstruu novan domon por la avino!”

“Prave! Ni tuj agu laŭ niaj vortoj! Brigadestro, mi havas en mia domo kelkajn lignopecojn, kaj mi disponigos ilin al avino Huang. Nun mi iros alporti ilin.”

“Mi havas nenion alian, sed restas ĉe mi iom da brikoj. Atendu, avino Huang, mi tuj vektoportos ilin al vi,” diris alia komunumano.



*Oujang Haj riskante sian vivon eniras la incendion por savi maljunulinon.*

“Bone. Konstrui la domon kaj kompletigi la materialon — tiun taskon nia grupo de la Asocio de Malriĉaj Kamparanoj kaj Malsuperaj Mez-kamparanoj prirespondecos.”

Avino Huang ekstaris: “Vi ne devas tion fari! La brigado fidis al mi kaj deponis la semojn en mia domo, sed mi preskaŭ perdis ilin. Tio estas vere bedaŭrinda por mi. Kiel mi povus ĝeni vin per konstruado de nova domo. Neeble!”

Aŭdinte ĉion ĉi Oujang Haj tre kortuŝiĝis. Li diris al si: “La maljunulino pli ol 60-jara, kies domo estis bruligata, anstataŭ savi siajn proprajn vestkestojn kaj litkovrilojn, zorgis unue pri la semoj de la kolektivo. Kaj ankaŭ la komunumanoj rigardas la malfacilojn de avino Huang kiel la siajn kaj memvole oferas sian materialon por konstrui novan domon por aliulo. Kiaj noblaj kvalitoj!” Kun profunda emocio li rigardis avinon Huang kaj la komunumanojn ĉirkaŭe. “Jen estas niaj komunumanoj! Ili firme ligas sin, siajn familion kaj vivon kun la interesoj de la komunumo, kaj la laborado en kolektivo faris ilin parencoj unu al alia.”

Meze de vokoj kaj krioj la komunumanoj komencis rekonstrui la domon por avino Huang, kaj en okupiteco kaj konfuziĝo ili forgesis tiun armeanon, kiu helpis estingi la fajregon. Kun emocio Oujang Haj silente transvadis la rivereton, denove surŝultrigis siajn bambuojn kaj iris returne. Li palpis sian poŝon kaj trovis, ke la libro *Ruĝa Roko* malaperis. Kredeble ĝi elfalis, dum li estingis la fajregon. Li intencis iri por trovi ĝin, sed li timis, ke oni pridemandos lian nomon kaj esprimos al li dankon. Por Oujang Haj tio estos plej granda embaraso. Sed, aliflanke, li ankaŭ ne volis perdi ĝin, kiu estis tiel bona libro kaj kiun ĉiuj



volegis legi. Cetere, ĝi estis donacita de sekretario Ĝou Hušan! Li returnis sian kapon kaj vidis, ke la komunumanoj kuris tien kaj reen ege okupitaj kaj iuj el ili jam surgrimpis la muron. Li diris al si:

“Oni ne devas rigardi nian popolan komunumon sole el la vidpunkto de disvolvo de produktado. Kiel grandan ŝanĝon ĝi alportis al la penso de homoj. Nun ankaŭ maljunulino eliris el la malgranda rondo de sia familio kaj en ĉiu okazo scias konsideri la kolektivon, la komunumon. Tiu ĉi ŝanĝiĝo en la penso estas pli valora ol riĉa rikolto en produkto!”

Irinte malmultajn paŝojn, li sentis, ke li jam perdis ĉiun sian forton kaj liaj manoj brule doloras. Kelkaj vezikoj aperis sur liaj manplatoj pro brulvundo, kaj la haŭto ŝiriĝis kelkloke. Li ekmemoris, ke iujare en lia juneco dense falis neĝo, kaj li sentis sin tiel malvarmega, ke li havis nenian rimedon krom kuntiriĝinte dormi apud la fajro-kavo. Meznokte li vekigis dolorigite kaj trovis, ke en la dormo li senatente etendis sian dekstran piedon en la fajron kaj ĝi grave vundiĝis. “Kia tempo en tiuj jaroj!” Li denove pensis pri Korvonesto kaj pri la kaduka kabano nepovanta bari venton kaj neĝon, en kiu lia familio loĝis antaŭ la Liberiĝo. Li palpis la bambuojn sur sia ŝultro kaj diris al si mem: “La maljunulo diris, ke la bambuoj povas esti uzataj kiel materialo por konstrui domon. Kial mi ne donacu tiujn ĉi du bambuojn al la avino por helpi ŝin en rekonstruo de la domo? Krome, ankaŭ mi estas filo de malriĉa kamparano de la Feniksa Vilaĝo kaj devas esprimi estimon al tiu avino, kiu plenkore zorgas pri la kolektivo.” Li do tuj kuris al ŝia domo kun la bambuoj.

Kiam vesperiĝis, la domo estis komplete riparita. Oŭjang Haj helpis avinon Huang reporti ĉiun objekton en la domon kaj denove metis la sakon da bonspaciaj semoj sur la plankon de la subtegmentejo. Kiam ĉio estis ree en ordo, li adiaŭis ŝin.

“Ne foriru!” la brigadestro haltigis lin. “Vi laboris dum longa tempo. Diru almenaŭ vian nomon antaŭ foriro.”

“Mi ja nenion faris. La domo estas rekonstruita per la materialo kiun provizis la komunumanoj mem, kaj la fajrego estis estingita kune de vi ĉiuj. Mi preterpasanto donis nur iom da helpo. Tio ja estas nenio!” Tion dirinte, Oŭjang Haj volis foriri, sed la brigadestro retenis lin per mano.

“Ĉu tio estas nenio? Se vi ne estus veninta rapide, sendube okazus malfeliĉa akcidento! Ĉar

avino Huang estas maljuna kaj ne povas movi sin rapide, kaj, krome, ŝi turnis sian tutan atenton al tiu sako da bonspaciaj semoj...” diris serioze la brigadestro. “Sciigu al ni vian nomon! Avino Huang savis la semojn por la komunumo, kaj vi viavice savis avinon Huang. Unu el vi oferis sin pro la kolektivo kaj la alia kuraĝe intervenis helpoprete ĉe bezono. Ambaŭ indas esti diskonigataj, por ke la komunumanoj povu imiti vin.”

“Bone, mi sciigos al vi!” Oŭjang Haj klopodis elpensi rimedon por sin liberigi. “Lasu min, kaj mi diros.”

“Bone,” la brigadestro retiris sian manon.

“La numero de nia trupo estas sekreto,” Oŭjang Haj ŝajnigis, ke li pretas diri ion.

“Tion mi komprenas. Diru nur vian nomon.”

“Mi,” laŭte diris Oŭjang Haj, “mi estas nomata Batalamiko de Lej Feng.” Tion dirinte, li turnis sin kaj forkuris.

La brigadestro laŭte kriis post li: “Kamarado! Batalamiko de Lej Feng! Revenu ... Batalamiko de Lej Feng! ...”

“Brigadestro, ne provu trovi min. Mi estas preterpasanto, kaj vi neniam povos trovi min!” Oŭjang Haj jam transvadis la rivereton kaj returne kriis al la alia bordo: “Mi dankas vin ĉiujn. Mi certe diskonigos inter miaj kamaradoj la rakonton pri avino Huang, kiu amas la komunumon kiel sian hejmon. Ĝis revido! ...”

La lundisko leviĝis je ĉirkaŭ dek futojn super la montoj en la oriento. Ĝi verŝis sian arĝentan lumon sur la teron. Liaj vestoj iom post iom sekiĝis. La vespera vento alportis al li malvarmon. Oŭjang Haj demandis sin: “Ĉu oni sentas varmon aŭ malvarmon en la lunlumo?” Li skuis sian kapon kaj ne povis respondi sian propran demandon. Li pensis, ke Gaŭ Jiĝong certe scios respondi, se li prezentos al li la demandon.

Post mallonga distanco, ekmurmuris lia stomako. Nun li konsciis, ke li ne manĝis jam dum longa tempo, tial ne estas mirinde, ke li perdis sian forton. Subite li kriis: “Kiel mi povas forgesi la promeson reveni al la roto antaŭ vespermanĝo!” Pensante pri tio, li sentis ke li regajnis sian energion kaj liaj kruroj fariĝis pli fortaj. Li tuj kuris antaŭen kaj bedaŭris nur, ke li ne havas flugilojn, kiuj portus lin rapide al la roto.


Komprenoble estis jam tro malfrue, eĉ se li havus flugilojn....

(Daŭrigota)



# Liu Jingjun, Bona Batalanto de Prezidanto Maŭ

Liu Jingjun, batalanto de iu artileria roto de la Ĉina Popola Liberiga Armeo, naskiĝis en la familio de malriĉ-kamparano en Ĉangĉun, Gilin-provinco. Por savi ses infanojn el morta danĝero, li oferis sian vivon la 15-an de marto, 1966. Li estis alia granda komunisma batalanto armita per la penso de Maŭ Zedong.



1. Printempe de 1964, la grupo de Liu Jingjun sentis malfacilon en la transformado de kaduka domaĉo en loĝejon. Laŭ lia iniciato, la tuta subplotono kune studis la verkon de Prezidanto Maŭ "Montotranslokigo Fare de Malsaĝa Avo" kaj plenumis la malfacilan taskon.




2. Iun tagon, Liu Jingjun trovis ke bovcaro de maljuna vilaĝano falis en riveron. Li tuj vadis en la akvo kaj helpis la vilaĝanon elirigi la ĉaron.




3. En sia roto Liu Jingjun estis "ĉiamokupito". Li faris multajn bonajn aferojn kiaj riparo de tabloj kaj seĝoj, faro de leterkesto, reordigo de laboriloj, kaj tiel plu.




4. Kiam la usona imperiismo plivastigis la agresan militon kontraŭ Vjetnamio, li tuj petskribis por sin registri kiel volontulon por helpi Vjetnamion kontraŭ la usona imperiismo.




5. Liu Jingjun estis brava en defendo de la penso de Maŭ Zedong. Li aktive partoprenis la grandan proletan kulturajn revolucion, batalante buŝe kaj plume.




6. Kun granda fervoro Liu Jingjun propagandis la penson de Maŭ Zedong. Li ofte skribis leterojn al siaj malnovaj samlernantoj por kuraĝigi ilin por sin hardi en kamparo laŭ la instruoj de Prezidanto Maŭ.




7. Foje, sur la multtrafika ŝoseo, Liu Jingjun kondukis ĉaron. Subite la ĉevalo estis timigita de bruanta aŭtobuso kaj nehaltigeble komencis galopadi. Je proksima distanco antaŭ la ĉevalo, ŝtoniĝis ses konsternitaj infanoj pro la neatendita akcidento. Liu Jingjun faris tujan decidon plenforte faligi la ĉevalon riskante sian propran vivon. La infanoj estis savitaj, sed li mem heroe sin oferis.




8. Estas la granda penso de Maŭ Zedong, kiu kreis la grandan revolucionan heroon. La revolucia spirito de Liu Jingjun oferi sin por savi aliajn, por ĉiam vivos en la koro de ĉiuj homoj.



La ses infanoj kiujn Liu Jingjun savis per sia vivo



## La Ruĝa Standardo sur Ginggang-montaro



Ĝi estas la unua ruĝa standardo kiu flirtis sur Ginggang-montaro antaŭ 40 jaroj.

Post la malvenko de la Granda Revolucio en 1927, Prezidanto Maŭ Zedong, la granda gvidanto de la ĉina popolo, daŭre tenis alte la ruĝan standardon de revolucio, persone gvidis la Aŭtunan Leviĝon havantan grandan historian signifon. Post la leviĝo, Prezidanto Maŭ komandis la leviĝintajn trupojn — la Unuan Divizion de la Unua Armeo de la Ĉina Laborista-Kamparana Revolucia Armeo — marŝi al Ginggang-montaro de la meza sektoro de Luohiaŭ-montĉeno, starigis tie la unuan kamparan revolucion bazlokon en Ĉinio, propramane kreis popolan armeon de nova tipo, kaj tiel malfermis por la proleta revolucio brilan vojon al fina kapto de la urboj pere de sieĝado de la urboj per kamparoj.

En la Revolucia Milita Muzeo de Ĉina Popolo, tiu ruĝa standardo, kiu flirtis sur Ginggang-montaro antaŭ 40 jaroj, rememorigas la vizitantojn pri la glora kaj peniga revolucia vojo trapasita de la tiama Ruĝa Armeo. Sub la gvido de la Centra Komitato de la Partio kaj Prezidanto Maŭ, la ĉina popolo iris laŭ tiu ĉi vojo de venko al venko, kaj venkis la potencajn malamikojn en- kaj ekster-landajn, kreskante ĉiam pli granda kaj pli forta. Pasis jam 40 jaroj ĝis hodiaŭ, jen vidu, la ruĝaj standardoj flirtas kvazaŭ maro sur la Placo Tian-anmen, kaj sub la gvido de Prezidanto Maŭ la ĉina popolo kondukas nun ardan grandan proletan kulturan revolucion, por ĝisfunde elfosi la reviziisman radikon kaj preventi la restarigon de kapitalismo. La revolucia torĉo ekbruligita de Prezidanto Maŭ certe prilumos la tutan mondon.

EL *Popola*  
**ĈINIO**

人民中國報

Monata gazeto eldonata de  
ĈINA ESPERANTO-LIGO  
P. O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

**N-ro 1 (103) 1967**

### Ĉefa Enhavo

Prezidanto Maŭ Okafoje Revuas Grandan Armeon de Kultura Revolucio (*bildpaĝoj*)

Prezidanto Maŭ Revuadis Armeegon de Kultura Revolucio el 11 Milionoj da Personoj

Albana Partio de Laboro Okazigis Sian 5-an Kongreson

Gratula Telegramo de Kamarado Maŭ Zedong al la Kvina Kongreso de la Albana Partio de Laboro Telegramo de K-do Maŭ Zedong al K-do Enver Hoxha

Varma Celebro al Granda Festtago de Liberigo de Albanio

Tutmondaj Popoloj Amegas Prezidanton Maŭ

“Cititaj Vortoj de Prezidanto Maŭ” en Japanio

Vjetnamio Triafoje Eldonis la Libron “Poemoj de Prezidanto Maŭ”

Eksterlandaj Amikoj Laŭdas Nian Grandan Kulturan Revolucion Dek Mil Personoj Kunvenis en Pekino Okaze de la Centa Datreveno de Naskiĝo de Sun Jatsen Parolado en la Centajara Jubilea Kunveno de Naskiĝo de D-ro Sun Jatsen (*Ĝoŭ Enlaj*)

Parolado de Song Kingling Okaze de la Centa Datreveno de Naskiĝo de Sun Jatsen

Ŝtala Batalanto Maj Hiande Ĉinio Konstruis la Unuan Laborejon de Sinteza Benzeno en la Mondo Nova Teknologio de Fermenta Devaksigo de Petrolo

Kurantaj Aferoj Urba kaj Kampara Merkatoj en Plena Prospero

Miaj Ok Jaroj Kiu Revolucias, Devas Studi Verkojn de Prezidanto Maŭ

Ĉinaj Gefiloj Nesubigeblaj Nova Atingo de Ĉina Skulptarto Kanto pri Oŭjang Haj (*romano, 9-a ĉapitro*)

Liu Jinggjun — Bona Batalanto de Prezidanto Maŭ (*bildrakonto*)

La Ruĝa Standardo sur Ginggang-montaro

Sur la kovrilo — Maj Hiande

### KOREKTO

Sur la kovrilo — Prezidanto Maŭ sur Tian-anmen-pordego  
Sur la dorskovrilo — Festa nokto

# Aŭskulti la Vortojn de Prezidanto Maŭ kaj Iri la Vojon de Revolucio

**L**AŬ la instruoj de Prezidanto Maŭ, ruĝaj gvardianoj kaj revoluciaj instruistoj kaj lernantoj ekiras sur la revolucia vojo de kombiniĝo kun la laboristaj kaj kamparanaj amasoj. Ili piediras al aliaj lokoj por fari vastajn revoluciajn interkontaktojn kun la amasoj kaj la socio, dissemas la penson de Maŭ Zedong kaj tiel spertas ventojn kaj pluvojn en klasaj bataloj kaj maturiĝas per hardado.


*Du longmarŝaj grupoj de la Pekina Agronomia Kolegio kaj Pekina Malpezindustria Kolegio pasas tra intermonto sur la vojo al Jan-an, sankta loko de revolucio.*

*La longmarŝa grupo "Por Ĉiam Fidela al Prezidanto Maŭ", formita de ruĝaj gvardianoj de la Hingiang-a Politeknika Kolegio, iras kontraŭ la ventego en Gobi-dezerto sur la vojo al Pekino.*





*La ruĝaj gvardianoj, kiuj piede marŝas por fari revoluciajn interkontaktojn, ĉiam kaj ĉie lernas el Ĉiitaj Vortoj de Prezidanto Maŭ lige kun la praktiko, por levi sian konadon kaj kuraĝigi sin strebi al venko.*



*La junaj revoluciistoj de la Jan-an-a Longmarŝa Grupo de la Pekina Universitato venas al la loko, kie k-do Lin Biaŭ komandis siatempe batalon dum la Kampanjo de Pinghingguan, kaj fotografiĝas.*





*La junaj ruĝaj gvardianoj de la longmarŝa grupo de Ŝanhajo "Marŝi Sekvante Prezidanton Maŭ" helpas en kampo-laboro dum sia vojaĝo.*

*La longmarŝa grupo "Ruĝaj Armeaninoj" de la Harbina Aeronautika Industria Kolegio aŭskultas la rakontadon de la patrino de Liu Jingjun pri la heroeco de sia filo, bona batalanto de Prezidanto Maŭ.*



